EKLEZIO EN MUTACIA KRIZO

# Al la Fino de la Mondo

Manuel Halvelik



2014

Indikoj inter rektaj krampoj referencas

ĉu al koncerna verso en la Biblio

ĉu al ĉapitro aŭ paĝo de mia verko *La Teorio pri Ĉio*

elŝutebla de www.teoriopri.net.

# 1. Estigho de la Krizo

Ke la Rom'Katolika Eklezio troviĝas nuntempe en granda krizo, krizo de apostateco, de malmoraliĝo, de koruptiĝo — apenaŭ iu kontestos. Kune kun ĝi en analoga lito malsanas aliaj kristanaj eklezioj, ortodoksaj, protestantaj, kotopo. Kaj fakte la tuta mondo, kvankam tiu plivole sur akcesoraj kampoj de ekonomio, ekologio, politiko, sociologio kaj tiel plu. Nur en regionoj kun sanga persekutado de Kristanoj, aŭ konsiderataj "primitivaj", la Kredo restas solida kaj fidela, sed tion apenaŭ perceptas "la Okcidenta Mondo".

En tiu-ĉi traktaĵo mi intencas nudigi la plej profundajn motivojn kaj celojn de tiu tutmonda kirlo kaj taŭzo, ĉar ĝi signifas nenion malpli ol gravega turnopunkto en la historio de la homaro, komparebla al katastrofa transiro al nova geologia erao ! Estas ĝi nome ne natura kaj hazarda fazo de evoluo, sed provokata intenca intrigo de fortoj sub la socia surfaco. La farto de la Rom'Katolika Eklezio, kiel estante centro de la t.n. "Mistika Korpo de Jesuo" ludas en tio decidan rolon, samtempe kiel trompanto kaj kiel trompato, kion mi provos demonstri en la sekvanta paĝaro.

Estas sufiĉe konate, ke tiu granda krizo ekis en kaj pro **la Dua Vatikana Koncilio** (1960-1965), sed malpli konata estas ke ĝi trovis sian fetan originon jam fine de la 19a jarcento, sub regado de Papo Leo 13a (1878-1903). En ties epoko komencis aperi pli kaj pli da teologiaj kaj filozofiaj verkoj, kiel tenacaj fiherboj, subfosantaj la katolikan kredaron. Ili demonstris ke **Framasonismo**, post jarcentoj da sekreta sapeado, komencis pli kaj pli sentime en kaj rande de la Instituto malkaŝe veni al la surfaco. Ĝiaj herezaj opinioj tiele dissemataj tra la "Okcidenta Mondo" konsistigis tian buntecon de opinioj — aperantaj sub la kolektiva nomo de **Modernismo** — ke tiu papo ne malprave nomis ĝin "<u>nesto de ĉiuj herezoj</u>".

La danĝerego de tiu subkurento en la sino de la Eklezio, kiun li (kune kun multaj aliaj religiaj respondeculoj, filozofoj, kaj verkistoj) perceptis kaj kontraŭbatalis, subite iĝis klara al li ankaŭ en mistika maniero. Ĉeestintoj rakontis ke la papo, post iu privata Meso, abrupte rigidiĝis en tranco, dum kiu li vidis timigan spektaklon. Laŭdire li spektis en vizio la Satanon defiante Jesuon, ke Tiu nur cedu al li centon da jaroj de libera agado, kaj ke li sukcesos en tiu relative mallonga tempo komplete ruinigi la Eklezion de Kristo, konstruitan dum preskaŭ dumil jaroj. La vizaĝtrajtoj de la papo kompreneble montris grandan ektimon. Rezulte de tiu mistika sperto li faris specialan preĝon al la Arkanĝelo Miĥaelo — la granda oponanto de Lucifero — ordonante ke ĉiu sacerdoto en la tuta mondo laŭtvoĉe deklamu tiun preĝon je la fino de ĉiu Meso. Kaj tiel fariĝis. Jen ĝi:

> “Sankta Arkanĝelo Miĥaelo, defendu nin en la batalo; estu nia protektanto kontraŭ la malico kaj la ruzoj de la Diablo; ke Dio lin ordonu [al la Infero] kaj vi, Estro de la ĉielaj armeoj, forpelu la Satanon kaj la aliajn malbonajn spiritojn returne al la Infero.  Amen.”

La ”aliaj malbonaj spiritoj” aludas al kredo ke animo de damnito povas okaze mal-bonfari al surteraj vivantoj, same kiel la animo de sanktulo povas okaze bonfari al homoj. Fakte temas ne pri animoj sed pri spiritoj laŭ la tritavoleco de la homa naturo, klarigita en mia Teorio pri Ĉio [Vol.5/3/1].

Klare, la Infero jam de la frua komenco de Kristanismo, dum vivo de la Apostoloj, ĉiumaniere kontraŭbatalas la Eklezion, provante ĝin neniigi. La tuta historio de (precipe) la Katolika Eklezio estas tial plena je perfortaj atakoj, insidoj, intrigoj, internaj malkongruoj, kaj herezaj devioj sub diabla inspiro, kiuj ĝin vundis, misfunkciigis la hierarĥion, kaj ĝin dissplitis al branĉaro de apartaj religiaj grupoj kiuj ĉiuj pensas esti la vera komunumo dezirata de Jesuo. En tiu perspektivo oni povus konsideri Framasonismon kaj ĝian Modernismon nur unu plia malfeliĉo de la Rom’Katolika Eklezio, kiun ĝi en iu estonta tago venkos kaj transvivos. Bedaŭrinde, bedaŭrindege, la afero hodiaŭ estas multe kaj multe pli danĝera kaj efika, eĉ decida pri ĝia estonteco.

Komprenu, ke <u>la Eklezio estas jam ekde ĝia fondo en kreska evoluo, unuflanke laŭ kvanto da adeptoj, sed aliflanke ankaŭ laŭ la enhavo kaj signifo de sia doktrino</u>, same kiel nia Universo entute evoluas|Vol.4/3/9|. Ĝi do ne nur strebas pluvivi de generacio al generacio, por <u>finfine ampleksi la tutan homaron</u>, sed ankaŭ atingi apoteozon. Almenaŭ, tio estis ĝia starta alstrebo, ĉar ja la ordono kaj deziro de Jesuo mem, la Mesio. Dum Lia predikada travagado de la Sankta Lando, Lia buŝo ne ĉesis proklami aŭ mencii iaman estiĝon de **la Dia Regno**, de fintempa sankta reĝlando tutmonda kies Reĝo Li estos ĉe Lia reveno al Tero, kaj kiu enprenos vere la tutan homaron, la tutan Teron. Legu ekzemple en Luk.9,2: “(Li) elsendis ilin (la apostolojn) por prediki la Dian Regnon.” Tio estas la centra kaj plej profunda bazo de Kristanismo, aktuale (ve!) apenaŭ ankoraŭ menciata, kerna signifo de la termino *Evangelio* = Bona Novaĵo ! Plejparto de tiuj, kiuj kutimas preĝi la “Patro Nia”, eĉ ne rimarkas en ĝi la sopiran frazon “venu Via Regno”. Ili simple ne atentas kion ili diras, aŭ konsideras la realigon de tiu aspiro nur en tre tre fora estonteco, aŭ eĉ taksas ĝin nenion pli ol pia esprimo.

Sed estas iu individuo, kiu ne malatentas aŭ subtaksas tiun perspektivon, iu kiu arde alsopiras ĝin: la diablestro, Lucifero ! Ja ne kiel Regnon vere de Dio, sed kiel <u>Regnon de li mem</u> ! Lia tuta strategio jam dekomence celas korupti precipe la Katolikan Eklezion dum ties historia disvolviĝo direkte al tiu fincelo. Certe, la demonoj pro tiu perspektivo ĝenerala tio ne ĉesas trompi

kaj delogi unuopajn homojn, por plejeble plenigi la Inferon per animoj de damnitoj, kiuj iom post iom (pro la Leĝo de Karmo) restarigu la kompletecon je spiritoj kiu regis antaŭ la Granda Falo de duono el ili. Sed transe de tiuj delonge bonkonataj atakoj al individuaj homoj (aŭ komunumoj) estas la Homaro entuta, kaj precipe la Eklezio kiel **Mistika Korpo de Kristo**, materia kaj spirita pluvivado surtere de la Mesio, de la estonta Reĝo de Reĝoj. Tiun mistikan veron rivelis al ni la Apostolo Paulus en sia letero al la Korintanoj 12,27: “Vi ĉiuj estas la Korpo de Kristo (kaj Li via kapo).”

Tiel, se oni volas kompreni la tutmondan kaj multaspektan krizon de nia tempo, vidi la subkurenton de la evoluo, kiu kaŭzas ĉiujn tiujn kirlojn kaj taŭzojn surface, tiam oni devas meti ĝin en la perspektivon de la alproksimiĝanta Regno de Dio, komence lanta, sed niatempe en forta flurapidiĝo.

Kompreneble, eblas pluraj subkurentoj, fluantaj paralele al la sama direkto kaj kun la sama celo. Apud ruinigo interna, fare de framasonaj potenculoj kaŝitaj, tre efikas la sanga kaj kruela ekstermado de Kristanoj fare de islamaj ĝihadistoj, kiuj laŭvorte fluigas la sangon de amaso da martiroj. Laŭ la strebado al egalpezo en la Universo, la jam citita universala Leĝo de Karmo, la animoj de tiuj-ĉi lastaj hodiaŭtempe abundege enflugas la Ĉielon de Eterna Amo, kompletigante la sanktan duonon de la fidela Anĝelaro, dum iliaj persekutantoj nekonscie certigas al si mem eternan suferadon en la centro de Eterna Malamo.




Kristana knabino, post plurfoja seksperforto buĉata kiel ŝafo, fare de Islamanoj.
Onidire la sango de kristanoj vendatas al saudiaj princoj, kiuj kredas ke ĝi garantias al ili la Paradizon, se ili povas lavi siajn manojn en tiu sango..

# 2 La Akcela Karaktero

Plej kurioza estas la tumulta kaj eksploda karaktero de tiu krizo, la rapideco kaj perforto per kiu ĝi okazas. Mi konsentas, estas certe ne la unua fojo ke la Eklezio suferas de revoluciaj atakoj, el interno kaj el ekstero. Ĝia historio plenas je tiuj, kion klare demonstras la multenombraj dissplitoj de la Mistika Korpo al amaso da reciproke rivalaj grupoj, okazantaj ĉu pro politikaj kvereloj pri potenco aŭ privilegioj en la hierarĥio, ĉu pro herezaj novideoj en la doktrino. Sed tiuj estis nek tiel mondampleksaj nek tiel furiozegaj kiel en nia propra epoko.

Por tion vidigi, ni devas atenti la ĝeneralan evoluon historian de la Katolika Eklezio. Laŭlonge de tiu historio, de herezo al herezo, la Kredo, la Doktrino, kreskis ankaŭ, iĝante pli profunda, pli firma, pli detale klara kaj certa, montrante ke vere temas pri **Evoluo**, bone komparebla al la evoluo de la Materio kaj la evoluo de la Vivo, de unu geologia katastrofo al sekvanta, ĉiam unudirekte supren, kune kun la unudirekta fluo de la Tempo, kvankam en detaloj kaprice zigzagante.

Se preni la situacion de la Rom'Katolika Eklezio en la kvindekaj jaroj — antaŭ ol anoncis sin la kataklisma Vatikana Koncilio Dua — ĝi nombris ĉirkaŭ 250 milionojn da fideluloj en la tuta mondo. Tio ŝajnas glora kaj impona. Sed, kompare al la monda loĝantaro, kiu tiam ampleksis kurioze ĝuste dekoble pli, nome 2,5 miliardo, tio konsistigas ne pli ol povra dekono ! Eĉ se ni malavare kaj troige enkalkulas ceterajn Kristanojn ĉiuspecajn en tiu epoko, tiam ni atingas nur 500 milionojn, tio konsistigas ankoraŭ nur 20% de la monda loĝantaro. Neta minoritato ! Tio estas en realo magra rezultato post preskaŭ 2000 jaroj de fervoraj varbado kaj predikado, fare de sen-nombraj misiistoj, kiuj dediĉis sian vivon al la tasko donita de Jesuo: "Iru kaj instruu ĉiujn popolojn," ofte je la kosto de grandaj penoj kaj eĉ de sia vivo mem.

Leviĝas tiel la demando, kiom da jarmiloj ankoraŭ necesos por atingi la grandan celon de "unu grego kaj unu paŝtisto" [Joh.10,16], de nepre la tuta mondo, de ĉiuj gentoj, sub regado de nur Jesuo kiel Reĝo de la Reĝoj ??? Aktuale — mi volas diri, post la sesdekaj jaroj — tiu nombro da Kristanoj, tiu minoritato, ankoraw konsiderinde pli ŝrumpis pro la vasta apostateco, anstataŭ kreski ! Estas do ne normala afero; estas fakte paradokso ! Almenaŭ se konsideri Jesuon kiel vere dian kaj definitivan centron de la homa historio. Des pli ĉar la ĝenerala historia evoluo klare akcelas, akcelegas, sur ĉiuj eblaj terenoj de nia homa socio, ne lastvice sur tiu de teknologia progreso kaj de la eventoj mem, eĉ frenezapaŝe. Sufiĉe multaj "signoj de la tempo" ja aŭguras ke la granda fino de la mondo estas tieldire sur la sojlo. Unue la dilatiĝado de la Universo komencas alproksimiĝi

al lumrapideco, tiu absoluta limo de moviĝebleco, pro strukturaj kialoj de la kosmo, kiujn mi eksponis en [Vol.3/32/8]. Due la progreso de teknologio tielege akcelas sur ĉiuj terenoj, ke ĝi komencas eskapi la homan regon kaj minacas vivi sian propran vivon, aŭtonome kaj digitale stirate; robotmaŝinoj pli kaj pli anstataŭas homojn en ties taskoj. Eksploda situacio. Trie, la paralela interkomunikado inter homoj, ne lastvice per Interreto, iĝas tiel vasta kaj penetrema, ke ni homoj riskas perdi nian personecon, memstarecon, privatecon. Ankaŭ eksploda situacio. Do, la nudaj faktoj, ĉiutage kontroleblaj, klare montras ke plu ne povas esti parolo pri ankoraŭ multaj jarmiloj de evoluado ! Tute male: la grandioza celo pri "evangeliizo" de la tuta homaro, tiel riskas fariĝi kompleta utopio ! Racia konkludo: eĉ se neglekti la aktualan disfalon de la Eklezio de Jesuo, tute simple kaj **absolute mankas tempo al ĝi por atingi la Regnon de Dio !** Almenaŭ se ni kalkulas progreson per la ĝisnuna ritmo...

Fakte, mia Teorio pri Ĉio konsistigas ankoraŭ kvaran argumenton, ĉar ĝi ja prezentas novan paradigmon, novan mondobildon, kiu disponas ĉiujn karakterizojn por esti la lasta kaj definitiva tia, rilate al sciencoj kaj kredokonfesoj.

Bone, kiel tiam ekspliki la evidentan malkongruon inter la nuna stato de la Rom'Katolika Eklezio kaj la al ĝi farita promeso el la buŝo de Jesuo pri "fina venko" ? Nu, tiel ke **la Eklezio** — kaj la tuta homaro kune kun ĝi — **troviĝas en mutacia krizo.**



Nenatura fulmego sur la Sankta Petro en Romo en la tago - 3 Februaro 2013 – kiam Benedictus 16a propravole abdikis.

# 3. La Fatala Kuspo


La kurado de la tempo en nia Universo, ĉiam antaŭen, ne estas rektlinia (lineara) sed akcela (eksponenta). Reale temas pri spiralo, laŭ la kupla progreso de ekspansiado kun rivoluado priparolita en [Vol.1/10]. En la apuda skemo mi prezentas la lastan sekcion de tiu kurvo, rilatan jam al nia homa historio, kiu mem tieldire pivotas ĉirkaŭ la Eklezio kiel Mistika Korpo de Jesuo. Mi tial arbitre ekirigas la evolukurvon ek de la apostola tempo, depost 30 PD aŭ eĉ pli poste.

En la unua parto, la progresado estas kompare longedaŭra kaj lanta. Evidente en realo ne tiel belregula sed ja zigzaga kaj plena je tumultaj tuberoj, ŝiroj, kaj tordoj, kiujn mi ne bezonas enmeti.

Nu, en tia kurvospeco iuloke-iutempe subite anoncas sin vojkurbo, **kuspo**, kie la direkto abrupte fariĝas nete pli kurbigita kaj la irado nete pli rapida. Ni alvenas al la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento, la jaroj en kiuj startis kaj disvolviĝis la revolucia Dua Vatikana Koncilio.

Por klare elstarigi la eksterordinaran gravecon de tiu punkto en la historio, mi mencios du rimarkindajn profetaĵojn, malmulte aŭ ne konatajn.

En unu el siaj vizioj pri la estonteco, la germana stigmatulino Anna-Catharina Emmerick (1774-1824) subite spektis alegorie la romenciferan nombron LX starantan frunte de la nombro MM, kun kompreno ke temis pri datoj, sekve pri la jaro 60 antaŭ la jaro 2000, kio egalas 1960. Komunikis ŝi: "Mi lernis ke en la kvindekaj aŭ sesdekaj jaroj antaŭ la jaro dumil post Kristo, se mi ne eraras, Lucifero estos senkatenigita. Multaj aliaj nombroj, kiujn mi plu ne memoras, estis indikitaj al mi (rilate tiun eventon)."



La t.n. Ploranta Madono de La Salette (1846)

En la jaro 1846 aperis la Madono al du infanoj, Maximilien Giraud (11-jara) kaj Mélanie Calvat (15-jara), kiuj paŝtis ŝafaron en la francaj alpaj montoj proksime al la vilaĝo La Salette. Plorante la Madono diris ke Ŝi plu ne kapablas deteni la punojn de Dio, pro la multa pekado, kaj ke okazos al Francujo kaj aliaj eŭropaj landoj, severaj kataklismoj. Tiuj profetaĵoj komplete realiĝis en la postaj jaroj, sed aldonita estis ankaŭ granda minaco al la Eklezio mem, sen mencio pri la koncerna tempo, minaco kiun pliparto el la raportoj pri tiu aperaĵo ial preferas ne mencii. Nome tri fiaŭguroj: 1) Romo perdos la fidon, 2) La Antikristo suriros la tronon de Petro, 3) Dum malmulta tempo ŝajnos ke la Eklezio estos malaperinta de la tersurfaco.




**Historia kurvo de la Katolika Eklezio de Romo**



La Virgulino de Fatima kun sia Senmakula Koro (1917)

Se tio ankoraŭ ne sufiĉus pri la temo, la Sanktega Virgulino ankoraŭfoje en la jaro 1917 sesfoje aperis en Fatima (Portugalio), kie Ŝi komunikis aparte al la ĉefa inter tri infanoj elektitaj — Lucia dos Santos (1907-2005) — sekreton. Tiu eksterdube temis pri la minacanta granda apostateco kaj la disfalo de la Roma Eklezio. La viziulino, kiu poste iĝis karmelitana monaĥino, tion surpaperigis pro ordono de sia episkopo. Tamen ĉi-lasta, ne kuraĝinte legi la dokumenton, ĝin sigelis kaj forŝlosis en sekurŝranko. Kelkajn jarojn poste, ne sciante kion fari pri la afero, li sendis la envelopon al la reganta papo, kiu definitive decidu. Tiu siavice malfermis, legis, kaj sen klarigo denove forŝlosis la dokumenton. Same faris liaj postaj kolegoj, unu post la alia ! Ion tian oni povas kompreni nur se la enhavo estis <u>misaŭgura por la Eklezio mem</u> kaj ne "nur" entenas punojn al landoj kaj popoloj. La Eklezion de Romo oni ja devas konsideri kiel neeraripova, malpleje en la jaroj de la fifama Koncilio, kiam hierarĥio plus laikaro pensis esti naviganta al nova glora estonteco de ĝenerala reviviĝo. Fakte, la historio de tiu sekreta mesaĝo, misnomata "Tria Sekreto de Fatima" ĉar ĝi en realo estis la dua en la vico, estas tiel komplikita kaj varia, ke oni facile povas verki libron pri ĝi, kio efektive ankaŭ okazis plurfoje, plus sennombrajn artikolojn. Pro tiu minaca enhavo ĉiuj eblaj aŭtoritatuloj, en kaj ekster la Eklezio, kiuj ion tion flaris — ne lastvice la sinsekvaj popoj — faris sian plejeblon por puŝi tiun konsternegan profetaĵon en la kelon de forgeso. La monaĥino — sub ĵuro pri absoluta obeemo al siaj superuloj — post la koncilio eĉ mem plu ne kuraĝis malkaŝi la realan enhavon. Sed spite ĉion, ŝi estis tamen post la Dua Mondmilito anoncinta ke la sekreto devus esti plej konvene komunikata en la jaro … 1960: "Ĉar tiu dato estos tre grava por la Eklezio kaj oni tiam plej bone komprenos la mesaĝon." Ĉu ankoraŭ necesas porti lignon al la arbaro ?



Erarvagantaj gvidistoj unu post la alia

La kuspo en la historia kurvo tial certe meritas ricevi la formon de **eksplodanta bombo** ! Restas analizi kial tiu katastrofo okazis al la Eklezio. Ĝi nome estas ne sole afero de peka konduto. Tion mi klarigos per parabolo.

## La Parabolo pri la Saĝa Domposedanto

Estis iam potenca kaj riĉa Posedanto de multaj bienoj. Inter tiuj estis unu tute speciala, escepte bela kaj kara al li, kiun li destinis ankaŭ al aparta klaso de loĝantoj inter lia laboristaro. Kiam li ĝin konstruigis, li planis ĝin kvazaŭ estus abelujo, kapabla funkcii kiel administra centro de lia lando, kun multnombraj oficistoj. Li ĝin fakte konstruis kaj ekipis por ke ĝi povu funkcii longatempe, de generacio al generacio, plejeble efike. La elektita stabego laboradis tie por la posedanto sur multaj etaĝoj kaj laŭ multaj ŝtupoj de taskoj kaj dignoj. La Posedanto de tiu domego, post kiam li mem estis enoficiginta la unuan oficialan administranton, plenrajtigitan ĝis sia morto por agi aŭtoritate super la ceteraj stabanoj kaj oficistoj, lasis la elekton de nova supera administranto, kiam la unua estis mortinta, al ties stabanoj mem. Tio volas diri en la unuaj tempoj al selektita dekduopo, sed poste al pli ampleksa grupo, kies nombro kreskis de generacio al generacio. Tiele jam multaj administristoj sekvis unu la aliajn. Sed la domego dume mem iĝis pli kaj pli malnova kaj kaduka ĝis en iu tago la Posedanto konstatis ke lia ŝategata domego plu ne kapablas respondi al la postuloj kaj bezonoj de moderna tempo. Ne estis en ĝi garaĝo por aŭtomobiloj, ne estis fluanta akvo kaj certe ne tualetejoj kaj necesejoj sur ĉiu etaĝo. Same ne ekzistis en ĝi elektra kurento aŭ elektraj aparatoj kaj maŝinoj kiaj lifto, eĉ ne telefono aŭ simila komunikilo por rilati al la ekstera mondo. Krome la fenestroj estis tiel mallarĝaj ke nur malmulta lumo enfalis en la ĉambrojn, pro kio la oficistoj nur pene kaj malrapide povis legi kaj perplume skribi sur siaj tabloj, kie ĉiutage alvenis kaj foriris sennombraj leteroj kaj dokumentoj, gravaj por la komuna entrepreno kaj por la ekstera mondo. Kaj tiel plu. Fine la domego certe neniel plu konformis al la kuro de la tempoj. En tiu momento la Posedanto vidis sin devigata fari seriozajn adaptojn kaj renovigojn al sia konstruaĵo.

Antaŭ tiu neceso la Posedanto rezonis: “Se mi ordonus al la servistaro ĉiun opan malnovaĵon adapti kaj konformigi, tiam ili estos okupitaj nur pri tio dum tre tre longa tempo kaj fine de tiu intensa kaj kompleksa laboro de adaptado la tuto ne povos ne esti nur flikaĵo el kompromisoj, kiuj neniun plene kontentigos. Ĉu mi do ne multe pli taŭge malkonstruu la domegon komplete kaj ankaŭ komplete rekonstruu ĝin, tute konforma al la modernaj bezonoj ? Tio certe estos pli efika kaj konvena.”

Nu, la situacion komplikigis la fakto ke tiu Posedanto havis fortan rivalon, kiu jam delonge ĵaluzis pri la impona kaj renoma domo kaj deziregis posedi ĝin. Li estis tre malica, ruza, kaj inteligenta kaj havis amason da samkarakteraj servistoj je sia komando. Jam dekomence li do ĉiamaniere insidis kontraŭ la domo por ĝin kaj ĝian enloĝantaron difekti, malhelpi, aŭ se eble eĉ ĝin akapari kaj ekmastri, ĉu sekrete dum la nokto, aŭ aperte en plena taglumo. La damaĝoj, kiujn li kaŭzadis, unu fojon estis malgravaj dum alian fojon konsiderindaj, sed la Posedanto ĉiufoje sukcesis rebati la atakojn kaj ripari la difektojn, pere de siaj fidelaj oficistoj kaj deĵorantoj, kvankam ĉiufoje iu parto el ili fuĝis for aŭ perdis la vivon ĉe la defendado.

La Posedanto, estante tamen pli saĝa ol sia malamiko, rezonis plu: “La maliculo estas spertulo en detruado; kial mi ĉi-foje ne lasu lin agadi sen malhelpo ? Li certe faros la malkonstruan laboron perfekte, kaj tion kion li anstataŭe provos mem starigi kaj ekmastri tion mi povas per unu bato neniigi. En la tiel liberigita tereno mi tiam rapidege starigos la novan domon laŭ mia plaĉo kaj provizita per ĉio bezona. Mi do ŝajnigu esti dormanta kaj nenion rimarki pri lia sapeaj misfaroj.” Kaj tiel fariĝis. Fino de la parabolo.



Laŭ mia konvinko, bazita sur la evoluo de nia Universo, estas tio la fundamenta kaŭzo kaj motivo de la granda krizo en la Katolika Eklezio, kiu ekis en la sesdekaj jaroj kaj en la momento de verkado ankoraŭ ne atingis sian paroksismon. La Infero subite ekpovis fiagadi sen rezisto !

# 4. La Du Chefaj Ordonoj

Nun ke la kaŝita motivo por la drasta Koncilio estas klara, mi reprenu skizi kiamaniere ĝi turniĝis al senkompara kolapso de Kredo kaj Kredantaro.

Por kolapsigi iun konstruaĵon, plej rapide kaj efike, oni ŝtopas sufiĉan kvanton da dinamito aŭ da TNT en ĝian fundamenton, ne zorgante pri la supraj etaĝoj. Kiam la fundamento eksplodas, ja la tuta konstruaĵo kune disfrakasiĝas.

Nu, kiu estas **la religia fundamento** de la Eklezio ? Jesuo tion eksplicite instruis tra la skribaĵoj de la Evangeliistoj. Jen Mateo 22,35: “Unu el ili [la religiaj superuloj], ekzegezisto, demandis al Jesuo por ekzameni Lian scion: <Majstro, kio estas la plej grava ordono en la [Mosea] Leĝaro ?> Jesuo respondis al li: <Vi amu la Sinjoron vian Dion per via tuta amo kaj per via tuta inteligento. Jen la plej grava kaj unua ordono; kaj la dua estas egala al ĝi: <Vi amos vian proksimulon kiel vin mem.> De tiuj ĉi du ordonoj dependas la tuta Leĝaro kaj la [instruoj de] la profetoj.”

Genia ruzulo kia li estas, la Satano do diris al si: “Se mi sukcesos disigi tiujn du plej gravajn ordonojn, sur kiuj ripozas la abomenata Eklezio, aŭ eĉ pli taŭge ŝovi opozicion inter ili, tiamdo ĝi tute certe ŝanceliĝos kaj disfalos.”

Mi ne scias ĉu ekzistas multaj teologoj, kiuj vidas kaj komprenas ke la Sankta Kruco simbole reprezentas ĝuste tiujn du ordonojn. La vertikala trabo estas direktita al Dio sole; la horizontala trabo estas direktita al la proksimuloj. Disligu tiujn du trabojn kaj la Kruco plu ne estos kruco, sed nur du traboj apartaj.

La vertikala ankoraŭ kapablas per si mem rektestari, kvankam mankas al ĝi la ebena direkto. La horizontala male, sen subteno de la centra, falos al la grundo kaj mankos al ĝi la perspektivo alsupre. Jen la alegoria sed ankaŭ tutreala dissplito, kiun la kohortoj de la Infero sukcesis trudi al la Dua Vatikana Koncilio, kaj ĝia celo.

# 5. La Strategio

Nun ke la motivo por la drasta Koncilio estas malkaŝita, mi reprenu skizi kiamaniere tiu turniĝis al senkompara kolapso de Kredo kaj Kredantaro. Vide al la solideco de la konkerota fortreso, Lucifero kredeble longe antaŭplanis sian ofensivon, zorge preparante generaciojn de adeptoj surtere, ekster kaj interne de la Eklezio. Estos ja la lasta kaj decida batalo por la reĝotrono.

Estas malfacile aŭ neeble determini precize kiam tiu plano fakte ekis en la historio, sed ĝi certe akiris rekoneblan formon post la sanga Franca Revolucio, fine de la 19a jarcento, la erao de Pozitivismo kaj aro da konektaj ismoj kiuj havis sendiecon kaj precipe kontraŭekleziecon kiel denominatoron. Lasu min rememorigi la vizion de Papo Leo 13a. Ĉiuj tiuj kurentoj, aparte aŭ paralele fluantaj, alprenis la formon de riverego, tiun de **Modernismo**.

La Unua Vatikana Koncilio, lanĉita en 1870 — dudeka en la vico kaj tricent jarojn post la antaŭa en Trente ! — intencis meti baron al la rapide disvastiĝanta raciismo ("La Scienco"), sed ĝi sukcesis realigi nur parton de siaj dekretoj, ĉar fine de tiu jaro eksplodis la franca-prusa milito, dum kiu Romo estis konkerita fare de itala armeo, kaj la relative vasta papa ŝtato aneksita. El tiu iama aŭtonoma regneto postrestis per traktato nur Vatikanurbo.

Tiu perforta interrompo kompreneble ne ĉesigis la urĝecon de religia restarigo por kompletigi la koncilion; tiu neceso nur kreskis kaj kreskis. Sed bedaŭrinde la du grandaj mondmilitoj kaj serio da malpli grandaj, igis rekunvenon de la episkoparo ĉirkaŭ la papo neebla aŭ maloportuna. Ne nur tio, sed pere de liaj adeptoj en la medio de Framasonoj kaj ties aliancanoj en la Sovjetia Sekretservo prosperis al la Ĉefdemono tralardi la vatikanajn instancojn kaj organizaĵojn per "falsaj fratoj" ĉiuspecaj: insidaj laikaj oficistoj, pastroj, episkopoj, kardinaloj. Ekzistas atestoj ke jam Papo Pius 12a en la kvindekaj jaroj ekhavis la intencon lanĉi novan koncilion en la Vatikano por finfari la unuan, sed ke liaj konsilistoj konvinkis lin ne fari tion ĉar "la Framasonoj aspiras ĝuste tian oportunon por korupti la Eklezion." La papo do rezignis, bone sciante ke en tiu kaŝa societo mondvasta membras politikistoj, financistoj, juristoj, militistoj, kaj (ve!) eĉ ekleziuloj, el la plej altaj niveloj de la socio kaj sekve kun timigaj povoj pri intrigado kaj pri manipulado de homoj, precipe tra la amasmedioj.

Tiel, kiam la Dua Vatikana Koncilio efektive startis en 1960, la scenejo estis perfekte antaŭpreparita por realigi la genian planon de la Infero. Armeeto

de teologoj, episkopoj, kaj kardinaloj staris preta, scie aŭ mensblinde, por plenumi la demonajn inspirojn, havante klaran taktikon en la pensoj kaj ardan volon venki ĉiujn kontraŭstarojn. Sub la preteksto, ke en niaj modernaj tempoj oni nepre devas enkalkuli la faktojn (?) akiritajn de "LA" scienco, ili enirigis en la kunvenegon konsiderindan nombron da ali-kredantaj fakuloj (precipe protestantaj kaj ateismaj) — la tiel nomataj *periti* — por konsili (!) al la episkopoj kaj kardinaloj.

Kontraŭe, la episkopoj, kardinaloj, kaj aliaj ekleziuloj, inter la amaso de 2000 partoprenantoj el la tuta mondo, kiuj honeste deziris finfari la celojn de Vatikano Unu, estante komplete sensciaj pri la komploto, do estis neniel preparitaj por tio kio prezentatos al ili, kaj ili facile falis en la kaptilojn.




Johannes 23a

Fakte, la fifama koncilio jam dekomence estis vokita al fiasko, ĉar ĝia instiginto — Papo Johano 23a — tuj ĉe la malfermo ordonis ke oni traktos nur pri "**pastoralaj**" temoj kaj nepre ne pri teologiaĵoj aŭ moralaĵoj. Por kompreni la plenan signifon de tiu ŝlosilvorto, oni devas koni la karakteron de tiu novpapo. Oni povas apenaŭ imagi pli mildan, kompateman, kaj bonkoran viron ol tiu; li ŝatis pardoni ĉion ajn al ĉiu ajn. Ne mirige ke li pruntis sian papan nomon de la mildega apostolo Johano. Kaj ankaŭ ne mirige ke oni populare baptis lin "la bona papo Johano". Kiel patriarko de Venecio li savis multajn judajn infanojn de nazia persekuto, kaŝante ilin en katolikaj lernejoj aŭ monaĥejoj, same kiel faris la papo Pius 12a. Lia vivmodelo eksterdube estis la pardonema patro el la parabolo pri la perdita filo [Luk.15,11] aŭ ankoraŭ Jesuo kiel "la bona paŝtisto" [Luk.15,3], kiuj ambaŭ emfazas la senfinan amon de Dio. (Tamen, estas tre danĝere je tio forgesi ke Dio estas ankaŭ senfine justa juĝisto, kiu povas se necese severe puni la pekojn !) Nu, ĝuste tiuj ekstremaj mildeco kaj kompatemo igis lin danĝere naiva kaj nesuspektema, sekve .... elstara piono de la Infero por meti sur la ŝaktabulon de la koncilia lukto. Ankaŭ lia 77-jaraĝo estis favora elemento en la batalo; li certe ne povus ankoraŭ longe gvidi la Eklezion en la ĝistiama sulko de justeco kaj severeco, plugita de la antaŭa papo, aristokrata karaktero kiu tenis la Krucon alta. Kaj kulmine, lia pacama naturo igis lin kredi ke la Sankta Spirito inspiris lin por organizi la atendatan novan koncilion por porti pacon kaj amikecon al la mondo, dum estis envere la Satano kiu flustris tiun iluzion en liajn orelojn. Lia decido, ne specife trakti pri teologiaĵoj kaj certe ne enformuligi iun novan dogmon (tamen de multaj petata rilate al Maria) konsistigis en si mem jam 90-grada devio disde la

Unua Vatikana Koncilio kaj fakte de ĉiuj antaŭaj koncilioj ! Tiu forturno de la leĝoj de Dio ne povis ne rezulti, du-tri generaciojn poste, al paganeco en la praktiko dum kristaneco nur laŭnome. La “pastorala” sinteno kondukis finfine precipe al pravigo de homoseksemo, eksedziĝo, libera kunvivado, kotopo kiel naturaj seksfenomenoj tolerindaj. Reaktivigo de Sodom kaj Gomorra. Oni ekkonas la arbon laŭ ties fruktoj [Mat.7,16].

Alia misgvida slogano, de li lanĉita, estis ***aggiornamento*** **=** ĝisdatigo de la Kredo = plifirmigo de la Kredo per la akiritaĵoj de sciencaj esploroj. Sed ve, la renovigo kaj revivigo de la Kredo, kiun li intencis kaj esperis pro tiu elpaŝo, turniĝis al precize la malo. Haltigi aŭ korekti tiun fatalan erarvojon li ne povis, ĉar jam en la dua jaro 1963 de la granda kunveno, li grave malsaniĝis kaj mortis. Ĉeestantoj ĉe lia mortolito disdiris ke li ankoraŭ provis de tie ĉesigi la Koncilion, ekkoninte ke ĝi turniĝos al katastrofo, sed evidente vane.

Papo Paulus 6a, kiu baldaŭ sekvis lin, estis samdirekte katenita de **ekumenismo**. Li nome ege deziris ke partoprenu en la “okcidenta” evento ankaŭ la ortodoksaj fratoj el oriento, precipe tiuj rus-ortodoksaj el Sovjet-unio, kiel unika okazo por provi reunuigi la du Eklezioјn, malpaciĝintaj ĉe la “Granda Skismo” el 1054. Por ke la ruĝa registaro ne malpermesu ilian venon, li solene (sed ja sekrete) promesis ke la koncilio ne traktos pri ana-temigo de Komunismo kaj Ateismo, petata de sufiĉe multaj tradiciuloj. Li do rigore blokis eĉ la plej sensignifan proveton en tiu direkto, sed samfare ankaŭ ne ĝenis senbremsan enfiltradon de falsaj religiuloj, formitaj kaj senditaj de la rusa sekretservo. La tiel nomata “ekumena spirito” de horizontaleco cetere jam estis forte invadinta la cerbojn, definitive obskur-igante ke Jesuo estas la <u>Unika Savo</u> por la mondo.



Augustin Bea (1881-1968)





Alfredo Ottaviani (1890-1979)

Multaj eminentaj voĉoj, en tiu debatado kiu daŭris kvar jarojn, estus menciindaj, sed mi mencios nur la du batalkokoj ĉirkaŭ kiuj pli malpli kristaliĝis la diskutoj (foje disputoj). Unuparte estis la insida Kardinalo Augustin BEA kaj lia majoritata bando, trejnitaj en modernismaj ideoj kaj kiamaniere tiujn venkigi; li estis prezidanto de la (ĵus kreita!) "Sekretariejo por la Unueco inter Kristanoj." Aliparte estis Kardinalo Alfredo OTTAVIANI, prefekto de la (malnova) "Kongregacio por Defendo de la Kredo," ne preparita por tia parolbatalo kaj kun nur minoritata grupeto de tradiciuloj por apogi lin; malfortaj ŝafoj antaŭ trejnita kaj celstreba luparo.

Detalan raporton pri la eventoj kaj diskutoj dum tiu fifama koncilio, kiu neniel estis daŭrigo de Vatikano Unua, oni povas legi en la verko *"La Rejn-rivero fluas en la Tiber-riveron"* fare de Pastro WILTGEN . Tiu librotitolo estas trafe elektita, ĉar ĝi metafore indikas ke amaso da modernismaj teologoj el la landoj ĉirkaŭ tiu riverego invadis Romon. Aliflanke ankaŭ la fama brita ĵurnalisto Malcolm MUGGERIDGE, kiu laboris komisie de la BBC-elsendoj, opiniis ĉe la konkluda sesio: "Vere, Papo Johano — instalita kiel sankta kaj perfekta, la bona viro de nia tempo — ĉu konscie aŭ nekonscie faris pli da damaĝo al la Eklezio ol kredeble iu ajn alia individua viro iam faris en la tuta ĝia historio. Preskaŭ ŝajnis ke Papo Johano laboris nome de la diablo, sen esti iel konscia pri tio !"

La rezulto de tiuj debatoj, laŭ la sinsekvaj temoj, registratis en manifestoj kiuj portas la nomon "konciliaj konstitucioj" aŭ "konciliaj dekretoj". Notu ke la taktiko de la modernismaj herezuloj estis tiel ruza, ke ili profitis ĉiumaniere el tiuj dokumentoj. Unue ili "bonvole" toleris ke la Tradiciuloj ie tie enŝovi ankaŭ siajn opiniojn. Tiamaniere la dekretoj ja fariĝis du- kaj dubsencaj kaj evitos provokon pro tro emfaza herezeco. Ĝeneralskeme en ilia unua parto, ajne pri kiu temo, estas certigate: "Jes, tio estas kaj restas la vero," dum en la dua parto oni legas "Sed oni devas ankaŭ konsideri la akiritaĵojn de modernaj fakesploroj." Sekve de tiu artifiko, ĉiu ajn kapablas interpreti tiun aŭ alian dokumenton laŭ sia propra gusto, elektante ĉu la tradician vidpunkton ĉu la modernisman. Estas do absolute vane diri — kiel sensciaj naivuloj ankoraŭ sufiĉe ofte faras — ke oni ne ĝuste komprenis aŭ interpretis la konciliajn dokumentojn, kaj ke oni devas relegi tiujn ! En antaŭaj ekumenaj koncilioj iliaj dekretoj estis unusencaj, unuanimaj, kaj zorge trakontrolitaj, esprimante la unuaniman vidon de la plimulto el la partoprenantoj, sub prezidado de la reganta papo kaj sub gvido de la Sankta Spirito. Hodiaŭ ili spegulas nur kompromisojn de "demokratia" interkonsiliĝo, dum Jesuo kaj Liaj apostoloj neniel konsistigis demokratan organizaĵon, nek devas esti Lia Eklezio ! Horizontaleco de homoj anstataŭ vertikaleco de Dio.


Due, ili bone sciis ke tiuj dekretoj estis nur surpaperaj abstraktaĵoj, kiujn specialaj komisionoj poste devos konkrete enformuligi, resumi, kaj … trudi al la fidelularo kiel nepre obeendajn ordonojn. Efektive “trudi” ĉar, per la vaste dissemita reto de aŭtoritataj sapeantoj, la konstitucioj <u>en praktiko</u> akiris la valoron kaj absolutecon de dogmoj, spite la dekomencan deklaron ke oni kreos neniun novan dogmon ! Estis ja nur “pastorala” koncilio, animprizorga laŭ aktuala kompreno pri homa bonfarto.

La komplotintoj povis esti certaj pri la sukceso de ilia intrigado: apostateco kaj disfalo de la Rom’Katolika Eklezio pro disduigo de la ĉefordonoj.

# 7. Korupto de la Mesofero

Elstaran modelon de tiuj framasonaj intrigoj liveras la **Prepara Komisiono pri Liturgio**, kiu devis decidi kiumaniere oni "konformigos" la sakramentojn de la Eklezio, tiun sangovazaron de la spirita vivo, precipe kaj elstare la centran sakramenton de la **Sankta Mesofero**.

Tradicie, laŭ la eksplicita volo de Jesuo, tiu centra rito estu ĉiutaga mistika renovigo de Lia elaĉeta morto sur la kruco, reala kvankam deposte sensanga. Estas ne troige diri ke tiu Sanktega Sakramento konsistigas la spinon de la Mistika Korpo de Jesuo kaj centron de la sep ĉakroj simboligataj per la juda menoro [Vol.5/5.3]. Klare konceptis tion Maarten LUTHER, kreinto de Protestantismo, kiu skribis: "eliminu la meson kaj vi eliminos la katolikan eklezion."



**Pugoturno al la Tabernaklo**

Nu, kompleta kaj tuja elimino de tiu sakramentego estis en praktiko neeblaĵo, eĉ ne per diktatora perforto, ĉar la historio abunde pruvas ke ĝi tiukaze estos celebrata en sekretaj lokoj, kaj ke la partoprenantaj fideluloj ne timos riski torturon kaj morton pro ĝi. Pli ruze kaj efike estis ŝanĝi ĝian naturon, elsuĉi el ĝi la mistikan medolon, tiel ke postrestos malplena ŝelo

kiel rito. La genia artifiko estis doni tute alian signifon kaj enhavon al la **Eŭkaristio**; novatempe ĝi estos solena kaj frateca rememorigo pri la Lasta Vespermanĝo, dum kiu Jesuo kreis la centran Sakramenton, ne nur per paroloj sed la postan tagon per konkreta suferegado kaj abomena morto. Neniu miro ke, post kelkaj generacioj la sacerdotoj mem plejparte plu ne kredas je la mirakla **transsubstanciigo**, per kiu la pano nepalpeble transformiĝas al la karno de Jesuo, kaj la vino same al Lia sango. Tamen tute frapaj kaj ne miskompreneblaj estas Liaj paroloj en [Joh.6,52]: "La Judoj do disputis inter si: <Kiel tiu ĉi povas doni al ni sian karnon por manĝi?> Jesuo respondis al ili: <Vere, vere, Mi diras al vi: Se vi ne manĝos la karnon de la Filo de Homo, kaj ne trinkas lian sangon, vi ne havos en vi [spiritan] vivon. Tiu kiu manĝas mian karnon kaj trinkas mian sangon, tiu havos eternan vivon, kaj mi levos tiun [al la Ĉielo] en la lasta tago [de Juĝo], ĉar mia karno [en formo de] pano estas vera manĝaĵo kaj mia sango [kia vino] estas vera trinkaĵo." – Ankaŭ estas la admonaj vortoj de Paulus en [1Kor.11,26]: "Ĉiufoje kiam vi do manĝos tiun ĉi panon [konsekritan] kaj trinkos el la kalico, vi proklamos la morton de la Sinjoro, ĝis kiam Li revenos. Sekve, tiu kiu maldigne manĝos el tiu ĉi pano, aŭ maldigne trinkos el la sankta pokalo, kulpos pri la Sango kaj Karno de la Sinjoro. Oni do ekzamenu sin mem [konsciencon] kaj trinku de la vino kaj manĝu de la pano [estante senpeka]; ĉar tiu kiu maldigne manĝos kaj trinkos, manĝos kaj trinkos sian propran kondamnon, tial ke li ne scipovas distingi la Korpon de la Sinjoro [disde ordinara manĝaĵo kaj trinkaĵo]."

La nova Meso tiamaniere faras el la centra sakramento geamikan fest-kunvenon, simbole ĉirkaŭ Jesuo, dum ĝi estas kaj devas esti sensanga, sed mistike reala, ripeto de Lia elaĉeta morto sur la Kruco ! Tra la jarcentoj okazis pluraj miraklaj demonstroj pri tiu akra vero; mi mencios nur la konsternan transformiĝon — en la 8a jarcento en preĝejo de Lanciano (Italio) — de konsekrita hostio al eltranĉo de homa koro, kaj de la vino al kvin sangoglobetoj, kiuj ĝis la hodiaŭa tago videblas kaj palpeblas sen putriĝo.



Eltranĉo de homa koro,
freŝa ekde la oka jarcento.

Por organizi koncernan komisionon pri la ritoj, Papo Paŭlo 6a — misinformita de modernismaj “konsilistoj” — elektis kaj instalis kiel sekretarion por tiu instituto Annibale BUGNINI, eminentan fakulon pri la ekleziaj ritoj ... sed sambate altranga Framasono en sekreto (kodnomo “Buan”). Tiu ne hezitis tuje enoficigi kiel kunlaborantojn sep ... protestantajn pastorojn, kiuj evidente estis malamikaj al kaj malkompetentaj pri pliparto el la sakramentoj, tute speciale pri la Eŭkaristio.



Annibale Bugnini
(framasona ĉefpiono)



Paulus 6 (Giovanni Montini)



**<u>Rezultatoj</u>**: a) La karaktero de elaĉeta buĉofero malaperis el ĉiuj mestekstoj aŭ religiaj kantoj kaj estis anstataŭigata per interpreto kiel vespermanĝa amkunveno. Tiele la Lasta Vespermanĝo de Jesuo kaj Liaj disĉiploj prenis la lokon de lia Morto sur la Kruco.

b) La altaron oni anstataŭigis per tablo metita frunte al la vera altaro, tiel ke la sacerdoto necese turnos la dorson al la tabernaklo (kelkfoje eĉ sian pugon!). Ekde tiam li ja ankaŭ plu ne estas ĥarisma sacerdoto, oficanta nome de Jesuo, sed nur reprezentanto de “la popolo” en kies nomo li prezidas la ceremonion.

c) La longa benko sur kiu fideluloj kutimis genui por surlange (do sentuŝe!) ricevi la konsekritan Hostion (panpeceto mistike sed reale transformita al la Korpo de Jesuo) oni malmuntis, kaj la “kredantoj” de tiam stare ricevas en la mano panpecon nur memorigan pri la Vespermanĝo kaj kiel nura simbolo pri Jesuo. Eĉ pli grave, ĉar plejparto el la sacerdotoj (laŭ enketoj) plu ne kredas je la transsubstanciigo de la pano, ili do ankaŭ plu ne intencas tion fari, kio igas la ceremonion garantiite senefika sur la spirita nivelo.

d) La seĝoj, klasike konstruitaj por ke oni povu sur ilin surgenui, fariĝis nure sidaj seĝoj, tiel ke el adorantoj fariĝis simple spektantoj kaj aŭskultantoj; de religiaspekta ceremonio.

e) Fine de la ceremonio — plu ne “Meso” (kio signifas “Buĉofero”) sed nur “Eŭkaristio” (kio signifas “Amkunveno”) — la sacerdoto plu ne diras “Iru en paco, la Ofero estas plenumita”, sed nur “Iru en paco” plus iun mem-elektitan afablaĵon. Oni ankaŭ plu ne “celebras” la ceremonion, sed ĝin “festas”;

f) Ĉiuj mestekstoj, precipe tiuj ĉerpitaj el Biblio kaj Evangelioj, kiuj antaŭe estis legataj kaj prononcataj latine — tra la tuta mondo tiel ekzakte samaj — nun estas legataj kaj dirataj en la loka lingvo laŭ tiu aŭ alia nekontrolita traduko. Plu neniu zorgas pri la enhava aŭtenteco kaj la pastro (aŭ eĉ iu anstataŭanto) povas laŭplaĉe interpreti la signifon kaj improvizi laŭ sia mondpercepto.


Restis tiel pli malpli la osto, la karapaco, do la ŝajno, sed ĝi plu ne posedas sian vivodonan medolon. Similmaniere oni fortranĉis en la aliaj sakramentoj ĉiun vertikalan referencon al Dio aŭ al Jesuo aŭ eĉ al la eterna Vivo. Kompreneble ankaŭ konceptoj kaj terminoj kiaj “konvertiĝo”, “Dia graco”, “Diablo”, “Infero”, “Supernaturo”, “Hereda Peko” oni metode eliminis kaj viŝis el la memoro. La longa tradicio, aplikata identmaniere dum preskaŭ dumil jaroj kaj transdonita de generacio al generacio, jen vaporiĝis en rekorda tempo. Lucifero bonege preparis sian lastan ofensivon !

Signifoplena detalo estas ke la tradicia Krucifikso, kiu reprezentas la suferegantan Mesion sur Sia kruco, estas ĝenerale anstataŭata per simpla kruco sen suferanto. Tiu grava kaj memklariga simbolo sekve fariĝis simple nur referenco al ĝenerala senspecifa Kristanismo.




Eble plej nekredeble estas ke tiu tuta, tamen drastega, transformo ene de unudu jaroj ĉien disvastiĝis, ĝis eĉ al plej malgranda vilaĝo de plej malfora lando. Certe rezistis kaj protestis relative multaj pastroj kaj episkopoj en la mondo, sed tiuj protestoj estis aŭtoritate sufokataj el Romo: ĉiu “kredanto” devis humile obei al la decidoj de la “neeraripova” Koncilio. Kion fari, se eĉ ĉiu papo ek de tiu fifama kunvenego kantas la saman kanton ! Tiu fakto per si mem ilustras ĝis kiu grado la hierarĥiaj ŝtupoj kaj institucioj de la Katolika Eklezio estas invaditaj de la apostaca parazito. Ne mirige ke preĝejoj kaj monaĥejoj en rekonrda tempo senhomiĝis kaj devis fermi siajn pordojn aŭ servi alian celon, kaj ke multaj religiuloj senmoraliĝis aŭ simple forlasis sian oficon.

Ne lastvice, la Rom'Katolika Eklezio preskaŭ unuanime, la sinsekvajn papojn ĉekape, suriris la erarvojon de **Eŭkumenismo**, diabla trompaĵo unuaranga, kiu volas ĉiumaniere provi amikiĝi kun ĉiuj aliaj religioj aŭ ideologioj, senrezerve foroferante la propran kredokonfeson, do ankaŭ Jesuon mem kiel unikan Savanton kaj akson de la Homaro. Per pacaj gestoj kaj paroloj, fratecaj kunvenoj, bonvolaj vizitoj kaj interŝanĝado de donacoj, papoj, kardinaloj, episkopoj, pastroj pensas povi tiamaniere, per propraj rimedoj, atingi kaj realigi la belan revon de tutmondaj **UNUECO kaj PACO**, do fakte la promesitan Regnon de Dio.



Preĝejo estiĝis magazeno

Same blinde kiel sincere ili tiel ĝuste asistas la genian planon de Lucifero pri kreo de **Nova Mondordo** sub lia plenpotenco ! Ne venas al ili en la pensoj la antikva romia sentenco kiu avertas: *quam Jupiter perdere vult, prior dementat* = tiun kiun la ĉefdio volas pereigi, li unue mense blindigas.

La eminentaj partoprenantoj rimarkas eĉ ne la nudan kaj krudan fakton ke tiuj interreligiaj kunvenoj, ripetataj jam de duona jarcento (!), ĝis nun alportis nepre nenion pozitivan en la celata direkto, escepte de ripetado de la intertraktoj. Male kaj en realo daŭre abundas sangaj konfliktoj, mizero, trompado, ŝtelado, ĥaoso tra nia tuta planedo. Aparte respondecas la katolikaj papoj, kiuj sinsekve turnis surdan orelon al la alvoko de la Sankta Virgulino, kiu en Fatima 1917 solene promesis pacon al la tuta homaro kondiĉe ke oni amase preĝadu la Rozarion; la "konciliaj" papoj fermis eĉ ambaŭ siajn orelojn. Kiom kandelo kaj lenso valoras, se obstinulo atenti ne volas ?


Eŭkumenisma kunveno dum kiu oni afablege intrparolas, sed neniu partoprenanto malĵuras eĉ unu eron de sia propra religio aŭ kredo.

# 8. Disduigo de la Krucifikso

Se reparoli pri la konciliaj debatoj, la grupeto de tradiciuloj, estante sufiĉe saĝaj por travidi ke ili frontis forte organizitan komploton, estis bedaŭrinde sensignifa antaŭ la majoritato de eŭforiaj naivuloj spronataj de la insid-antaro. Tiuj malmultaj firmstarantoj jam frue dum la sesioj distancigis sin de la giganta entrepreno, komprenante ke ĉiu kontraŭstaro finfine estos vana. Mi devas ĉi-rilate elstarigi du episkopojn: la franca Mgr. Marcel LEFEBVRE kaj la brazila Mgr. De CASTRO MAJER, kiuj decidis memstare kaj sendepende de la roma hierarĥio, savi kaj sekurigi ritojn kaj kredo-konfeson, alidire la **Tradicion**. Kun grupeto de proksimume 250 fidelaj religiuloj sampensaj, il kreis la asocion *Coetus internationalis,* por sekurigi Kredon kaj Eklezion laŭ la malnovaj normoj kaj principoj. Sed ve, ĝi ne longe ekzistis, ĉar Paulus 6a, kiu deklaris la Koncilion fermita en 1965, tiun saman jaron per sia absoluta aŭtoritato ĝin aboliciis.

Ili ja devis obei, ĉar ili staris antaŭ leĝe elektita papo, sed tio ne malhelpis al ili fondi ses seminariojn tra la mondo, por edukadi kandidatojn al pastreco laŭ la tradiciaj normoj kaj la tradicia Kredo. Ĉefas tiu en Ecône (Svisio) estrata de Arkiepiskopo LEFÈBVRE. Tiuj seminarioj jam tuje floris, allogante multajn junajn kandidatojn kiuj, movataj de granda amo al Jesuo, nepre preferis la rigorecon kaj seriozecon de la vertikala akso al la libervagado de la horizontala akso.

Dum jaroj okazis ŝnurtirada lukto inter la tre majoritata modernisma hierarĥio, kun la papoj ĉekape, kaj la firme stara minoritato kun Lefèbvre kaj kelkaj kolegoj ĉekape. Ĉiu el la du partioj nepre opiniis la alian partion skisma kaj hereza, kaj postulis ke tiu (re)integriĝu en la propran.



Marcel Lefebvre (1905 – 1991)

Estintus laŭ racio facilege decidi kiu el la du grupoj pravas kaj reale rajtas nomi sin la vera Eklezio de Kristo, ĉar Jesuo jam havigis mezur-ilon por tio: "Vi rekonos la arbon laŭ ĝiaj fruktoj" [Mat.7,15]. Vidante la putrajn fruktojn de Vatikano Dua, objekitva menso ne hezitos elekti ĝuste, sed ja, oni preferas turni blindan okulon al ĉiuj sanktaj tekstoj kiuj iel tuŝas la nocion de justa kaj severa Patro, aŭ al la Krucifikso kiel sola savo. En tio la modernaj Katolikoj imitas siajn judajn avojn kiuj obstinis turni blindan okulon al ĉiuj bibliaj tekstoj kiuj iel montras al suferanta aŭ malestimata Mesio.

Kulmino venis en la jaro 1988, kiam la altaĝa LEFEBVRE konstatis ke post lia morto la **Pastrofrataro SPPX** plu ne disponos je episkopo por konsekri novajn sacerdotojn. Tiel post kelkaj generacioj lia bela tradicia organizaĵo devis nature kaj lante formorti. (Estis tio fakte ankaŭ la kaŝa espero de la romaj superuloj, kardinaloj kaj papoj.) Tradiciamaj kolegoj jam mortis preskaŭ ĉiuj, kaj li trovis neniun "koncilian" kolegon preta por plenumi tiun gravan taskon. Ripetataj petoj tiurilate ĉe la reganta papo, por ke tiu donu la permeson, restis ĉe malprecizaj promesoj sen fiksa dato. Fine kaj senespere li do decidis mem tiajn enoficigi, eĉ sen permeso de la papo, por kio li ja plene posedis la bezonan ĥarismon, kiel posteulo de la apostoloj. Tiel li do konsekris kvar sacerdotojn selektitaj inter la Frataro.



La novaj episkopoj tradiciaj: Tissier de Mallerais, Williamson, Galarreta, Fellay

La tiama papo, la ĵus elektita Johannes-Paulus 2a, kune kun la kardinalaro, tiel ekfuriozis pro la "malobeo" (neniam esprimita) ke li ne hezitis ekskomuniigi la opstinan episkopon kaj liajn kvar novajn kolegojn. Jen la plej granda kaj forta puno en la Katolika Eklezio, kiu egalas kondamnon de la trafitoj al la Infero !

Tiu reago estis ne nur supermezura, ĝi estis ankaŭ tute simple jure ne pravigebla kaj senfunda, ĉar papo kapablas anatemi nur veran herezulon, tio estas persono kiu malkonfesas tiun aŭ alian establitan dogmon aŭ kiu proklamas novan kaj persistas en tio. Sed jenkaze temis nur pri disciplina malobeo, aŭ eĉ ne, ĉar promeso pri iama kreado plurfoje estis donita … je la Sankta Neniamo. Kio pli estas, la tuta Pastrofrataro neniel intencas starigi apartan eklezion kaj nepre akceptas la papon kiel plej altan superulon. Sed ili ja, kaj jen la amara kerno por modernistoj, malakceptas la

decidojn de Vatikano Du, kiuj cetere ne estas deklaritaj esti dogmoj ! Konfuzego, kiun povas klarigi nur la ĝenerala demona blindigo. Atendebla sekvo estis ke "la tuta mondo" de katolikoj ekde tiam estas konvinkita ke la Pastrofrataro estas evitenda sekto, timenda skismularo. Ili malobeis al la neeraripova Papo, terurege !

Lasu min ripeti ke la fifama Koncilio nepre kaj klare ne volis lanĉi iun ajn novan dogmon, sed volis nur "prizorgi la ŝafaron" en la modernaj tempoj. Se la tradiciuloj forrifuzas dekretojn sen dogme deviga karaktero, ili do ankaŭ ne povas herezi kontraŭ la Kredo. Absurda situacio kaŭzata de emocioj anstataŭ de sobra rezonado !


Estas vere ke Benedictus 16a — la estinta kardinalo Joseph Ratzinger, eminenta filozofo kaj teologo — levis tiun absurdan kondamnon dek jarojn pliposte en 2009, kaj ankaŭ permesis la Klasikan Mesordon kiel "eksterordinara formo samvalida", esperante ke la interrilatoj per tio reprenos kaj la Frataro tamen finfine akceptos Vatikanon Du. Evidente vana espero.

Finfine, ĉe sobra analizado, la mondo hodiaw staras antaŭ **du Katolikaj Eklezioj** same validaj/oficialaj, kaj ambaŭ kun la sama papo ĉekape, volonte aŭ malvolonte. Unu kiu ĵuras nure je la dua ĉefkomando de Dio, kaj unu kiu ĵuras nur je la unua ĉefkomando de Dio. La skismo do trafis ilin ambaŭ, kiel ankaŭ planis tion la Satano. Simbole sed profundreale la Krucifikso, tio estas la Korpo de Kristo, hodiaŭ estas disduigita kaj fakte kaj vee plu ne ekzistas en nia mondo. Ambaŭ partioj lulas sin per la promeso de la Sinjoro, ke Li restos ĉe Sia Eklezio "ĝis la fino de la mondo".

Tiu promeso kaj kuraĝigo en la lasta verso de Mateo, ve, estas tute misklarigata kiel protekto "ĝis la fino de la mondo", dum ĝia vera signifo estas: "ĝis forpaso de la Epoko de Ne-Judoj" [helene: συνθελεια αιων; latine: *usque ad consummationem saeculi*]. Pli konvena kaj konata esprimo estas "Fino de la Tempoj". Mi sufiĉe eksplikis tion en [Vol.6/36.2.1], kaj indikis ke postvivos nur fragmento de la Eklezio, sensignifa kaj ne atentata sed ja vivogarda, kiu plene disfloros nur post neniigo de la Falsa Jesuo kaj ties diktatora regno. Tiu miskredo nepre donas falsan kaj trompan sekursenton kaj memfidon al ambaŭ duonoj de la Skismo. Eĉ la profetaĵaj avertoj, kiujn la Dia Reĝino (plus mistikuloj) donis ĉe Siaj aperoj (precipe en La Salette (Francio) kaj en Fatima (Portugalio) estas priplorinde neglektataj kaj forrifuzataj ĉi-rilate. Miskomprenata kaj misgvida estas ankaw la verso: "La pordoj de la Infero ne sukcesos superforti ĝin [mian Eklezion]" en [Mat.16,18], kiu celas promesi ke la Eklezio neniam malaperos komplete.

Se proponi alegorian bildon, la koncilia eklezio horizontala estas kiel ŝipo kiu navigas laŭ hazardo de la ventoj, sen stirilo, sen kompaso, sen ankro, sen veturplano, sen alia celo ol resti sur la akvoj kaj pruvi sin prava. Dume,

la <u>tradicia eklezio vertikala</u> estas kiel ŝipo kiu pene konservis stirilon, kompason, veturplanon, kaj ankron, sed kiu ĉi-lastan elĵetis en la haveno kaj plu ne moviĝas de tie. Por ambaŭ ekzistas tiele avantaĝoj kaj malavantaĝoj, virtoj kaj malvirtoj kiujn mi provos objektiveme analizi.



**La tradicia eklezio vertikala kontraŭ la koncilia eklezio horizontala**

Certe, la Katolika Eklezio dum sia historio spertis multajn skismojn, tio ne estas novaĵo. Tiuj ĝin vundis kaj malfortigis, sed ne sukcesis ĝin mortigi, ĉar ili ja forhakis nur pli aŭ malpli grandan branĉon de la centra arbo, kiu spite restis staranta. Male, la skismo de la dudeka jarcento krude splitis la trunkon mem kaj tiel efike ĝin kondamnas al agonio. Jesuo plu ne estas ĉe Sia Eklezio; ĉi-lasta troviĝas en la “horo de mallumo” kaj devos trasuferi la Pasionon — la disĉiplo ne estas pli valora ol la Majstro !

# 9. malvirtoj De la Koncilia eklezio


Kiel jam sciate, la horizontala trabo de la Krucifikso simboligas la duan ĉefordonon de Dio: “amu vian proksimulon kiel vin mem.”

La oficiala Eklezio — papoj, kardinaloj, episkopoj, pastroj, kaj laikaro — forhakis la horizontalan trabon por ke ĝi utilu kiel fundamento por glora renovigita Eklezio, vojaĝanta al utopia Mondpaco. Tio estis la celo — ne: la pretendo, la logaĵo, la kaptilo — kiun pliparto kvazaŭ ebriigite aklamis kaj akceptis. Sed horizontala trabo per si mem povas nur fali al la grundo, al la plej malalta ŝtupo kaj resti tie kuŝanta, sen ombro de ligo al la Ĉielo. Fakte, kun refero al la altaĵo de Golgotha, la origina starloko, la horizontalulo ne povis ne komenci ruladi malsupren, ĉiam pli kaj pli for de la vertikalulo, kiu male kapablas plu stari en sia loko kaj montri al la Ĉielo; kvankam ĝi perdas sian normalan evolueblon. Rezultis ne eviteble ke tiu forhako disde la direkto al Dio, rompis la spinon de la rigora hierarĥio ĝistiama, por enkonduki anstataŭe ŝajneklezion, kiu ekde la sesdekaj jaroj <u>metode</u> malfortigis kaj obskurigis la devon ami Dion super ĉio, koncentrante ĉiun atenton kaj fortostreĉon al malmuntado de ĉiuj muroj, principaj kaj konkretaj, kiuj estis dum tiom multaj jarcentoj apartigintaj la religion de Romo disde la ceteraj. Disfaldiĝis la flago de revolucio, kiu puŝis ekumenismon al paroksismo, senbremsa, senlima. Lasita al si mem, tiu strebado al kunfandiĝo kun ceteraj religiaj grupoj, estas kvazaŭ balono laŭvole ŝveligebla kaj laŭvole kolorigebla.

1) Tiele oni povas etendi amikajn manojn al ĉiuj religioj kaj ideologioj de la mondo, sub la iluzia preteksto ke “**ĉiu religio posedas sian parton de la Vero**” kaj ke kunfandante tiujn ideologiojn oni atingos tutmondan unuecon kaj tutmondan pacon. Invitante reprezentantojn de plejeble multaj “konfesoj” al tiel nomata Ronda Tablo, oni per dialogado certe iam (baldaŭ) atingos tutmondan inter-kompreniĝon kaj pacon. Ne ĝenas la konciliajn hierarĥianojn, ke tio rekte kuras al bunta religia mikspoto de **sinkretismo**, en kiu la Katolika Eklezio pli kaj pli perdas sian identecon, sian rektan mistikan ligon kun Jesuo. Kiel mi pli antaŭe jam menciis, ĝis nun ankoraŭ neniu esperiga religia planto elkreskis el tiuj intertraktoj. Male, sur la fundamento de la malnova “neŭtrala” **humanismo** propagata de framasonoj kaj la ĝenerala konvinko ke “<u>LA VERO simple ne ekzistas</u>”, ili nur konstante alportas ŝtonojn por konstrui la **Novan Mondordon** de Satano (kun unu mondreganto, unu mondregistaro, unu mondvaluto, unu mondreligio). Vaporiĝis la specifa testamento kaj ordono de Jesuo: “Iru kaj instruu ĉiujn popolojn, ilin baptante en la Nomo de la Patro, la Filo, kaj la Sankta Spirito.” [Mat.28,19]. Estas

samokaze skandala malagnosko de kaj perfido je la miloj da misiistoj, viraj kaj virinaj, kiuj tra la tempo heroe oferis sian vivon por plenumi tiun gravegan ordonon de la Mesio.

2) Kiel jam dirite, kolapso de la vertikala direkto al Dio rompis la spinon de la rigora hierarĥio tradicia, senpere deveninta de Jesuo, por enkonduki **demokration**, strikte homan kaj horizontalan vivoprinciparon, la leĝon de la plimulto en decidofarado. Iame ĉiu apostolo respondecis tute sola pri la regiono kiun li kristanigis — kvankam okaze post interkonsiliĝo kun Petro kaj la Sankta Virgulino (tiel!). Tra la jarcentoj ĉiu episkopo — posteulo kaj anstataŭanto de apostolo — aŭtonome estris sian episkopejon kaj siajn subulojn: pastrojn, gemonaĥojn, kaj gelaikojn. Sed hodiaŭ ĉiuj episkopoj de donita lando devas asociiĝi en tiel nomata "**Episkopara Konferenco**" kun tiulanda kardinalo kiel prezidanto, kaj decidi per simpla voĉ-donado pri iu religia aŭ morala problemo en la koncerna lando. Fatala rezulto estas ke plu neniu grava danĝero kontraŭ la religio aŭ la moralo tiel trovas respondon, malpleje solvon. Al kio tiu horizontaleco povas konduki liveras la abomena okazaĵo en Belgio, kie la registaro (precipe la "kristana" partio !) decidis en 1990 ke abortigo de beboj estu leĝe permesata, dum la absolute religifidela reĝo Baldŭino nepre rifuzis subskribi tiun anateman leĝon, je risko perdi sian tronon. Li staris tragedie sola inter la religiaj aŭtoritatuloj, ĉar la episkopara konferenco sub prezidado de Kardinalo Danneels opiniis ke ili "ne kompetentas en politikaj aferoj". La severa malpermeso de Dio "vi ne mortigu" fariĝis evidente nur mito post la Koncilio !



Pravas kiu plej laŭte krias

3) Fakte agis je la avantaĝo de tiu sapea demokratiigo la koncilia dekreto pri la naturdotita **libera volo** de la homo, kiu havigu al li ankaŭ la rajton mem decidi kion pensi kaj kion fari, "agi laŭ sia propra konscienco". Tion faris jam Adamo, kun la konata rezulto. Oni eĉ plu ne konsideris ĉu tiu persona volo estas bone informita pri la bezonaj faktoroj aŭ lernis sobre kaj objektive rezoni aŭ scias kion Dio kaj Eklezio instruas. Precipe pri la dek ordonoj kaj malpermesoj de Dio plu ne estas parolo ! La laste elektita papo, Franciscus — laŭ mi rekta antaŭanto de la Falsa Mesio — tiurilate ne ĉesas aserti ke ĉiu homo bezonas nur agi laŭ sia propra konvinko, nomata konscienco, ajne en kiu kulturmedio

aŭ religia sistemo li aŭ ŝi edukiĝis, kaj ke se ĉiu tion faros aŭtomate aperos paco en la tuta mondo ! Ja kulmino de absurdeco, ĉar tiamaniere eĉ la islamaj ĝihadistoj tute prave ekstermas Kristanojn kaj aliajn "ne-kredantojn" kvazaŭ temus pri brutoj. Mi ne kapablas distingi ĉu tio estas simpla stulteco, enorma blindeco, aŭ rekta frenezo, sed normala kaj racia rezonado ĝi certege ne estas ! Evidentas en tiu kadro, ke la Dek Ordonoj de Dio estas oficiale ekzilitaj al la arĥivoj, kaj ke ilin hodiaŭ anstataŭas la mem elpensitaj "**Rajtoj de la Homo**", universala konstitucio transprenita el la sanga Franca Revolucio. Ne mirige en tiu kadro ke eĉ la Papo mem, kune kun la Sanktaj Skribaĵoj, devas perdi ĉiun aŭtoritaton, kaj ke ĝis la plej sensignifa ekleziulo rajtas improvizi kaj prediki laŭ propra gusto. Ĉu ne la Koncilio deklaris la Eklezion "Popolo de Dio survoje" —sen mencii la iratan direkton aŭ celon ? Sacerdotoj plu ne estas vokitoj de Dio, agantaj en Lia nomo por gvidi la homajn animojn al la Ĉielo kaj esti transdonantoj de Liaj gracoj (fortigiloj) por la sama sankta celo, sed ili fariĝis simplaj ceremoniestroj por organizi kaj "prezidi" kunvenojn de la "kredantoj", jen solene, jen amikece, jen eĉ sprite kaj amuze.



**La Rajtoj de la Homo**

# X. Malvirtoj de la Tradicia Eklezio

Dum kredo kaj ritaro de la prekoncilia Rom'Katolika Eklezio feliĉe konservatas sen difektoj aŭ modifoj en la **Pastrofrataro Pius X** (FSSPX), la Tradicia Katolika Eklezio, vide al la Koncilia Katolika Eklezio, la skisma disduigo de la Krucifikso tamen kaj bedaŭrinde trudis al ĝi neatendite la karakteron de fermita sekto, de obstina farizeismo, kvankam la organizaĵo oficiale plu akceptas la regantan papon kiel superestron, anstataŭiston de Jesuo. Spite sian konservon de la Tradicio, ĉefregas ĉe ili **kvin eraraj principoj**, tute propraj, validantaj en praktiko kiel severegaj dogmoj, sed kiuj neniel troveblas en la normala kredokonfeso [Vol.6/37.2.11]. Tiuj kredend-aĵoj, kiel dirite, estas ja simple hereditaj de la avanaj epokoj, sed nun ke estas malaperinta ĉe la "vertikaluloj" la interna evolukapablo, rezervita al la horizontala trabo, kion ili ne konscias, forto turniĝis al malforto, virto al malvirto. Jen ili konsiderataj iom detale.

1) **Romo estas la poreterna, unika, kaj absoluta centro de la Eklezio de Jesuo**; ĉiuj aliaj kristanaj eklezioj kaj komunumoj aŭ centroj iam nepre devos aliĝi kaj konvertiĝi al tiu. Nu, la fakto, ke ambaŭ la ĉefapostoloj, Petrus kaj Paulus, kiuj konsistigas la du spiritajn kolomojn de la katolika eklezio, martire mortis kaj entombigatis tie, ne liveras sufiĉan argumenton por atribui al Romo — la iama ĉefurbo de la pagana Romena Imperio — tian garantion. Vere, la impona preĝejo Sankta Petro (ties ĉefaltaro) estas konstruita ekzakte super la relikvoj de la granda apostolo kaj delegito de Jesuo, realigante spirite kaj materie la promeson de la Mesio ke Li konstruos Sian Eklezion super li kiel sur rokon (Petrus = Kefas = rokŝtono). Sed materia cirkonstanco povas ricevi materian ŝanĝon. Sufiĉos — kaj ankaŭ okazos tiel — transporti la korpajn restaĵojn de la sanktegulo al Jerusalemo, por ke ankaŭ tiu portempa centro transloĝiĝu al sia vera hejmo. La promeso de Jesuo same restos valida. Tio ne estos katastrofo, ĉar jam sufiĉos ke la kultindaj restaĵoj de Paulus, "la Apostolo de la Paganoj", postrestu tie, por konservi Romon kiel (duavican) spiritan mondocentron.

2) **Latino estas la sanktege sankta poreterna lingvo de la Eklezio de Jesuo; ĉiuj aliaj kristanaj eklezioj iam devos adopti tiun por ritaj aplikoj**. Certe, pro la multaj jarcentoj de ĝia uzado kiel lingvo de la ritoj (sakramentoj), pro la preciza kaj fidinda traduko kaj enformuligo de la Sanktaj Skribaĵoj kaj de la Kredo, kaj eĉ pro pliparto el la filozofiaj analizoj de tiu dia fundamento, Latino akiris respektegindan pozicion. Sed tio ne malhelpas ke ĝi estas unue ne la originala lingvo uzita de la Mesio, nek de Liaj apostoloj, nek de Liaj evangeliistoj, kaj due ke ĝi estas

en praktiko ekstreme komplikita lingvo antikva, kiun oni sanmense ne rajtas trudi al nepre ĉiuj popoloj de la aktuala kaj estonta mondoj ! La sola reale trudebla komunikilo por tiu celo, treege facile lernebla, estas nia internacia lingvo Esperanto, kaj estas ankaŭ tiu-ĉi kiu efektive transprenos la grandan taskon lingve unuigi la ŝafaron de la Dia Regno, kvankam ties oficiala apliko postulos evidente grandan kaj rigoran tradukadon de ĉiuj religiaj kaj teologiaj tekstoj de la Eklezio enhave konservendaj, memorige pri la Septuaginto.

3) **La latina ritaro (romena) estas sole valida kaj iam akceptatu de la tuta mondo.** Male kaj envere, tiuj sanktaj ritoj, severe preskribitaj ĝis en plej bagateletaj detaloj, povos kaj devos enkorpigi ankaŭ la esence validajn kutimojn kaj formulojn de la aliaj kristanaj eklezioj, precipe de la ortodoksaj, ne forgesante la iamajn judajn el kiuj la Eklezio de Jesuo ja senpere devenas kaj heredas, konsistigante la definitivan kodekson tutmondan. Certe eblas ĝin remuldi sen perdi la sanktan enhavon.

4) Rokfirma konvinko ke **la tradicia Katolika Eklezio estas tute ne detruebla** kaj ke ĝi estas nuntempe sekure vartata en la Frataro FSSPX, atendante ke la Koncilia Eklezio revenos al sia fonto. Nek unuavice la eklezia historio, kiu plenegas je atakoj, malmoralaĵoj, uzurpado, misfaroj, detruoj ĉiuspecaj, nek duavice la sennombraj martiroj kiuj nun ĉiutage estas persekutataj, torturataj, murdataj en neokcidentaj mondopartoj, nek triavice la interna amasa koruptiĝo, apostateco, kaj disfalo de la Eklezio sub papa estrado en precize la okcidentaj centroj, sukcesas trabreĉi tiun mensan betonmuron. Kiel ajn minacaj, la nudaj faktoj ne sukcesas trabreĉi blindan memfidon. Konsentite, la sango de la multaj martiroj, precipe en islamaj landoj, estas semo por spektaklaj kaj relative multnombraj konvertiĝoj en ĉiuj kulturoj, sed tiu feliĉiga aspekto estas bedaŭrinde nur parteto de la tuta pentraĵo, kaj certe ne anonco de baldaŭa bela releviĝo. Tiu memblindigo fakte rezultas el la erare interpretata promeso de Jesuo, ke Li (el la Ĉielo) protekte apogos Sian Eklezion, menciita en la lasta verso de Mateo. Tion mi pli supre jam eksplikis. Tute male, la Eklezio de Jesuo, hodiaŭ agonianta, devas nepre morti tiel ke ĝi ŝajnos malaperinta de sur la Tero. La espero kuŝas ĉe malgranda resto, ĉe ne detruebla radiko, ne ĉe la aktuala instituto kaj reprezentantoj, el kiu ŝprucos glora nova planto.

5) La kiel dogmo proklamita kaj proklamata aserto, **ke la epoko de Diriveloj finis per la Apokalipso** de la apostolo Johano ! Pliaj aŭ pluaj malkaŝoj de diaj sekretoj do plu ne povus aperi ! Tion rekte kaj forte kontraŭdiras pluraj faktoj. Unuavice, jam la sana menso vidigas ke la miloj da jaroj de la historio de la Israelidoj postulus almenaŭ enciklopedion por raporti pri nepre ĉiu okazintaĵo de la Malnova Ligo kondukonta al veno de la Mesio. Same pri eĉ nur la tri jarojn de la predikada ĉirkaŭvagado de Jesuo en Palestino, se raportote tagon post tago. [En tiu rilato la vizioj de Anna-Catharina Emmerick estas grandioza trezorkesto, kvazaŭ "kvina evangelio", ĉar ili ĝuste provas

raporti tagon post tago de Lia vivo, ĝis enuo.] Duavice tiu sama Johano mem konkludas sian evangelion [21:25] jene: "Estas ankoraŭ multe pli kion Jesuo faris; se tio priskribatus detale, tiam ŝajnas al mi ke la tuta mondo ne povus enteni la librojn kiuj pri tio skribeblus." Triavice, eĉ Jesuo mem instruis la nekompletecon de la Kredo, dum anoncante sian morton kaj foriron en Joh:16.12: "Multon pli Mi havas por diri al vi, sed vi ankoraŭ ne kapablas tion elporti. Sed kiam venos Tiu, la Spirito de Vero, tiam Tiu kondukos vin al la plena vero, ĉar Li ne parolos el Si mem, sed diros tion kion Li aŭdas, kaj anoncos al vi estontajn eventojn." Iuj provos riposti ke Jesuo ankaŭ diris en Joh: 14,26: "La Helpanto, kiun la Patro sendos en Mia nomo, Li al vi instruos kaj memorigos ĉion kion Mi diris.", kvazaŭ tio kromsignifus "kaj nenion pli". Sed … Jesuo diris ankaŭ la supre cititajn parolojn de Joh.16,12 ! Do estas kompleta stultaĵo pensi ke la oficiala Kredo de la Eklezio, precipe ekde la Koncilio de Trente, plu ne kapablus evolui en la senco de alporto de novaj perspektivoj, novaj komprenoj, novaj detaloj, ankoraŭ ne menciitaj en la Sanktaj Skribaĵoj. Prisilento ne egalas al ne-ekzisto ! Mi aludas precipe ĉion kio rilatas al la Sankta Virgulino kaj Ŝia elstara rolo en la Savhistorio. Kaj fine, ĉu la sinsekvaj dogmoj, tra la jarcentoj proklamitaj de la Eklezio, ne atestas ĝuste pri tia kreskado kaj komplet-igado !? Vere, la Helpanto malkaŝas nur paŝon post paŝo laŭ la kresko de la homa sciaro kaj de la homa rezonkapablo (komprenkapablo), kio nepre ampleksas la progreson de ankaŭ ĉiuj disciplinoj ekster la Biblio, kiuj necesas por ke ni "povu elporti" la novajn rivelojn ! Nura kaj nepra postulo estas, ke ĉio nova devas tute konformi kun la tradicia Kredo. Nu, tiu promesita veno de la Dispirito staras hodiaŭ sursojle, kvankam meze de grandaj tumultoj.

Enfermi sin en rigideco de la Leĝaro, do en la certeco de tio kion la Eklezio jam scias, kaj ŝtopi la orelojn al tio kion ĝi ankoraŭ povos / devos lerni kaj atingi, estas tute farizea mensostato, kiun Jesuo abomenis ! La ĉefverko de Kardinalo Neŭman — pri evoluado de la dogmoj — ŝajnas bedaŭrinde ne ekzisti por la Pastrofrataro, cetere tiel laŭdinda.



**Romo kiel spirita mondocentro**

## Ambaŭpartia blindeco

Tiuj nepraj konvinkoj de la Pastrofrataro, kiuj eĉ ne estas ĉe ili pridiskuteblaj, evidente igas ilin komplete blindaj por la reala skisma situacio (kun du jure egalaj partioj) kaj por ebla estonta evoluo. Do, tie kie la “Koncilia Eklezio” — konsiderata tutmonde kiel sola inda reprezentanto de Katolikismo — komplete ruiniĝas kaj morale putriĝas pro senbremsa evoluado al ĉiuj direktoj samtempe, tie la “Tradicia Eklezio” frostiĝis al mistike senviva komunumo, kvankam ĝuste ĝia senkompromisa sinteno facile varbas junajn pastrokandidatojn, kiuj ja aspiras solide fiksan spiritan rumbon en sia vivo, eĉ se tiu estas frostita.

Baza diferenco inter la du partioj estas do ke la Koncilia Eklezio eraras pri esencaĵoj, dum la Tradicia Eklezio eraras pri akcesoraĵoj.

Se situigi la Krucon en sia origina loko, la altaĵo de GOLGOTHA, la horizontala trabo ne nur falis altere por resti tie kuŝanta, sed ĝi komencis ruliĝadi malsupren pli kaj pli for de la vertikala trabo, kiu restas senmova en sia loko.

La ruza plano de Lucifero, disfendi la Katolikan Eklezion, do eksterdube sukcesis. En la pontkapo de la fatala Koncilio li povis instali ĉiujn siajn bateriojn, kiuj nun estas pafantaj ĉiuj samtempe por la definitiva ofensivo. Estas neeble determini precize en kiu momento aŭ en kiu medio li tiun lanĉos, nur ke ĝi estas sursojle kaj ke ambaŭ duonoj de la skismo pereos, preskaŭ sen lasi spuron. Mi nur povas kaj volas trakti kelkajn aspektojn de la kompleksa infera militiro kaj iliajn konsekvencojn.

# XI. V O J P R E P A R O  P O R  S A T A N O

## 1) <u>La Profeta Papolisto de Sankta MALACHIAS</u>

Temas pri listo de venontaj papoj, kiun vizie kunmetis Sankta MALACHIAS (1094-1148) arkiepiskopo de Armagh en Eirujo, kiun ege laŭdis Sankta Bernardus el Clairvaux, en kies brakoj li mortis — en la precizaj tago kaj horo de li mem profetitaj.

En tiu listo de 112 (por li) estontaj papoj ĝis la tute lasta, ne konante iliajn nomojn kaj regoperiodojn, li ilin karakterizis per <u>latinaj devizoj</u>, kiuj referas jen al simbolo en la blazono, al loko aw regiono de naskiĝo, al familia nomo, al evento dum la regado, aŭ similaj detaloj. La pocento da ĝustaj karakterizoj efektive identigeblaj por ni aktualuloj, estas tiel alta — ĝis tri kvaronoj — ke eĉ neŭtralaj raciismanoj agnoskas la neklarigeblon de tiu dokumento; ĝi estas "statistike signifa". Neniu komparo kun ekzemple la furoraj kvarversoj de Nostradamus. En [Vol.6/36.3.2] mi traktis relative detale la seson apartenantan al "la fino de la tempoj" kun iliaj ŝlosilvortoj. Tie ĉi mi do bezonas trakti nur la lastajn du, nome **Benedictus 16** kaj **Franciscus 1**.

Sed jen aperas <u>perfida tubero en la afero</u>. Se Benedikto reale estus la antaŭlasta el la listo de papoj, li estus *Glori* olivae (kiu montras al la reveno de Elija). Post li devus do surtroniĝi *Petrus Romanus* post kies morto necese revenus Jesuo ! Do, se apliki la nombradon de tiu listo, taŭpe blinde, kaj kredi ke la abdiko de RATZINGER estas <u>vera</u> foriro de tiu papo, valida ankaŭ en la Ĉielo, oni falas en ruzan kaptilon ! Tiukaze BERGOGLIO ja iĝus la tute lasta papo en la listo, kio implicus ke neniel kaj neniam estus parolo pri la Antikristo, kies baldaŭan alvenon mi tiel arde komentas ! Bonkonantoj de la listo tiel efektive kredus post li je la Glora Reveno, anstataŭe bonvenigante la Inferulon. La kombino — ne, la intrigo — de abdiko plus novelekto estas nenio alia ol granda trompo de la infera Majstrotrompisto. Ree kaj sukcese Lucifero aplikis sian artifikon de disduigo, jenkaze farante du papojn el nur unu. Post duopigo de la Eklezio, nun <u>duopigo de la antaŭlasta papo</u> ! La memeksigo de Benedikto estas en vero ne akceptebla kaj ne akceptenda, nek mistike nek eĉ praktike !

Mistike ne, ĉar same kiel konsekrita pastro ne kapablas demeti sian akiritan ĥarismon kiel ĉemizon — *sacerdos in aeternum* — spite propravolan forlason de sia ofico aŭ punekzilon fare de liaj superuloj, tiel same papo, se leĝe kaj regule elektita, ne kapablas demeti sian eksterordinaran ĥarismon. Li ja povas demisii kaj forlasi sian tronon; neniu povas lin malhelpi en tio, sed en la Ĉielo lia abdiko ne ricevos aproban stampon. Por mi estas klare ke Benedikto rezignis sian altan postenon ne nur pro korpa kaj mensa kaduk-

iĝo, kio estas la oficiala motivo, sed multe pli pro tio ke li plu ne vidis eblecon restaŭri la Katolikan Eklezion, splititan kaj ruinigatan pro la Dua Vatikana Koncilio. Sendube estis tia restaŭro lia intima deziregо, kiel manifestas unuparte liaj pluraj invitoj al la Pastrofratаro akcepti V-2 kaj levo de la stulta anatemo kontraŭ ili, kaj aliparte lia projekto pri "Reformo de la Reformo", en kiu li proponas singardajn restarigojn. Vidu ankaŭ lian paroladon pri "Hermeneŭtiko de la Kontinueco" — en kiu li vane provegas pruvi ke okazis neniu rompo en la jarcentojn longa tradicio de la Eklezio. Fajro kaj akvo ne estas akordigeblaj. Kia frakasa seniluziĝo post multaj jaroj da klopodado ! Li estis kaj restis tro forte ligita al la fatala kaj katastrofa koncilio sendogma, kaj pensis eble ke nova posteulo pli bone sukcesus ol li ? Krome estas ankaŭ la ne sanigebla interna korupto de la "Kurio", la vatikana parlamento, en kiun jam delonge enfiltriĝis framasonoj kaj komunismaj agentoj sekretaj, jen sub la vesto de kardinalo, jen de episkopo, jen de simpla pastro. Johannes-Paulus Unua cetere perdis la vivon, venenigita, ĉar li malprudente anoncis en publiko sian intencon komplete purbalai tiun koruptan stalon, precipe kiom koncernis la financajn fraŭdojn.




**1 papo + 1 papo = 1 papo**

Tiom pri la mistika flanko, sed signifoplena indiko ke la memvola eksiĝo ankaŭ en praktiko estis nur lerta manovro por ŝovi la pezegan papan respondecon sur aliajn ŝultrojn, estas ke la "eksulo" senĝene plu portas la blankan robon de papo kaj ne hezitas regule interkonsiliĝi kun la "novulo", dum li jure kaj logike ekrajtus nur je vestaĵoj de kardinalo aŭ eĉ de episkopo kaj, super ĉio, devus restadi diskrete for el la Vatikano !

Rilate al la novulo, la inaŭguraj paroloj kaj agoj de Francisko klare demonstras ke li neniel intencas reformi la Eklezion direkte al la Tradicio, sed daŭrigos sur la sama horizontala vojo de la koncilia eklezio. Plurrilate lia karaktero similas al tiu de la organizinto de Vatikano II, papo Johannes 23, kiu ankaŭ preferis mildecon, kompatemon, simplecon anstataŭ severecon kaj rigorecon, Dion de Amo anstataŭ Dion de Justo. Li tute ne montras sin preta imiti sian nompatron Sankta Francesco, kiu ja "rekonstruis la eklezion" pro peto de Jesuo. Se oni atente ekzamenas liajn eldirojn, aperas

ne malofte ke li parolas per splitita lango, dirante jen tion ĉi kaj aliloke la malon. Li ankaŭ scipovas majstre manipuli la amasmediojn, pere de ties ĵurnalistoj, lasante ilin aŭ eĉ kaŭzante ilin interpreti liajn opiniojn laŭvole. Liaj multaj agoj de humileco, ĉu sinceraj ĉu intencaj, garantias al li grandegan simpation kaj en rekorda tempo li tiel fariĝis nenormale populara en preskaŭ la tuta mondo ! Tio estas malbona signo, se ni memoras la admonon de Jesuo: "Ve al vi, se la homoj vin laŭdas !" [Luk.6,26]. Due li ne ĉesas aserti ke ĉiu homo rajtas kaj devas agi nur laŭ sia propra koncienco, kaj ke tiel la mondo pliboniĝos. Konante la kadron en kiu li tion




**"Ve al vi, se la homoj vin laŭdas !"**

diradas, nome modernisme, tio egalas al diri ke ĉiu povas agi laŭ siaj propraj konvinkoj, eĉ do teroristoj kaj la Boko Haram. Aŭ alivorte: ne ekzistas objektiva vero (la Dek Komandoj) law kiuj homoj devas konduti. Trie li kolektis ĉirkaw si ok kardinalojn kiuj pensas idente kiel li, tieldire por reformi la Kurion — t.e. la Parlamenton de la Katolika Eklezio, kiu jam delonge bezonas reorganizon kaj sanigon — sed en maniero kiu povus tre facile rezulti en abolo de la sendependeco de la Kurio, tiel ke la papo kapablos regadi tute diktatore, sen ebleco je kontraŭstaro fare de iu ajn en la instituto. Kvare li en sistema maniero malmuntas ĉion en la liturgio kio aperas luksa, protokola, pompa. Tio aspektas al la mondo kiel granda persona humileco kaj ŝato de povreco, sed tio samokaze forprenas la solenajn elmontrojn de adoro kaj honorigo al la Digno de Dio ! Paralele li emfazas solvalidecon de la Nova Mesordo en kiu la sacerdoto turnas sian dorson al la tabernaklo kaj kelkajn fojojn eĉ sian pugon. Kaj kvine li ne preterlasas okazon por furiozi kontraŭ Tradiciulojn kaj ilin bojkoti kiom eble. Tio nete kontraŭas al la sinteno de lia kolego. Li diras kaj rediras ne kompreni kiel junaj homoj povas ŝati la Tradicion. Evidente estas dorno en lia okulo ke la Pastrofrataro hodiaŭ jam nombras preskaŭ 600 sacerdotojn, pliparte junaj kaj entuziasmaj, kaj ke iliaj seminarioj plenas je ankoraŭ pliaj novaj kandidatoj. La nova papo tiamaniere agas kiel agus la Ĉefdemono, nome kiel lertega trompisto, kiu ŝajnigas sin milda kaj amema gvidanto de la ŝafaro, sed kiu kaŝe preparas ties pereon. Li mem tamen ne eskapos persekuton kaj murdon, ĉar la parteto de la sekreto de Fatima, kiu estis finfine tamen publicita — akorde kun manpleno da similaj aŭguroj — profetas elpelon de la papo el Romo kaj kruelan morton, kune kun amasego da ekleziuloj kaj Kristanoj. Tio ne povas ne okazi, por ke la Antikristo povu

aperi [Tes.2:1,6]. Bedaŭrinde, mi ne vidas ĉu tio okazos pro invado de islamaj hordoj, ĉu pro ekiro de la tria mondmilito, ĉu pro ankoraŭ alia socireligia konfliktego.

Tiele ni havas papan duopon anstataŭ du papojn, kaj la vere lasta papo de la profeta listo aperos nur post apero kaj regno de la Falsa Mesio !

**2) La falsa Profeto, falsa Jesuo, falsa Kristo**

La biblia historio de **Adam kaj Eva**, la unua homparo de *Homo sapiens* en la Paradizo, estas bonkonata, sed bedaŭrinde ankaŭ ofte rigardata kiel mito. En [Vol.5/35.1] mi sufiĉe detale analizis tiun temon en lumo de biologiaj donitaĵoj same kun teologiaj donitaĵoj. Tie ĉi mi reprenos nur ilian katastrofan pekofalon kiu iĝis por ilia tuta posteularo la **Hereda Peko** kaj kiu ĉasis ilin kaj nin el tiu feliĉa vivostato. Pli ol loko tiu paradizo ja estas stato de absoluta bonfarto por la tuta Naturo, al ni apenaŭ imagebla. Laŭ la viziulino EMMERICK, la Paradizo cetere ne estas neniigita de Dio, sed jes forŝovita al la rando de spaco kaj tempo, kie ĝi restas per spirita umbiliko ligita al Tero, kaj eĉ pli specife al iu sekreta valo de la Himalaj-montaro. Kurioza aserto, se memori la antikvan legendon pri tiea Ŝangri-La. Ŝi mencias krome ke tie loĝadas la grandprofeto Elija kaj la arkipatriarko Henoĥ, ambaŭ ne mortintaj sed tie atendantaj dian ordonon por reiri al Tero.

Ĉe sia elpelo el tiu Ĝardeno de Feliĉo, la malfeliĉega kaj sufereganta Adam tamen ricevis konsolan mesaĝon ke iam venos purega Junvirino kies Posteulo reestablos la perditan Paradizon [Gen.3,15].



*Nuestra Señora de Guadalupe*

Nu, tiu pekofalo lasis profundan spiritan vundon en nia homa naturo, kiu precipe igas nin ludopilkojn por la Satano, suferkapablaj kaj mortemaj. Nia tamen ne forviŝebla inhera deziro al feliĉo — kiu mem povas facile turniĝi al memaflikto kaj eĉ memdetruo — estas enfunde aspiro al reakiro de la Paradizo. Tiu aspiro brulas en ĉiuj homoj, ajne de kiu raso, kulturo, aŭ tempo, kvankam ĝi bedaŭrinde povas akiri groteskajn esprimojn. Sed same vivas en la koro de plej sentemaj personoj la kredo kaj espero je iama Savonto el la suferoj kaj malfeliĉoj de la ĉiutaga vivo. Por la Aztekoj estis Quetzalcoatl, por Hindoj estas la lasta avataro de Kriŝna, por Budhistoj kaj Teozofoj kaj analogaj esoteruloj la Maitreja, por Islamanoj estas Mahdi, por Judoj kaj Kristanoj estas la Mesio.

Tiamaniere mi revenas al la asimptota tempokurvo je kies pinto atendas ĝuste tiu Promesito kiu revivigos la Paradizon. Sed ve, kiel pli frue menciite, antaŭ ol Tiu venos ruzega kaj potencega uzurpanto, Lucifero mem — ĉu kiel posedata viro (la Maitreja?) ĉu kiel la Satano en formo de palpebla viro. Pro la aspirado de generacioj, eksplicite aŭ nur obtuze sentata, estos facile al li altiri ĉies atenton kaj favoron, ĉies admiron kaj adoron.

Konforme al la anoncoj en La Salette, <u>li estos filo de juda prostituitino kaj kristana episkopo</u>, kredeble naskita en Israelio aŭ eĉ en Jerusalemo mem. Esti filo de judino validas en judaj komunumoj kiel esti samrasano. Tiel per unu sola aso li varbos jam la tutmondan judaron por si, kun ebla escepto de la minoritato de Mesianaj Judoj kiuj akceptas Jesuon kiel sian Mesion.

Varbi la judaron egalos ankaŭ varbi la financistajn mediojn tutmonde, precipe en Usono. Kaj tra tiu pordo li certos pri la apogo kaj adoro de la <u>framasonaj medioj</u>. Ties delonga strebado ja estas kion oni nuntempe kutimas nomi **La Nova Mondordo**. Por tiun ĉi realigi, ĉiuj bankoj tra la tuta mondo, aŭ almenaŭ ties plejparto, intime interrilatas. Ilia komuna fincelo certe ne estas florigi la landajn aŭ mondajn ekonomiojn sed male tiujn subfosi ĝis okazos tutmonda krizo. En la tridekaj jaroj de la pasinta jarcento tio sukcesis, sed la tempo por vera finvenko ankoraŭ ne estis veninta. Estis nur antaŭplado. Komence de nia propra jarcento okazis la dua, sed ankaŭ tiu ne atingis la kulminon. Tria ofensivo estos decida.

Unu el la plej riĉaj, se ne la plej riĉa, financisto el la moderna tempo kaj framasono estis John D. ROCKEFELLER (1839-1937), kiu ne hezitis malkaŝe eksponi la strebon de la sekreta societaro jene: "*We are on the verge of a global transformation. All we need is the right major crisis and the nations will accept the New World Order.*"




Nova Mondordo de Satano

Tiu ĉefkrizo estos tute simple la komplota kolapso de la usona Dolaro kiel tutmonda valuto, ĉar ekde 1944 la valutoj de ĉiuj grandaj landoj pere aŭ senpere estas al ties valoro ligitaj kaj do kune falos en palpebrumo, iĝante senvaloraj. La Dolaro, kiel sola devizo, ja ankoraŭ kalkulatas per aŭ apogeblas kontraŭ ormetalo en la Centrala Banko de Usono, sed tiu kolapsos kune kun ĉiuj ceteraj bankoj en- kaj eksterlande. La financistoj mem (Klubo BILDERBERG) kompreneble sin antaŭŝirmas per amaso da interŝanĝeblaj provizoj kaj abunda nutraĵo kaj ĉio necesa en ŝirmitaj restadejoj.

Estas ne malfacile antaŭvidi ke tiam sekvos abrupta ekhalto de la ekonomio, de transportado kaj komunikado, de energiprovizado, eksplodo de malsatego, soifo, gigantaj tumultoj, amasmurdado ... kaj eko de la **Tria Mondmilito**, Akompane al tiu milito de la militoj, la *Armagedon*, kiu estos absolute tutmonda, sen eĉ unu haveno de neŭtraleco, oni povas atendi serion da naturkatastrofoj, kaŭzataj de la militado per amasmortigaj armiloj aŭ permesataj de Dio, kiel ekzemple eksplodego de supervolkano aŭ liberigo de ĉiuj ankoraŭ enfermitaj tavoloj de metangaso. Mortos plu ne milionoj da homoj sed dek- kaj centmilionoj kaj la grandurboj kun siaj fieraj konstruaĵegoj reduktatos al ruinoj.

Krei tutmondan krizon estas en principo sufiĉe simpla procezo. La bankoj (IMF, Mondobanko) pruntedonas grandajn monsumojn al asocioj, institutoj, registaroj kaj … aliaj bankoj, sciante de antaŭe ke la koncernatoj malfacile aŭ tute ne kapablos repagi tiujn pruntaĵojn. Sufiĉas ke tiuj ĉi regule pagu la interezon de siaj pruntaĵoj. La ŝuldo tiele jaron post jaro akumuliĝas ĝis post iu nombro da jaroj la balono de prospero subite krevas. La ŝuldantoj tiam eĉ plu ne kapablas pagi la interezon kaj la bankoj akaparas iliajn posedaĵojn por revendi. Finfine la bankistoj — tio estas la centraj kaj monde influaj — firme tenos sociojn kaj naciojn (politikistojn) en siaj ungoj. Sed kiam la komercado haltos pro manko je mono kaj/aŭ senvalorigo de la monbiletoj, ankaŭ la bankoj (laŭ delonga plano de sekretaj manipulantoj) bankrotos kaj jen la tutmonda krizo aspirata kaj preparata.

Kiel dirite, la usona Dolaro konsistigas la akson sur kiu tiu financ-ekonomia karuselo turniĝas, kaj kies senvalorigo kuntrenos la tutan mondon al la abismo. Por esti certa ke ĉi-foje estos la definitiva kaj plu ne venkebla krizo, surscenejen venis la usona prezidisto Barack Husein OBAMA, kiu estas ne malpli ol superinteligenta psikopato. Tion klare malkaŝas lia propra aŭto-biografio *Dreams from My Father* en kiu li konfesas esti transpreninta la revon de sia afrika patro, kiun li apenaŭ konis, ĉar kiel infano li estis adoptita de islamanaj gepatroj en Indonezio. Lia vera patro nome esti keniana militanto kontraŭ **kolonialismo**. Tiu, kaj nun same lia filo, nutris la idealon komplete ruinigi kaj detrui ĉiujn okcidentajn landojn kiuj iam aŭ ankoraŭ aktuale ekspluatis (elsuĉis) koloniojn, precipe tiujn afrikanajn: Britio, Francio, Belgio, Portugalio, Hispanio kaj nelaste Usono, kiu ja kaptis kaj importis nekalkuleblan nombron da nigraj sklavoj. Ĉiuj liaj faroj kaj decidoj, kiuj ofte aperas esti sinkontraŭdiraj, eksplikeblas klare per tiu "kaŝa" intenco. Li subfosas la usonan socian strukturon kiel taŭpo kaj iom post iom eltiras ĝian medolon de rezistopovo kaj nacifiero — finance, ekonomie, socie, militiste, politike, religie — kaj estas survoje al kompleta despoteco. Kompreneble, tiun sian planon li devos realigi ene de sia regoperiodo kaj li do certe provos ŝanĝi la konstitucion tiurilate.



La juna Barry Obama ĉe sia vicpatro Lolo Soetero en Indonezio

Krome li, jam per sia propra nomdono, klare manifestas sian favoron por Islamo, la religio en kiu li estis edukita, kio signifas kreskanta mortdanĝero por (precipe sed ne sole) Kristanoj, ĉu katolikaj aŭ protestantaj aŭ ankoraŭ aliaj, ne forgesante la Judojn. Kun tia ĉefpiono sur la ŝaktabulo de Framasonismo, la okcidenta mondo ne povos ne kolapsi en rekorda tempo, sen ke la publiko scios kio okazas malantaŭ la muroj de la oficialaj institutoj. La amasmedioj estas ja kiel hundoj kiuj nur bojas kiel ordonas iliaj mastroj.

Ankaŭ ne konsciate estas la rolo de la (uson)angla **lingvo**, kiu funkcias kiel tutmonda transdonanto de ideologio. Kiel dua lingvo por ĉiu, teorie kaj en praktiko, la cerboj estas pere de ĝi plenŝtopataj per mondpercepto tute usona, sekve framasona, sekve **globalisma**, sekve vojprepara al la Nova Mondordo. Tiamaniere ĉiuj landoj kaj popoloj de la mondo, kaj ne lastvice la Rom' Katolika Eklezio, senscie kunlaboras al estiĝo de la Absoluta Krizo kun la Tria Mondmilito en ties sulko. Multenombraj falsaj profetoj, guruoj kaj iluminitoj, kunhelpas per kreado de tiom da sektoj kiuj ĉiuj proklamas posedi la veran doktrinon kaj la veran savanton.


La Antikristo — enkarniĝo de Lucifero — el sia nekonata kaŝejo lasos boli kaj rosti la batalojn kaj katastrofojn de la lasta mondmilito ĝis la amaso da viktimoj estos plu ne kalkulebla, la vivo plu ne tolerebla, la malespero tra la tuta mondo je sia paroksismo. Tiam li elpaŝos per miraklofaroj por kvietigi la naturelementojn, silentigi la armilojn, redukti aŭ eĉ nuligi la efikojn de nuklebombaj radiaĵoj, kaj verve kaj elokvente parolados por reestabli tutmondan pacon kaj ĉion reorganizi … sub lia persona gvido. Kiel skribite en Apokalipso la homamasoj — tio estas la postvivantaro de la kataklisma militego — fascinate lin obeos kaj adoros, kaj <u>volonte</u> submetiĝos al la de li kreita Mondregistaro, la Nova Mondordo, la Humanisma Mondreligio, fikopio de la biblia "unu grego kaj unu paŝtisto". La granda revo de Lucifero, ekde estiĝo de la Universo, estos tiam efektivigita ! Tiel lerta, potenca, kaj konvinka li estos ke



Antikristo kun Lucifero
(detalo el tuko de Signorelli)

eĉ grandaj intelektuloj kaj fidelaj eklezianoj en la katakomboj, kiuj devus scipovi travidi la manipulaĵojn, lasos sin konvinki: “Multaj venos en Mia nomo dirante <Mi estas la Mesio> kaj ili trompos multajn. Vi aŭdos pri militoj kaj famo de militoj, sed ne ektimu ĉar tio devas okazi [laŭplane]. Sed ankoraŭ ne estos la fino [de la mondo]. Ĉar sin levos nacio kontraŭ nacion, regno kontraŭ regnon, kaj estos malsato, epidemioj, kaj tertremoj en pluraj lokoj. Sed ĉio tio estos nur komenco de la suferoj de naskado. Tiam oni vin [mian disciplaron] submetos al turmentoj kaj mortigos vin. Vi estos malamatoj de ĉiuj paganoj pro Mia nomo. Tiam ankaŭ multaj malmoraliĝos, sin perfidos unu la aliajn kaj malamos unu la aliajn. Multaj falsaj profetoj sin levos kaj erarigos multajn [naivulojn]. Pro multobligado de maljustaĵoj, la kompatemo de la plimulto malvarmiĝos. Sed kiu persistos [en sia fideleco] ĝis la fino, tiu savatos.” [Mat.24,5-14]


Nur kiam ĉio ĉi estos vaste kaj firme organizita, laŭ **la piramido de Adam WEISHAUPT** (1748-1830), kies emblemon oni trovas sur monbiletoj de unu Dolaro, finiĝos la unua fazo de ŝajna bonfarto al la submetiĝinta homaro kaj povos starti la malkaŝa regno de la diablo kun kompleta sklaveco kaj senkompata mistraktado de homoj, per despoteco kian la mondo ankoraŭ neniam spertis, nek kvante nek kvalite. Unuparte la Satano kaj/aŭ liaj reprezentantoj — estus nur normale ke ankaŭ li kolektos ĉirkaŭ si fiksan disĉiplaron — disponos plej rafinitajn aparatojn por scii kaj kontroli kion faras ĉiu individua persono kaj kie tiu momente troviĝas. En tiu rilato la potencega entrepreno GOOGLE, kiu registras ĉiun kaj ĉion en la mondo, estas jam preta ilo por li. Aliparte kiel demono li legos iliajn plej sekretajn pensojn, kaj tuje ekkonos malkonsentantojn. Nur la eta grego de Kristanoj sub senpera protekto de Dio kaj speciale de la Madono, sukcesos eskapi tiun potencegon.




Mi kredas povi ligi al tiu ĉi kunteksto la avertojn de Nia Sinjoro en Mat.24:23: “Tiam, se iu diros al vi :<Jen tie ĉi estas la Mesio, aŭ tie>, ne kredu tion; ĉar aperos falsaj mesioj kaj falsaj profetoj, kiuj faros grandajn signojn kaj mirigaĵojn tiel, ke ili forlogos se eble eĉ elektitojn. Aŭskultu, Mi antaŭdiras a vi. Do se oni diros al vi <Li estas en la dezerto>, ne iru tien; aŭ <Jen Li estas en endoma ĉambro>, ne kredu tion. Ĉar kiel fulmo pafas el la oriento kaj brilegas ĝis la okcidento, tiel ankaŭ estos la veno de la Filo de Homo.”

Ĉar la Mistika Korpo de Jesuo tute simple ne estas komplete neniigebla — la Satano ne kapablas venki Dion — postrestos iu pocenteto da fidelaj Kristanoj, kiuj sukcesos kaŝe transvivi la teroron de la diablo kaj de liaj trabantoj, kvazaŭ radiko de taraksakofloro, de kiu la supergrunda videbla plantparto estas fortranĉita, sed kies radiko restas sendifekta kaj revivo-kapabla. Kuŝos sur ili spirita vualo analoga al tiu kiu kovris Jesuon kaj Maria, dum tiuj agadis en Palestino, antaŭ la vido de Satano, tiel ke li ne kapablis malkovri ilian profundan naturon nek ilin tenti, je sia granda konsterniĝo [Vidu Emmerick kaj Agreda]. Tiu Regno de Teroro daŭros kiel dirite kaj skribite en pluraj lokoj **tri kaj duona jaroj**.


Tiuj 3½ jaroj estas ne hazarde aw pro tradicio elektitaj, sed havas profundan mistikan kaj kosman signifon. Estas nome aŭ la pozitiva aŭ la negativa duono de la sankta nombro **sep**, kiun ni trovas en la sep sakramentoj de la Eklezio same kiel en la sepbraka kandelabro de la Judoj kiel en la hinduaj ĉakroj, kaj kiu rezultas el enformigo laŭ la interna strukturo de la Tre Sankta Triunuo ĉe la Kreo. En [Vol.1/15.1] pri la **metasfero** mi indikis ke ties ekstremaj nodopunktoj, nome 1 interna (la ĉefa) plus 6 eksteraj, konsistigas en la Kosmo se tiel diri la kranoj el kiuj fluas la diaj gracoj... aŭ punoj.



Metaskeleto kun 7 nodopunktoj

Plej taŭgan priskribon, de tio kio estos la Nova Mondorganizo, ni ricevis el la buŝo de Satano mem, kiu ofte sin manifestis en homa formo al la sankta "Paroĥestro de Ars" (Francio), Jean-Marie VIANNEY, modelo de katolikaj sacerdotoj. Estas registrite ke ĉirkaŭ 1850 la Demono fanfaronis jene al la humila religiulo, por lin senkuraĝigi:: "Novan eklezion ni fondos, novan eklezion de homa gloro. Tiu eklezio havos siajn martirojn, siajn kredantojn, kaj siajn sanktulojn. Tiu nova eklezio, en kiu ĉiu homo estos parto de la tuto, nome de mistika korpo el homo kaj ŝtato. Ankaŭ sacerdotojn ĝi havos, episkopojn kaj

kardinalojn. Papon ĝi havos, al kiu atribuatos la mondoregadon. Estos la eklezio de la homaro, eklezio kiu predikos la evangelion de la bonkoreco, de egaleco, de frateco, de amo, de amikeco; eklezio de la Plano. Ni alportos novan evangelion pri humaneco. La homo povos tiam fari paradizon el la Tero. Li estos trovinta la <ŝtonon de la saĝuloj> kiam li descendos en si mem kaj ne suprenrigardos sed rigardos al si mem. La scienco ebligos al li konstrui novan socion en kiu regos la homo iĝinta perfekta. Tiu homo plu ne dependigos siajn farojn de sia konscienco, kiu rilatas al superaj potencoj. Ne ! Tio estus egoismo ! Sed tiu homo elprovos siajn farojn laŭ tio kion ili signifas por aliuj. Tiu modela homo estos rompinta la ligojn kun ĉiuj hereditaj instruoj kaj kun la eklezia tradicio. La homoj tiam estos vere liberaj kaj plu ne estos katenitaj per la tradicio, plu ne estos en katenoj kiujn ili mem forĵis. Tiu eklezio estos sociala eklezio, kiu progresigos la bonfarton de la homaro surtere kaj riparos la suferadon."



Jean-Marie Vianney
(1726-1859)

Oni devas esti mense blinda por ne vidi ke la Vatikano nuntempe evoluas ĝuste en tiu direkto !

## 2) La Du Atestantoj

La Apokalipso en ĉapitro 11 anoncas ankaŭ la aperon de du enigmaj atestantoj kiuj eliros predikante la veran doktrinon de Jesuo, rekte kontraŭstare al la mondpercepto de la Falsa Mesio kaj sen ke tiu povos ilin malhelpi aŭ malbonfari, almenaŭ dum la menciitaj tri kaj duona jaroj atribuitaj al ili: "Mi ordonos al miaj du atestantoj, vestitaj en [malluksa pentofara] saktolaĵo, profetadi dum dekducent sesdek tagoj. Ili estas la du olivarboj kaj la du kandelabroj, kiuj staras antaŭ la vizaĝo de la [vera] Sinjoro de la Tero. Se iu volas malutili al ili, elŝprucos fajro el iliaj buŝoj kiu konsumos iliajn malamikojn; ja tiel ilin trafos la morto. Tiuj ĉi [du] havos la povon fermi la [kluzojn de la] ĉielo, tiel ke [plu] ne falos pluvo dum la tagoj de ilia profetado. Ili havos povon je la akvoj [de riveroj kaj fontoj] por tiujn transformi al sango kaj por frapi la Teron per ĉiuspecaj plagoj, tiom ofte kiom ili deziros." [Ap.11,3-6].

“Kiam ili estos plenumintaj sian atestadon, la Besto kiu sin levas el la Abismo faros militon kontraŭ ili, ilin venkos kaj mortigos. Kaj iliaj kadavroj kuŝos sur strato de la granda urbo, kiu bildige nomatas Sodomo kaj Egiptujo, kie ankaŭ ilia Sinjoro estis krucumita. El la popoloj kaj triboj kaj nacioj kaj lingvoj estos [multaj] kiuj vidos iliajn kadavrojn [per Interreto kaj TV sendube] kuŝadi dum tri kaj duona tagoj, kaj ne permesos ke tiuj korpoj metatu en tombon [por esti certaj ke iliaj animoj plu ne revenos kaj ilin revivigos kiel okazis al la Mesio]. Tiuj kiuj loĝados surtere estos feliĉaj kaj gajaj pri ili kaj sendados gratuldonacojn unu al la aliaj, pro tio ke jenaj du profetoj estis [tiomege] suferigintaj la homojn kiuj loĝadas surtere [Ap.11,7-10].

“Sed post tri kaj duona tagoj ilin enfluis vivospirito el Dio; ili ekstaris sur siaj piedoj kaj granda timo faris sur ĉiujn, kiuj ilin observis. Kaj ili [la spektantoj] aŭdis laŭtan voĉon el la Ĉielo diri al ili [la atestantoj]: levu vin supren al tie ĉi ! Kaj ili supren iris al la Ĉielo en nubo kaj iliaj malamikoj ilin spektis [tion fari]. Kaj en tiu sama horo okazis granda tertremo, dekona parto de la urbo kolapsis, kaj sepmil homoj pereis pro la tertremo, ĉe kio la ceteraj tre ektimis kaj faris honoron al Dio en la Ĉielo.” [Ap.11,11-13].

Interpreti la tekstojn de la Apokalipso - la Revelacioj de la apostolo Johano — estas ege malfacila afero se oni volas elstarigi la veron senerare. Ili temas pri la estonteco, kiun ĉiu normala homo ja ege deziras koni. Hodiaŭ pli ol iam antaŭe. La kvanto da artikoloj kaj libroj verkitaj pri tiu revelacio sekve estas tiel multnombraj ke ili facile plenigus bibliotekon.

Ke ĝi konsistigas tian enigmon estas ja dia intenco ! Unuflanke necesas ke la homaro sciu kien ĝi iras kaj devas iri, kio estas ĝia destino, sed aliflanke la Providenco ne povas tion malkaŝi nude kaj krude, kiel finjaran bilancon de komerca entrepreno. Alimaniere malaperus la Hazardo el nia Universo, kaj kune kun ĝi nia Libera Volo. Sekve, tiu kiu volas trovi la fadenon de Ariadne tra tiuj labirintaj skribaĵoj, bezonas specialan lumon de la Sankta Spirito. Tian lumon la centra Dipersono — fakte meza inter Patro kaj Filo — bonvolis inspiri al mi, sensignifa kaj senmerita pekemulo, post alvoko de Nia Sinjoro Jesuo. La tuta Teorio pri Ĉio — kiu estas nenio alia ol revelacioj pri plej sekretaj aspektoj de la Universo kiel manifesto de Dio Triunua — utilu kiel pruvo pri tiu mia aŭdaca aserto. Bedaŭrinde tio ankoraŭ ne garantias absolutan precizecon, ĉar la vanta homa menso ĉiam emas enŝovi la propran opinion. Kun ĉi lasta rezervo mi do nun analizu la famajn orakolojn de Johano.

Tuje frapas min ke la periodo, atribuita al Satano, por ellabori sian regnon, identas kun la periodo atribuita al la du atestantoj de Dio, por batali kontraŭ tiu infera regno, nome 3½ jaroj. Se tiu tempindiko ne estas nur metafora esprimo — supre mi signalis ĝian kosman valoron — tio signifas, laŭ mi, ke ambaŭ partioj ricevos tiun nombron da jaroj por plenumi sian taskon: unue



Du Atestantoj

la Antikristo dum 3½ jaroj, kaj poste la Atestantoj dum sama nombro da jaroj. La koncerna fazo devos necese ampleksi <u>**po**</u> 3½ jarojn por esti realigebla. Ili do ne aperos ambaŭ samtempe sur la scenejo ! Kaj same, ke la morto kaj releviĝo de la defendantoj de Dio signalos la finon de la diabla subpremado !

Aliparte stariĝas laŭ mi du gravaj demandoj, nome kiuj estu tiuj du engimaj diservistoj kaj kiel aŭ kion specialan ili povus diskonigi ? Pliparto el bibli-studantoj identigas ilin kun la altprofeto Elija kaj la arkipatriarko Henoĥ, kaj tio estas ankaŭ plej logika dedukto, ĉar la Sanktaj Skribaĵoj (Malnova Alianco) mencias nur tiujn du kiuj en la tuta homa historio ne mortis, sed iel malaperis de la Tero.

Koncerne al Henoĥ, <u>**la unua eskatologia profeto**</u> : “Henoĥ promenis kun Dio kaj [subite] plu ne ĉeestis, ĉar Jehovo lin suprenlevis.” [Gen.5,24]. Alian mencion oni trovas en la letero de Judas [1,14]: “Tiel [damne] estas ankaŭ por la individuoj pri kiuj Henoĥ profetis, la sepa [patriarko] post Adam, kiam li diris <Jen vidu la Sinjoro venonta, kun Siaj sanktaj miriadoj, por procedi al la Lasta Juĝo kaj por konfuzi la sendiulojn pro ĉiuj iliaj sendiaj faroj.>” Trie konservatas t.n. <Libro de Henoĥ>, miksnatura evangelio apokrifa en malnova etiopia lingvo, kopio de kopioj kies originon oni ne konas. Kurioza karakterizo, notenda por la sekvo, estas ke la teksto de ĉi libro parolas käj pri la sekretoj de la universo, kiujn Dio vidigis al la altaĝa patriarko, käj pri la Lasta Juĝo. Ĝuste tiuj konformas al la eskatologiaj temoj de mia propra Teorio pri Ĉio … Malmultaj referencoj do, sed fakte estas apenaŭ kredeble ke entute restis iu memoro kaj mencio pri tiu eminentulo el la antaŭdiluva epoko, ĉar li estis prapraavo de Noaĥ ! Feliĉe ke ACE, per siaj spiritaj okuloj flugantaj tra tempo kaj spaco, donas kelkiom pli da informoj pri tiu persono: “Henoĥ, prapraavo de Noaĥ, instruadis kontraŭ ili [la senmoralaj kaj krimaj gentoj antaŭ-diluvaj]. Li skribis multon kaj estis tre bona viro, ege inklinita al Dio. En multaj lokoj li konstruis sub libera ĉielo ŝtonaltarojn, tie kie la kultivaĵoj abundis, por danki al Dio kaj Lin fari oferaĵojn. Estas li kiu transdonis la religion [pri unika Dio] al la familio de Noaĥ. Li estas lokigita en la Paradizo, kune kun unu alia [Elija], kaj li



Libro de Henoĥ en amhara

ripozas ĉe ties elirpordego [atendante], kaj li revenos de tie ĉe la Lasta Juĝo." [Enkonduke al ĝi].

Estas kredinde ke de liaj verkaĵoj postrestas ekzemplero, ĉar ŝi ankaŭ raportas en alia kunteksto ke profunde sub la sablo de la iama urbo Ktesifon, apud la Tigro-rivero, ankoraŭ kuŝas libro skribita en la pralingvo [hindeŭropa] kiun paroladis la generacioj de Adam ĝis Noaĥ, kaj de kiu derivas i.a. Sanskrito. Same kredindas ke Noaĥ kunportis en la Arko skribaĵojn de sia kultata praulo kiel specon de antaŭdiluva Biblio. Estas do sendube el tiuj ke ni heredis donitaĵojn pri la eskatologia patriarko kaj liaj instruoj. Esperu ni ke temas ĝuste pri (kopio de) tiu sub la sablo en nuntempa Irako …

Kiom koncernas non **Elija** li estis la plej granda kaj miraklofara el ĉiuj bibliaj profetoj, kiu ankaŭ plej klare antaŭanoncis la venon de la Mesio. Mi mencios nur lian spektaklan batalon sur la monto Karmel kontraŭ 450 pastroj de la idolo Baal (importita fare de la fifama Jesabel) plus kontraŭ centoj da kromaj idolanaj oficistoj, en kiu konkursego tiuj neniel sukcesis fari buĉoferon al sia idolo, kvankam klopodante tutan tagon, dum la profeto tute sola en la vespero kaj en plej malfavoraj cirkonstancoj por fari oferaĵon al Jehovo, vidis sian prezenton al Jehovo konsumita en unu momento per brila fulmego el la ĉielo.

"Dum ili interparolante pluiris [Elija kaj lia posteulo Eliŝa], subite aperis fajroĉaro kun fajroĉevaloj, kaj ili disigatis, kaj Elija ĉielen flugis meze de uragano." [2 Reĝoj 11]. La biblia profeto Malaĥi, lasta de la listo, krome anoncas [Mal.3,23]: "Vidu, mi sendos la profeton Elija [returne] al vi antaŭ ol venos la granda kaj terura **Tago de Javeo** [= la Juĝotago]." Estas sufiĉe konate ke la Idoj de Israel ĉe grandaj festoj kutimas almeti honorseĝon ĉe la familia tablo sur kiu image eksidu la atendata grandprofeto.

Mi ripetas ke la Paradizo, post elĉaso de Adam kaj Eva, ne simple estis abolita sed forlokigita al iu spirita ejo rande de spaco kaj tempo, kiu ejo iel estas kvazaŭ per umbilika ŝnuro ligita al sekreta loko en la Himalaj-montaro, kiun ACE nomas "Monto de la Profetoj", ĉar tie ŝi vidas ne nur non Henoĥ sed ankaŭ Elija, studanta grandan libron en sia loĝotendo. Je fino de la mondo, por la Regno de Jesuo, Dio remetos la Paradizon en sian originan lokon, restarigante ĉion tiam detruitan aŭ difektitan al bonfarto en palpebrumo.

Tiom pri la identeco de la du Atestantoj. Restas ankoraŭ ekzameni kion ili diskonigos dum sia predikada kampanjo kontraŭ la herezoj de la Antikristo kaj kiamaniere.

Estas senplie certe ke — kaj kvankam ili dume en funebraj vestoj kredeble ankaŭ marŝados aŭ veturos de loko al loko — ke ili utiligos modernajn komunikosistemojn por atingi la mondan loĝantaron … en la supozo ke la Granda Diktatoro ne kapablos ilin malhelpi en tio, kiel li eksterdube jes kapablos fari al ĉiuj ceteraj homoj.

Nu, en niaj modernaj tempoj tre probable plu ne sufiĉos instrui kateĥismon kaj kredokonfeson laŭ la tradicia maniero, malnovmoda kaj tial apenaŭ efika por amaskonvertado. La sola efika plano estos diskonigi la **Teorion pri Ĉio**, por tiu celo al mi revelaciitan kaj jam de la jaro 2009 cirkulanta sur Interreto, sen atingi publikan atenton. Al tio rilatas la 11-a ĉapitro de Apokalipso pri kiu tuj aparte. La Sankta Spirito ja atendas la momenton deciditan de la Providenco por tio: “Tiel estas kun la parolo el Mia buŝo; ne senefike ĝi revenos al mi, sed tion kio plaĉas al Mi ĝi realigos; ĝi plenumas tion por kio Mi ĝin sendis.” [Jes.55,11].


Tiu ampleksa kaj penetrema novinstruo pri la Universo, pri ĝiaj fenomenoj kaj leĝoj, pri ĝia origino nome kunigas en kohera maniero Sciencon kaj Kredon, tiele ke unu prilumas kaj eksplikas la alian, sen kontraŭdiroj. Estas ja skribite ke antaŭ ol venos la vera Fino, kun la grandioza Reveno de Jesuo: “Unue la Bona Novaĵo pri la Regno [de Dio] estos proklamata tra la tuta mondo kiel atestilo al ĉiuj popoloj.” [Mat.24,14]. Tio ne povos ne esti tute speciala instruo, kiom koncernas la enhavon kaj kiom koncernas la rimedon de instruado, ĉar la tradiciaj enhavo kaj maniero(j) jam estas disvastigataj de du jarmiloj ! Pro tio la evangelizado fare de la Duopo estos absolute ne kontraŭstarebla. La lukto por la Vero estos giganta inter Antikristo kaj Atestantoj. Tiu revelacio, ja nova Paradigmo, skuegos la Malamikon kaj lian sekvantaron, sed ĝi tamen ne sukcesos lin definitive venki kaj elimini. Alia skribaĵo nome diras [Ap.13,14]: “Kaj [de la mara besto] mi vidis unu el ĝiaj kapoj ĝismorte vundita, sed tiu vundego saniĝis. [Pro tio] la tuta mondo sekvis la beston kun mirego, kaj ili adoris [ankaŭ] la drakon [Satanon] ĉar tiu donis tian forton al la mara besto. Ili ankaŭ adoradis la beston mem, dirante: <Kiu egalas la beston ? Kiu kapablas batali kontraŭ ĝin ?>” La sep kapoj de la jena Besto eksterdube respondas al la sep ĉefmalvirtoj (orgojlo, avareco, envio, kolero, malĉasto, manĝegemo, pigreco) kaj la mortvundita kapo al ateismo surbaze de raciismo. Spite la absolutan senvalorigon de tiu fiteorio, la Uzurpanto kaj lia kunreganta bando do tamen sukcesos iamaniere konvinki sian vastan adeptaron, ke la nova mondpercepto finfine kaj en praktiko ne faras diferencon.

**3) La Granda Averto**

Kiel profetite, la sankta duopo fine tamen perdos la vivon, pro kio ĝojegos la amaso de diabloadorantoj. Sed ilian morton baldaŭ sekvos ankoraŭ rekta dia interveno, nomata La Granda Averto, laŭ mesaĝo de la Sankta Virgulino en Garabandal (Hispanio 1961). Ĝi konsistos en subita mallongdaŭra prilumigo de la konscienco de ĉiu homo senescepte, ajne de kiu raso, kulturo, aŭ stato, kie ajn sur Tero. Ĉiu vidos la staton de sia animo tiel kiel ĝin vidas Dio, kvazaŭ estus librotena registro pri ĉiuj fazoj de sia vivo, bonaj kaj pekaj. Sed tio ne estos nur neŭtra spektaklo, sed ja plejintensa rapida (re)travivado de la okazintaĵoj, sentata kaj spertata kun ĉiuj ĝiaj koncernaj konsekvencoj kaj disbranĉiĝoj. Fakte, dum kelkaj minutoj leviĝos la vualo deponita sur niaj cerboj pro la Origina Peko. Estos lastlasta provo de la Dia Kompatemo konverti animojn kaj savi la homaron el pereo, ĉar kiam la Triunuo senkatenigos la centoble meritatan punegon pro la oceano de niaj pekoj, estos vere la fino de nia mondo, neniam ajn antaŭe okazinta. Pri tiu kataklismo mi traktos poste pli detale.

**4) La Dua Eskatologia Profeto**

La apostolo Johano, plej intima al Jesuo, estas sola el la dekduopo kiu ne mortis kiel martiro, kvankam estas sciate ke oni provis rosti lin en bolanta oleo, sed vane. Li iĝis ekstreme altaĝa kiel estimegata kaj amata episkopo de Efese (nuntempe en Turkio) kaj protektanto de la Sankta Patrino Maria, kiu vivadis tie sur montflanko ĝis sia 63a jaro. La loko, Meriem Ana je 7 km de



La restaŭrita dometo de Maria en iama Efese (*Meryem Ana)*

Selçuk, estas de generacioj tre vizitata pilgrimejo, ĉar Ŝia restaŭrita dometo ankoraŭ ekzistas tie.

Historiistoj sufiĉe interkonsente situigas la morton de Johano ĉirkaŭ 100 PD sed natura kaj sensekva tiu morto certe ne estis. [Joh.21,21]: "(Post kiam Jesuo estis anoncinta al siaj apostoloj ke ili mortos martire pro Lia nomo) Petro sin turnis kaj rimarkis ke sekvis lin la disĉiplo, kiu aparte amis Jesuon kaj kiu ĉe la frata kunmanĝo apogis sin al Lia brusto. (...) Li diris: <Sed kio pri tiu ?> Jesuo respondis: <Se Mi volas lin postrestigi, ĝis kiam Mi revenos, kio estas tio al vi ? Nur sekvu Min !> Pro tio disvastiĝis inter la fratoj la onidiro ke tiu disĉiplo ne mortos. Sed Jesuo ne diris, ke li ne mortos, sed nur: <Se Mi volas lin postrestigi, ĝis kiam mi revenos, kio estas tio al vi?>". Ĉiel ajn, la deklaro de Jesuo tamen klare indikas ke Johano havis kaj havos laŭplanan rilaton kun la Reveno de nia Sinjoro ĉe la Mondfino !

Kiun ? Tion eksplikas unue ACE: "Mi vidis ion mirigan. Post kiam Johano adiaŭdiris al siaj disĉiploj per la paroloj <Infanoj, amu vin unu la aliajn!>, li mem alprenis kuŝan pozicion [en la preta fosaĵo] kaj mortis. Mi vidis lumon veni malsupren sur lin kaj en tiu lumo aperi brila homfiguro, kiu trafe similis al li, aŭ plivole estis tute kiel li. Tiu figuro supren ŝvebis el la korpo kiel el kruda volvaĵo, por malaperi kune kun la ĉiela lumo. Mi nun vidis liajn disĉiplojn alproksimiĝi. Ili [funebrante] sin ĵetis teren ĉirkaŭ la tombo, kiun ili poste plenigis. Tuj post kiam tiu bildo malaperis [do intimlige kun ĝi], mi ricevis novan vizion, ĉi-fojon pri la Profetomonto, kie mi rimarkis la homfiguron [Elija], kiun mi jam tiom ofte vidis sidadi tie sub tendo."

Oni ne tro rapide konkludu, ke tiu evento estis normala morto, ĉe kiu ne-videbla animo forlasas videblan korpon, kiu postrestas putriĝante. La korpo de Johano ja neniam retrovatis, dum jes lia tombo. Tion certigas ĉiuj hagiografioj, precipe tiuj de la Bollandistoj — jesuida ordeno kiu ekde la 17a jarcento metode kolektas kaj registras ĉiujn eblajn donitaĵojn pri la vivo de sanktuloj ĉiuspecaj — kiuj sciigas: "Oni ne scias kiumaniere la Apostolo de Amo mortis, sed la Eklezio kredas ke lia morto estis natura kaj okazis en Efese post la jaro 98 PD. Tie lia tombo retrovatis kaj tie ankaŭ okazis multaj mirakloj [de resanigoj], sed lian korpon oni ne retrovis. Tute same oni ne disponas relikvajn postrestaĵojn de la apostolo. Eĉ ĉe retrovo de lia tombo en 1926 oni trovis neniun eron de lia korpo."

Ĉe alia okazo ACE raportis: "En nordoriento [Himalaj-montaro] mi vidis lokon lumegantan kiel suno kaj lin [Johanon] kiel peranton de io kion li ricevas el la Ĉielo kaj pludonas al Tero. Tiun lokon mi vidis kiel ankoraŭ iamaniere kunligitan al Tero, sed tamen alte super ĝi levitan kaj ek de ĝi [fizike] ne atingebla. Mi ankaŭ vidis ke la Paradizo ankoraŭ ekzistas en tiu regiono, sed ŝvebanta aparte. Fakte, mi vidas kvar tiajn lokojn je la kvar mond-ekstremoj [Vol.1/15.3-la Pracirklo], sed mi plu ne memoras kion mi [dum ekstazo] vidis en tiuj lokoj."

Ni do plu ne dubu ke Johano apartenas al la kategorio de vokitoj por la Fino de la Mondo post Henoĥ, kaj tial mi nomas lin la Dua Eskatologia Profeto. (La du atestantoj estante kalkulataj kiel unu persono en tempo kaj loko.)

Sed plej firman certigon pri lia rolo ĉe fino de la tempoj ni trovas en liaj propraj deklaroj en la Apokalipso, kvankam esprimitaj per tre alegoriaj bildoj, kiuj parolas pri enigma **libro** kiu entenas la historion de la Homaro kaj koncernajn planojn de la Sankta Providenco kaj kies enhavon li devos diskonigi.

[Ap.5,1-10]: "Kaj mi vidis en la dekstra mano de la Sidanto sur la trono libron kun skribaĵoj interne kaj malantaŭe, sigelitan per sep sigeloj. Kaj mi vidis fortan anĝelon, proklamantan per laŭta voĉo: <Kiu estas inda malfermi la libron kaj rompi ĝiajn sigelojn ?> Kaj neniu en la Ĉielo, nek sur Tero nek sub Tero, povis malfermi la libron, aŭ enrigardi ĝin. Kaj mi multe ploris, ĉar sin trovis neniu inda malfermi la libron aŭ ĝin legi, kaj unu el la Plejaĝuloj diris al mi: <Ne ploru, jen la leono el la tribo de Jehuda, la radiko de David, venkis por malfermi la libron kaj ĝiajn sep sigelojn.> Kaj mi vidis meze inter la trono kaj la kvar kreitaĵoj kaj meze de la Plejaĝuloj Ŝafidon starantan, kvazaŭ oferbuĉitan, havantan sep kornojn kaj sep okulojn, kiuj estas la sep Spiritoj de Dio, senditaj sur la tutan Teron. Kaj Li venis kaj prenis ĝin el la dekstra mano de la Sidanto sur la trono. Kaj kiam Li prenis la libron, la kvar kreitaĵoj kaj la dudek kvar plejaĝuloj falis antaŭ la Ŝafido, havantaj ĉiu citron kaj orajn pelvojn plenajn je incenso, kiuj estas la preĝoj de la sanktuloj. Kaj ili kantis novan kanton, dirante: <Vi estas inda preni la libron kaj malfermi ĝiajn sigelojn, ĉar Vi estis mortigita kaj Vi elaĉetis ĉe Dio per via sango homojn el ĉiu tribo kaj lingvo kaj popolo kaj nacio kaj faris ilin al nia Dio regnon kaj pastrojn, kaj ili regas sur Tero."



La Ŝafido de Dio

En la postaj versoj la Ŝafido rompas sigelon post sigelo, tiele ekirigante fazon post fazo de la homa historio. La sesa fazo forte aludas nian propran epokon, en kiu la **Tago de Jehovo** minacas neniigi pliparton el la loĝantaro de Tero. La sepa sigelo kaj fazo estas tiu de la Dia Regno kun ties granda paco. Memoru ke mia Metasfero [Vol.1/1A+B], matematika strukturo de la Universo, enhavas sep nodopunktojn: trifoje du plus unu, la ĉefan, en la centro. Tiuj estas la spiritaj “kranoj”, tra kiuj fluas la diaj fortoj kaj gracoj stirantaj, kaj kiuj konsistigas la sep sakramentojn de la Eklezio (en Hindismo sep ŝakrojn). Pro tio la nombro 7 estas por multaj homoj sankta nombro.

La dua loko estas Apokalipso 10,1-11: “Kaj mi vidis alian fortan anĝelon subenirantan el la Ĉielo, vestitan per nubo; kaj la ĉielarko estis super lia kapo, kaj lia vizaĝo estis kiel Suno kaj liaj piedoj kiel kolonoj el fajro; kaj li havis en la mano **libreton malfermitan**; kaj li metis la dekstran piedon sur la maron kaj la maldekstran sur la teron kaj li ekkriis per laŭta voĉo, kiel roras leono; kaj kiam li kriis, la sep tondroj parolis per siaj voĉoj. Kaj kiam la sep tondroj parolis, mi volis skribi; kaj mi aŭdis voĉon el la Ĉielo, dirantan: <Sigelu tion, kion parolis la sep tondroj kaj ĝin ne skribu.> Kaj la anĝelo, kiun mi vidis staranta sur la maro kaj sur la grundo, levis sian dekstran manon al la Ĉielo kaj ĵuris per la Vivanto kiu vivas por ĉiam kaj eterne, Kiu kreis la firmamenton kaj tion kio estas en ĝi, kaj Teron kaj tion kio estas en ĝi, kaj la maron kaj tion kio estas en ĝi, ke plu ne ekzistos prokrasto. Sed en la tago de la voĉo de la sepa anĝelo, kiam tiu trumpetos, tiam plenumatos la mistero de Dio, kiel Li diskonigis al Siaj servistoj, la profetoj. Kaj la voĉo kiun mi aŭdis el la Ĉielo, parolis al mi denove, dirante: <Iru, prenu la libreton malfermitan el la mano de la anĝelo, staranta sur la maro kaj sur la grundo. Kaj mi iris al la anĝelo kaj diris al li: <Donu al mi la libreton.> Kaj tiu diris al mi: <Prenu ĝin kaj formanĝu ĝin; kaj ĝi maldolĉiĝos al vi en la ventro, sed en via buŝo ĝi estos dolĉa kiel mielo.> Kaj mi prenis la libreton el la mano de la anĝelo kaj formanĝis ĝin; kaj en mia buŝo ĝi estis dolĉa kiel mielo, sed kiam mi ĝin manĝis, mia ventro maldolĉiĝis. Kaj ili [la sep tondroj] diris al mi: <**Vi devas denove profeti ĉe multaj popoloj kaj nacioj kaj lingvoj kaj reĝoj.**>”

Bibliklarigistoj sufiĉe unuanime vidas Jesuon mem en tiu potenca anĝelo, kiu donas la lastan parton de la enigma historiolibro al sia profeto Johano. Notu ke la Ruĝa Drako (Satano) elvokis du alegoriajn fibestojn por agadi profite al li sur Tero, unu venanta el la maro kaj (laŭ la aludoj) koruptante la moralon de la homa socio, alia venanta el la tero kaj (laŭ la aludoj) koruptante la sociajn strukturojn. Jesuo estas Estro de ambaŭ tiuj terenoj de agado. Notu krome ke la profeto Jeĥeskel [3,1-3] devis fari la samon, estante sendita al Israel por tiun obstinan popolon pentigi. La revelacioj, pri la diaj planoj kaj la dinamika strukturo de la Universo kiel admirinda dia kreitaĵo, estas evidente dolĉaj kaj feliĉigaj kiam oni ilin lernas kaj spektas.

Sed ili iĝas amaraj kaj ĉagrenigaj kiam neniu pretas ilin atenti kaj akcepti, kiam ili restas sen efiko aŭ rezulto, do ŝajne vane donitaj.

Estas evidente, ke Johano iamaniere devos reveni al Tero por povi malkaŝi la enhavon de tiu mistera libreto, la lasta parto el la grandioza plano de la Dia Providenco, kaj tio ĉe la Fino de la Tempoj, alidire en nia nuna epoko. Nu, tion li faros, jam faris, inspirante trian eskatologian profeton.

Kiu estas tiu … ???



## 5) La Tria Eskatologia Profeto - Aŭtobiografio

Respondo, apenaŭ kredebla sed vera: li estas tiu kies tekston vi nun estas leganta…

Vole nevole, mi do nun estas devigata paroli pri mi mem; io kion mi ŝatus plejeble eviti, ĉar mi estas persono, kiu preferas sidi en angulo kie oni tiun ne rimarkas. Parte pro naturo nesociema, sed ankoraŭ pli pro timo ke oni eltrovos mian senvaloron. Mia vivo ja estas sinsekvo de fiaskoj, de proverbaj dek du metioj kaj dek tri malsukcesoj. Laŭ oficialaj kriterioj mi disponas diplomon nur de la bazlernejo. Krom tio mi estas pekemulo, kiun turmentas ĉiuj ĉefpekoj escepte nur de enviado. Inter tiuj la plej obstina estas tiu kiu ĉagrenis ankaŭ la apostolon Paulus [2 Kor.12,7]: "Por ke mi ne fariĝu vanta [pro mia elektiteco ĉe la Sinjoro] al mi estas plantita pikilo en la karno, anĝelon de Satano, batadante min per la pugnoj, por ke mi ne fariĝu orgojla. Ĝis tri fojojn mi preĝis al la Sinjoro, ke tiu foriru de mi, sed Li respondis <Mia graco sufiĉu al vi, ĉar ĝuste en [via] malforto sin manifestas [Mia] forto.> Plej volonte mi tial elstarigu miajn malfortojn, por ke la potenco de la Mesio loĝu en mi. Mi eĉ ĝojas pro Kristo pri miaj malfortoj kaj malhonoroj." Sekve, oni nepre ne povas konsideri min kiel sanktulon, spite la senditecon !!!

Ke mi sukcesis ellabori ion tiel postuleman kaj akademie valoran kiel la Teorio pri Ĉio, estas do atribuenda tute al la inspiroj kaj influoj de la Sankta Spirito, sekve al la Dia Providenco kiu tute plancele gvidis min tra la vivo, kaj tio sub la potencega protekto de la Sankta Virgulino, kiun mi amegas de junaĝo. Mia sola merito, se pri io mi rajtas fanfaroni, estas volonta akcepto roli kiel ricevpreta ujo kaj konekta strebo kunlabori al konstruado de la estonta Dia Regno. [Mat.6,32] ja diras: "Ne estu cerbumema kaj ne diru: <kion ni manĝos aŭ kion ni trinkos, aŭ per kio ni vestos nin ?> Tion demandas la paganoj; sed via ĉiela Patro scias, ke vi bezonas ĉion tion. Male serĉu unue la Dian Regnon kaj ties justecon, kaj ĉio tio estos al vi donacata kiel kromaĵo. Do ne zorgu pri la morgaŭo, ĉar la morgaŭa tago zorgos pri si mem; la penoj de ĉiu tago sufiĉas al si mem." Tamen necesis ankaŭ regula ricevo de sakramentoj por teni min surpiede meze de la multaj proprakulpaj eraroj kaj mispaŝoj renkontitaj kaj ke mi ne deviu de la didonita tasko.

Bedaŭrinde ne estas donita al mi fari miraklojn, kiel faris ilin la bibliaj profetoj. Mia sola akreditaĵo troviĝas do en miaj paradigmaj verkaĵoj. Sed eble mi devas ankoraŭ rakonti kiamaniere kaj en kiu etoso tiuj estiĝis ?

Nu, jam kiel infano mi estis eksterordinare scivolema, volante koni la kialon kaj kielon de ĉio kio trafis mian atenton. Sed krome mi aspiris ke ĉiuj tiuj "objektoj" kaj "fenomenoj" formu koheran tuton ! Estis do sufiĉe ofte malagrabla sperto konstati ke ŝajnis ne ekzisti kontentiga respondo al miaj "strangaj demandoj".

Bedaŭrinde mi estis ankaŭ eksterordinare kaprica kaj ludema, sen disciplino. En la lernejo miaj nehaltigeblaj pensoj kutimis drivi for de la subjekto, kiun la instruisto ĵus estis traktanta, tiel ke mi plu ne aŭdis la

sekvon. Evidente tio kostis al mi multajn riproĉojn kaj punojn kaj kvoton danĝere malaltan. Tiumaniere mi komencis rangi, post fulma starto supren, inter la plej malbonaj lernantoj de la klaso, jaron post jaro.

Feliĉe mi disponis ankaŭ tre fortan memoron. Tio, kion mi aŭdis aŭ vidis, restis solide ankrita en mia cerbo, sed tamen kun la malvantaĝo ke mi ne emis plenumi la lernejajn hejmtaskojn, kaj preferis legi librojn sen rilato al la studotaĵoj. Tre ŝatante lingvo(j)n — apud religion — mi tre frue scipovis legi flue. Fakte, legado fariĝis por mi kvazaŭ obsedo, manio. Sepjara mi legis mian unuan porinfanan libron sufiĉe dikan. Tiu sukceso malfermis al mi mondon da (por mi) sciindaĵoj. Ju pli "ekzotikaj" estis la temoj, des pli bone.

Kompreneble, en la komenco temis nur pri aventuraj romanetoj, prefere fantaziaj, sciencfikciaj, fantomeskaj. Mia legavido estis tia ke mi iris dufoje semajne al la urba biblioteko por kunporti ĉiufoje du aŭ tri librojn, kiujn mi ne malofte legis kaŝe dumnokte en la lito, armita per poŝlampo. Evidentas ke la postmatenon mi tiam sidis duondorme en la klaso, ne atentante la lecionojn. Krom tio, se ne sufiĉus tiuj prunteblaj libroj, mi abonis plurajn porinfanajn revuojn, kaj eĉ tiajn dediĉitajn al adolesk-antoj, kiun elspezon feliĉe permesis miaj sufiĉe bonfartaj gepatroj.

Kaj jen unuafoje Dio degnis manifesti Sin al mi per sonĝo ! Ĉirkaŭ dek-dujara, *Bar Mitsva,* unu nokton al mi aperis triptiko de alegoriaj bildoj, treege netaj, kiuj impresis min ĝismedole. En la unua panelo mi staris meze de la salono, tute sola, rigardante eksteren al la strato. Estis nokto. Subite la planko kaj la muroj ĉirkaŭe komencis skuiĝi, ĉiam pli kaj pli ĝis kiam la tuta domo ŝajnis kolapsonta. Samtempe mi tamen ekvidis antaŭ mi ankaŭ la urban ĉefpreĝejon, desegnitan kiel granda nigrega silueto, kontrastanta kontraŭ ruĝa fajra fono, kvazaŭ kontraŭ kurteno de incendio kiu kovris la tutan horizonton. Mi komprenis ke mi spektis la finon de la mondo kaj tutspeciale la destinon de la Eklezio. En la dua panelo mi staris dumtage malantaŭ la urbodomo, ankoraŭfoje tute sola. Denove komencis tremi sub miaj piedoj la pavimaro kaj mi aŭdis kreskantan tondradon. Subite alsturmis el la maldekstra strato hordo de grizaj bubaloj, kun kornoj minace direktitaj antaŭen. Ili bruege preter-kuris min, malaperante en la dekstran straton. Mi sentis venton pro ilia preterkurego, sed alimaniere ne estis tuŝita. Tiun scenon mi ne komprenis, sed ja ke mi eskapis al granda danĝero. Nur kelkajn jarojn pliposte, kiam la naziaj trupoj invadis kaj okupadis mian landeton, Belgion, mi komprenis ke la bubala sonĝopanelo aŭguris tiun travivon sen vera difekto por mi aŭ mia familio. En la tria panelo mi staris dumtage sur trotuaro flanke de la urbodomo, denove en tute senhoma ĉirkaŭaĵo, sed nun vestita per longa robo de … profeto. Antaŭ miaj mensaj okuloj alte leviĝis la granda konstruaĵo en kies flankmuro salte malfermiĝis pordego. Samtempe mi vidis transe de la domego popularan trinkejon, kunvenejon de sportŝatantoj. Ties fasado subite iĝis tute hela, kvazaŭ prilumita per teatra lumĵetilo. En la mezo de tiu lumo aperis

giganta iluziisto, vestita per nigraj frako kaj ĉapelo, tenante magian bastoneton en la dekstra mano kaj kiu larĝe ridetante gestadis enveni. Mi komprenis ke mi vidis la Satanon ĉar sub liaj piedoj, formitaj kiel hufoj, malfermis sin groto kraĉanta flamojn, la Infero. Tiam el fora strato je mia dekstro komencis alveni granda homamaso, laŭte kantante kaj dancante, vestitaj kiel por karnavalo. Ili direktis sin al mi, sed ili tuj antaŭ mi turnis sin por eniri la malfermitan pordegon de la urbodomo, tiel ke ili povis je la alia flanko eliri kaj tuj enfali la fajran kavernon de malfeliĉo. Mi staris tie tute ekscitite, provante ilin averti kontraŭ la poreterna mortdanĝero. Mia dekstra brako estis streĉita antaŭen kun etendita mano, sed neniu rimarkis tion. Mi provis kuri al ili, sed ne scipovis movi la piedojn. Eĉ pli ĉagrene, mi provis laŭte kriadi al ili sed el mia buŝo venis neniu sono. Tiel mi povis nur stari senmove, kvazaŭ statuo. Mi komprenis ke estos mia tasko averti la homaron, sed ke miaj provoj restos vanaj; kiel ĉe Johano en la deka ĉapitro. Kaj tiel fariĝis en la hodiaŭa epoko.



Benantaj manoj de rabeno

Tiu terura kaj kompleksa sonĝo kompreneble tiom konsternis kaj maltrankviligis min, ke ĉe vekiĝo mia dolĉa patrino apenaŭ sukcesis min kvietigi. Ŝi evidente argumentis, kiel farus ĉiu bona patrino, ke sonĝoj estas nur trompaj bildoj. Mi eble estus kredinta al ŝi, se nur ne la sama sonĝo ripetis sin la postan nokton ! Enestis nun kelkaj detalaj diferencoj, sed la triptiko restis esence identa. Do, mi plu ne povis dubi pri supernatura influo, sed ja decidis teni tiun travivaĵon por mi mem; ankaŭ ĉar mi ne sciis kiumaniere konvinki iun ajn, kiu konis min kiel kaprican kaj petoleman knabon, misbubon. La senton iel/iam devi roli kiel profeto do daŭre kaŝiĝis en mia koro, sen ke mi trovis konkretigon por tiu sento. Post okdeko da jaroj, la memoraĵo restas same freŝa kvazaŭ mi sonĝis ĝin hieraŭ.

La vorado de libroj kaj delaso de miaj lernejaj taskoj plu daŭris, sed ek de tiam kun miaj mensaj antenoj ĉiam malfermaj por eblaj signaloj el la Transa Mondo. Spronate de mia sekreto, la interesoj de adoleskanto transiris al veraj instrulibroj pri temoj … ne (aŭ ankoraŭ ne) apartenantaj al la mezlerneja studoplano. Tiel mi fariĝis por la junamikoj "promenanta enciklopedio". Kiam mi estis dekkvar- aŭ dekkvinjara, miaj gepatroj bonvolis aĉeti por mi grandan enciklopedion … franclingvan. Por mi, kies gepatra lingvo estis la nederlanda, ne konsistigis grandan problemon ĉar, kiel dirite, mi ege ŝatis lerni lingvojn kaj tion (escepte) faris diligente. Ĉiu novlernita lingvo ja malfermis al mi novan merkaton, ankoraŭ pli vastan, de sciindaĵoj.

Komencinte per popularsciencaj verkoj kaj revuoj, mi transiris memstare al efektivaj lernolibroj, parte troveblaj en la biblioteko, parte mem aĉetitaj … per la mono de miaj indulgaj karaj gepatroj. Rapide do kreskis mia privata librostoko de jaro al jaro, kio fine necesigis aĉeton de granda, speciale laŭ miaj deziroj konstruita, libroŝranko.

Ne sciante kien la Dia Providenco fakte stiris min, mi komencis cerbumi pri ĉiuj problemoj renkontataj ĉe filozofoj kaj sciencistoj, precipe ĉe astronomoj kaj fizikistoj. Tiuj agacaj hiatoj kaj sensencaĵoj en la reganta mondobildo igis min serĉadi respondojn al ili, por ke mia propra mondo-bildo fariĝu perfekte kohera, senrigarde ĉu miaj elpensitaj adaptoj estis veraj kaj realaj aŭ ne. Estis kvazaŭ mi staris antaŭ grandega teselta puzlo, kies pecetoj jen tie ĉi jen tie ti subite interkroĉiĝis, por iom pli poste ankaŭ inter si ekformi pli grandan sistemon. Tiamaniere miaj esploroj, sub spirita gvido per alegoriaj bildoj, kreskis kaj kreskis al la estonta nova paradigmo.

Tio estas la bona flanko de la medalo. Sed ekzistis, ve, ankaŭ malbona flanko en kiu mi estis facila ludpupo por la demonaro, pro miaj multaj malvirtoj. Dum miaj jaroj kiel adoleskanto kaj kiel dudekjarulo, ĝis preskaŭ tridekjarulo, mi por la cetero deziris nur ĝui la vivon, amuzi min kun gekamaradoj, sen atenti aŭ zorgi pri la kunhomoj, precipe miaj parencoj. Se mi ne plonĝis en la abismon de vera diboĉado aŭ krimado, estas nur dank'al la protekto de la amegata Senmakula Reĝino, kiu ne permesis al la infera bando ruinigi mian vivon … kaj samokaze mian planatan mision. Psikan forton mi ĉerpis el ofta kaj regula preĝado, precipe de la Rozario kiu — laŭ oftaj konsiloj de la Madono — estas la plej potenca el ĉiuj preĝoj. Ŝi cetere provizis erudician kaj saĝan gvidiston por mi, en la persono de monaĥa konfesprenanto, ĉiam preta rekuraĝigi min kaj remeti min sur la bona vojo. Li restas al mi tre karmemora.

Tio tamen ne signifas, ke mi neniam provis akiri iun laboron por memstare perlabori la vivon. Male, sed pro la citita manko je diplomo la labormerkato estis preskaŭ fermita antaŭ mia nazo. Kaj la metioj aŭ laboroj, kiujn mi tamen sukcesis akiri aŭ elprovis, pro tiu aŭ alia motivo unu post la alia ĉu fiaskis aŭ estis de kurta daŭro. Mi do sentis min, kaj

fakte estis, nenio pli ol parazito. Mi devas konfesi tion kun granda honto kaj humilo. Feliĉe, ĝuste tiaspecaj malŝatinduloj kaj sentaŭguloj povas okaze fariĝi taŭgaj instrumentoj por la Dia Providenco, kondiĉe ke ili konvertiĝu kaj humiliĝu: “Respondis Jesuo: <Mi dankas Vin, Patro, Sinjoro de Ĉielo kaj Tero, ke Vi kaŝis tiujn ĉi aferojn por la saĝuloj kaj gravuloj, sed ilin malkaŝis al infanoj.>” [Mat.11,25].

Preskaŭ tridekjara, hontante kaj min mem malestimante, mi do decidis fari ekstran fortostreĉon por plu ne devi dependi de aliuloj. Ofertis sin al mi la ebleco fariĝi radioteknikisto per serioza koresponda kurso, kiu provizis atestilon ĉe sukcesa trapaso de la ekzamenoj. Mi tre ŝatus vendi kaj ripari tiajn elektronikajn aparatojn. Tiu kurso liveris la ekstran avantaĝon iom post iom aĉeti vicpartojn por munti kaj eksperimenti. Tion mi vigle kaj metode faris. Krome, la kursgvidanto, inĝeniero de la koncerna instituto, volonte respondadis al kromaj demandoj pri la traktata leciono. Tiun ŝancon mi evidente elprofitis por superŝuti lin per mia nesatigebla scivolemo. Ĝis kiam, ie duonvoje, li malespere rifuzis, ĉar li “ne kapablis dediĉi tiom da tempo kaj energio al nur unu studanto.” Bedaŭrinda perdo, sed en tiu periodo mi tamen subite ekvidis la profundan naturon kaj dinamikan strukturon de magnetismo, kio poste ebligis rekonstrui la konduton de ĉiuj elektro-magnetaj fenomenoj, sur makrokosma kiel sur mikrokosma niveloj.

## Subite ... krak, finite !

Okazis akcidento pro kiu mia dekstra okulo grave infektiĝis. Ĝi komencis senhalte, sed nur malrapide, ŝveliĝi. Ne ekzistis kuraceblo. Dum multaj semajnoj mi kuŝis en hospitalo, suferegante, kaj eĉ blinda, ĉar pro la dolorego en unu okulo ial nerve maleblis al mi malfermi la alian.

La klimakso venis iun nokton en la semajno antaŭ Pasko, ls Sankta Semajno por Kristanoj. Mi dormis profunde pro forta narkotaĵo. En sonĝo mi subite vidis blanke vestitan anĝelon enflugi la ĉambregon tra la malferma pordo. En sia mano li tenis glavon, kiun li rapide puŝis en mian okulon kaj tiam samrapide ŝvebis eksteren. Estis la momento en kiu krevis mia okulo. Mi vekiĝis pro la ŝoko kaj sentis la okulan kristalfluidaĵon varme malsupren guti sur mia vango. La bildklareco de tiu trafa sonĝo facile komprenigis ke estas volo de la Dipatro. De tiam komencis lanta resaniĝo, sed ankoraŭ dum pluraj semajnoj mi restis blinda.

En la Sankta Ĵaŭdo mi aŭdis el radio la novaĵon, ke mortis la fama EINSTEIN, de mi tre admirata. Tio skuis min, ĉar laŭ mia opinio estis li la sola sciencisto kiu kapablus malkovri la samajn kosmajn strukturojn kiel mi. Ja en tiuj hospitalaj tagoj mi estis ege cerbuminta kio estos mia destino, nun ke fiaskis eĉ mia lasta fortostreĉo por perlabori la vivon kiel faras normala viro. Necesas reliefa vidpovo por povi fari la fajnan muntadon aŭ lutadon de radiotekniko. Tiun mi nun estis perdinta. Ne nur tio, sed kio fariĝu el la bela teorio pri la Universo kiel Dia kreitaĵo, kiun la Sankta Spirito tra la jaroj estis iom post iom malkaŝinta al mi,

kaj kiu ankoraŭ ne estis tute kompleta. Ĉu Dio do intencis unuflanke roligi min kiel profeto kaj aliflanke tion al mi malebligi ? Enigmo.

Malespero invadis mian koron ĝis en la vespero mi plore petegis al Jesuo kaj la Senmakula Virgulino helpi min, aŭ almenaŭ montri al mi la vojon. Respondo venis la postan tagon en tute ne atendita maniero.

La matenon de Sankta Vendredo mi vekiĝis kun sento de pezo premanta mian korpon kaj mian menson. Tiu kvazaŭ atmosfera premo pli kaj pli grandiĝis. Proksime al la tria horo de la posttagmezo la premo estis tiel forta, ke mi preskaŭ plu ne kapablis levi brakon aŭ kruron. Eklumis al mi, ke mi en spirito estis partoprenanta en la krucvojo de Jesuo. Nu, por katolikoj estas fiksa kutimo je la tria horo de Sankta Vendredo, per preĝoj, genufleksoj, kaj meditoj, memori la eventojn de la Pasiono de Jesuo. Tiucele la murojn de ĉiu klasika preĝejo ornamas vico de 13 bildoj kun koncernaj scenoj: skurĝado, surmeto de dornokrono, falego, nudigo, ktp. Kompreneble mi volis partopreni en tiu grava rito. Kunpacientoj helpis min el la lito kaj subtenis min ĝis la kapelo de la hospitalo. Tie mi kiel sako da terpomoj pli pendis sur preĝoseĝo ol genuis. Mi ankoraŭ nenion vidis sed klare aŭdis ĉiujn preĝojn kaj partoprenis al ili. Alvenis la antaŭlasta “stacio”. Mi aŭdis la gvidantan pastron laŭtvoĉe diri: “Dekdua stacio: Jesuo mortas sur la Kruco.” En tiu sama momento, kvazaŭ fulmtrafite, mi perdis la konscion kaj evidente defalis de mia seĝo.



Dekon da minutoj poste mi rekonsciiĝis sur mia lito, ĉirkaŭita de kuracisto kaj flegistinoj, kiuj enketis kaj ekzamenis kvazaŭ mi estis en danĝero de morto. Sed mi kontraŭe estis tiam tute klar-mensa, leĝersenta, kaj feliĉa. Ĉiu pezo, ĉiu dubo, ĉiu malespero estis for. Eĉ mia maldekstra okulo emis reobei. Mi komprenis la mesaĝon, ke Jesuo tute eksplicite invitas min partopreni en Lia Savlaboro, kaj ke mi ne bezonas zorgi pri la morgaŭo, ja la Dipatro zorgos pri mi: “… serĉu unue la Dian Regnon kaj ties justecon, kaj ĉio tio estos al vi donacata kiel kromaĵo.”

Efektive, la tutan reston de mia vivo ĝis la hodiaŭtago mi sentis min kiel akrobato danĝere ekvilibrante sur streĉita ŝnuro, alte super la grundo, sen fali.

Nelonge post rehejmiĝo mi enamiĝis al knabino eksterordinare talenta, idealisma, sindediĉa, kaj ŝi — kia didonaco — al mi. Tamen, ne sciante ĉu pro mia misio mi vivu kiel fraŭla religiulo ĉu kiel familia patro, mi relative longe hezitis, sed fine cedis al la evidento. Ni geedziĝis en

pilgrimejo de la Madono, sub kies alta protekto ni metis nian komunan sorton. Mia edzino estis instruistino, al kiu oni tuj (!) ofertis allogan postenon en katolika porknabina lernejo de la havenurbo Antverpeno. Ŝi tiun laborlokon akceptis post kiam ankaŭ mi, je mia propra miro, tie trovis laboron tute modestan en presejo-eldonejo. Ne povis esti hazardo ĉar ĝuste tiu medio provizis min per vasta rimedaro por realigi miajn verkojn, unu post la alia, kaj permesis al mi alkutimiĝi al la sinsekvaj teknologiaj progresoj: elektra tajpmaŝino, mekanika kompostilo, elektronika kompostilo, komputoroj. La Providenco klare mastris la cirkonstancojn. Mia karega edzino, spite danĝeran malsanon kaj diversajn malprosperojn, naskis al ni du ĉarmajn filinetojn. La infera bando ja ne ĉesis ataki ŝin kaj min, sukcesante survojigi obstaklon post obstaklo kaj daŭre provante delogi min de la granda tasko; miaj malvirtoj bedaŭrinde ne estis malaperintaj. Sed finfine realiĝis la granda nova Teorio pri Ĉio, kiu ne nur enpentras la plej profundajn sekretojn de la Universo, sed ankaŭ tiujn de la Dia Naturo mem, ĝis kie (kiom mi scias) neniu teologo iam estis allasita.

Tute veriĝis la junaĝa songô, ke mi agos kiel profeto, sed ke miaj mesaĝoj kaj revelacioj ne atingos la nivelon de publika atento. Spite tiun tute klaran indikon, mi fojon post fojo tamen klopodis diskonigi la dolĉan mielon en mia buŝo. Tia estas la homa naturo. Nia Kara Sinjoro elektis tian azenon.

Estis ankaŭ dilemo rilate al la duobla aspekto de la vidataj dinamikaj strukturoj. Ĉu komuniki la religiajn aspektojn unue, ĉu la strikte sciencajn ? Vide al la aktuala svarmado de profetoj, guruoj, iluminitoj, taŭmaturgoj, ŝajnis al mi oportune diskonigi unue la sekretojn de la Kosmo, kaj utiligi tiujn kiel atestilojn por la vereco de la teologiaj revelacioj.

Mi do metis ĉi-lastajn, detale kaj provizitaj per multaj ilustraĵoj klarigaj, sur Interreto per mia retejo www.teorioprichio.net. Sed jen, kvankam mia Teorio pri Ĉio troviĝas tie jam de la jaro 2010, kaj kvankam centoj da dosieroj el tie estis elŝutitaj tra la mondo, mi ricevis tute neniun reagon al mia retadreso — eĉ ne unu ! La obstina azeno restis blekanta senpove.

Pli poste, en la jaro 2012, la azeno surretigis flankajn verkojn pri terminologio kaj Esperanto, atendante ke eble tra tiu kroma vojo (www.universala-esperanto.net) ... Sed ne. Kiel aŭgurite, miaj personaj klopodoj por vendi la spiritan varon restis absolute vanaj. Homo pafas, Dio trafas.

Hodiaŭ, fine de mia vivo, mi decidis detaligi miajn viziojn pri la aktuala historio de la Eklezio kaj ties estonteco, senrigarde ĉu aŭ kiam ili atingos la publikan nivelon. Laŭ kiu vojo la grandaj revelacioj pri Universo kaj Kreinto atingos la Du Atestantojn ...???

*Kelkaj pliaj notindaĵoj.* Jam delonge mi sentas strangan parencecon kun Henoĥ, kvazaŭ liaj pensoj estus miaj kaj miaj estus liaj, sed sen povi tion iel konkretigi. Ankaŭ, sed malpli forte, kun la apostolo Johano kaj ties libreto. Trie mi pensas, sentas, rekoni min en unu el la vizioj de A.C. EMMERICK, kiu traktas pri la estonteca disfalo de la Katolika Eklezio: "Post tio ĉi [mi vidis] la Preĝejon de Sankta Petro surŝultre portata fare de malgranda viro, kiu havis judecajn trajtojn en la vizaĝo. Ĉio [ĉirkaŭe] aperis esti danĝerega. Maria staris sur la Preĝejo je la norda flanko kaj Ŝi protekte etendis sian mantelon. La vireto ŝajnis esti kolapsonta. Li ŝajnis al mi esti laiko kaj iel al mi konata. La dekduopo, kiun mi ofte vidas kiel novajn apostolojn, devus helpi lin per la subportado, sed ili alvenadis tro malrapide. Li jam ŝajnis estis kolapsonta, kiam ili finfine tamen venis ĉiuj. Ili sin metis sub la ŝarĝon kaj kune helpis multaj anĝeloj. Restis plu nur la fundamento kaj la malantaŭa parto [de la preĝejo]; ĉio cetera estis detruita fare de la sekreta asocio, helpata de la preĝejaj servistoj mem. Ili [la dekduopo] tiam portis la preĝejon al alia loko kaj estis kvazaŭ pluraj palacoj sinflekse kliniĝis antaŭ ĝi kvazaŭ spiko-kampoj."

En la alegorioj de la fama viziulino "malgranda viro" egalas al socie aŭ prestiĝe sensignifa homo. Kredeble (ĉu?) ŝi rekonis en li non Henoĥ, kiun ŝi ja ofte vidis en la kaŝita Paradizo, sed ne sukcesis lin efektive identigi tie ĉi pro la tute aliaj cirkonstancoj kaj ĉirkaŭaĵo. Pri la dekduopo kaj ties faroj mi reparolos en alia ĉapitro.



Virgulino de la Revelacio

Lastvice, sed neniel lastrange: Miriam-Maria estas ligita al la enigma libreto pri la destino de la Homaro, pli ol iu ajn profeto, eĉ pli ol ĉiuj profetoj kune. Mankegas spaco tie ĉi por tion demonstri; kiu deziras, povos trovi detalojn en Volumo 8 de la TpĈ. Sufiĉu jen la aparte trafa Ŝia apero en Tre Fontane (Italio 1947), kie la apostolo Paulus mortis kiel martiro, kaj kie Ŝi deklaris Sin "**Virgulino de la Revelacio**", premante la libreton kontraŭ Sia brusto. Krome diris Ŝi al la elektita viziulo: "Mi estas Tiu Kiu estas en la Sino de la Sanktega Triununo". Indegas teni tion en la memoro !

Post mia longa — tro longa — aŭtobiografio, por situigi mian modestan rolon en la tuta jena ekspono, estas urĝa tempo veni al la kulmina fazo de nia homa destino, antaŭira al la Dia Regno: la Venĝo de Dio, la Fino de la Mondo ... tiel kiel ni ĝin konas.

# XII. la tago de J H W H

## 1) La Signo de la Filo de Homo


Post elmontro de Sia Mizerikordo per la Granda Averto, la venĝego de Dio kontraŭ nia aktuala pekoplena Homaro — konata kiel Tago de Jehovo kaj pli ol 30 fojojn menciata en la Biblio — estos tiel terura, ke nia Tero riskos fariĝi arida planedo kiel Marso ! Mi ne troigas. Aŭguris la profeto Miĥa [5,10]: "En tiu tago, diras la Eternulo, Mi ekstermos viajn ĉevalojn ĉe vi kaj pereigos viajn ĉarojn [militmaŝinojn]. Mi neniigos la urbojn de via lando kaj detruos ĉiujn viajn fortikaĵojn [kaŝitajn savobunkrojn]. Mi ekstermos ĉe vi la sorĉistojn [sciencistojn] kaj vi plu ne havos aŭguristojn [politikistojn]. Mi neniigos en via mezo viajn idolojn [amasaj spektakloj, turismado, sport-eventoj], kaj viajn statuojn kaj vi ne plu adorklinos antaŭ faritaĵoj de viaj manoj. Mi eltiros el via mezo viajn sanktajn bastonojn [rimedojn de popolregado] kaj ekstermos viajn urbojn. Kaj en kolero kaj indigno Mi faros venĝon super la nacioj, kiuj ne volis obei [al mia Leĝaro]."

Tiu venĝo de venĝoj venos per **kosma kataklismo** kun potenco kaj sekvoj, kiel nia planedo ankoraŭ neniam travivis. En pratempoj nian hejmplanedon jam kelkajn fojojn trafis granda meteorito aŭ komedo, pereigante plejparton de la tiama vivantaro. Nu, multoblon de tio preparas Dio por skurĝi nin. La atakanto ĉifoje havos la formon de la Sankta Kruco, kiel profetite de Jesuo mem: "Tiam aperos sur la ĉielo la signo de la Filo de Homo." [Mat.24,30 ] Tio volas diri kruco en la originala formo, kiu estis tiu de Y-psilono.

Al mi estas donita pli konkrete prezenti kion tiu minacego fakte signifas. Ekzistas speciala tipo de meteoritoj — ankoraŭ nekonata de la astrofizikistoj — konsistantaj el nikelo-fero-kobalto kaj devenantaj de la kerno de iama granda planedo eksplodinta. Mi nomas ilin **nemesanoj** pro ilia naturo eksterordinare danĝera. Ili ja estas kolose grandaj kaj, pli ol la rokaĵoj en la profunda interno de nia Tero, kunpremegitaj. Tial ili posedas ankaŭ ekster-mezuran mason, alidire pezon, alidire gravitforton.Krom tio ili havas fortan magnetkampon kaj super ĉio estas arde radioaktivaj ! Pliajn detalojn oni povas trovi en [Vol.3/31,3.6].

Nu, ĝuste tia grupo, ne hazarde aranĝita Y-forme, jam estas survoje al ni el la profundaĵoj de nia Sunsistemo, laŭ relative plata heliopolusa orbito. Laŭ inkliniteco tiu orbito staras relative vertikale; pro kio ekde la Tero oni ne povos vidi ĝin alproksimiĝi, male al komedoj kiuj alkuras normale laŭ horizontala orbito, laŭ la ekliptiko. Krome, komedoj normale posedas longegan voston, kiun la suno prilumas. Pro tio oni vidas ilin alveni

monatojn antaŭe. Tian avertilon ne havas nemesanoj. La grupo do sufiĉe subite alsaltos nin de malantaŭ Suno, kvazaŭ tigro kaŝita en la arbustoj. La koncerna trajektorio ne estos direktita rekte al nia planedeto, kiel sago al la koro, sed preterfluge, "razante", kio provokos nekutiman serion de tertremegoj.




Razanta nemesano – La proporcioj kaj respektivaj distancoj ne estas realaj !

Normalaj tertremoj ja okazas pro premokonflikto inter najbaraj geologiaj tavoloj de la terkrusto, kiuj ĉu subite (post longa interpuŝado) ŝoviĝas unu preter la alia aŭ unu sub/super la alia. Sed jen, la granda altirforto de la nemesanoj efikos tajdoprovoke, kiel faras Luno al la marakvo, sed multe pli forte. Rekte sub la preterpasa punkto, maro estos supren levata kiel kuvo da lavakvo, monto kiel meblo. Tio kio ankoraŭ ne estos frakasita pro la suprenlevo, frakasiĝos pro la refalo. Sur tiu trajekto oni do vane serĉos rifuĝon en aŭ sub montaro aŭ en la profundeco de oceano. Notu tamen, tiu kolosa efiko okazos "nur" laŭlonge de la koncerna trajekto, analoge al la spuro de preterpasanta uragano. Sed ondoj se skuegoj transdonatos ĉirkaŭ la tuta planedo.

La radiada forto efikos blindige al homoj kaj bestoj pro sia brilo, sed ankaŭ temperaturaltige tiel ke akvo de riveroj kaj maroj komencos unue ekboli kaj fine vaporiĝi. Iom post iom vaporo kaj polvo sternos densan kovrilon tra la atmosfero tiel ke la sunlumo malaperos kaj fariĝos nokto dumtage. La aero

fariĝos sufoka por ĉiuj vivantaĵoj, kiuj bezonas ĝin por spiri. Kaj same la akvo de riveroj kaj lagoj iĝos venena. Apenaŭ necesas aldoni ke ĉie sur nia globo arbaroj ekflamos kiel skatolo de alumedoj.

La loĝantaro je la kontraŭa duono de Tero, kie normale estos nokto, havos la impreson ke ili vidas la firmamenton zigzagi, tiel ke estos kvazaŭ la steloj intermiksiĝas, dum envere estas la terkrusto, sur kiu ili prenas apogon, kiu skuatas tiamaniere. Sed baldaŭ ankaŭ ili siavice vidos nenion plu kaj spirados malfacile. La tertremegoj ondoforme ĉirkaŭkuros la tutan nian planedon, vene kaj revene, plurajn fojojn, frakasante kaj tordante pli aŭ malpli la tutan terkruston. Niaj fieraj nubskrapantoj kaj turoj interkolizios, bombadante la ĉirkaŭajn stratojn kaj placojn, plenigante ilin per ruinoj.

Ankoraŭ aparte, la atmosfero estos tielege ionizita pro la radioaktivaj radiaĵoj el la kosma vizitanto, ke neniu elektrokurento povos ankoraŭ flui, do ankaŭ neniu elektra aparato aŭ motoro funkcii. Aŭtomobiloj, (submar)ŝipoj, flugmaŝinoj, elektraj trajnoj, ekhaltos surloke. Oni eĉ ne povos lumigi kandelon, ĉar ankaŭ flamo estas elektromagneta fenomeno. Male, fulmegoj pafatos al kaj el ĉiuj direktoj, senĉese kaj intermikse. Ni tial ne forgesu daŭran orelfendan tondradon, kvazaŭ pafado de kanonegoj, kaj ankaŭ ne la tornadojn kiuj ventegos ĉie kaj ĉien, kaj ankaŭ ne la volkanojn erupciante ĉie kaj ĉien.

Se ĉio tio ankoraŭ ne sufiĉus, la nemesano nature siavice sentos la altirforton de nia Tero. Ĝi mem disspeciĝos tiel ke plenaj partoj kaj gruzo, ardantaj kaj radioaktivaj falos al grundo kaj maro, produktante kromajn ŝokojn kaj venenigon, eĉ se pliparto el la kosma grupo poste eventuale flugos pluen kaj for de Tero.

Pro tiuj interagoj de la du gravitkampoj, nemesana kaj tera, nia planedo baldaŭ plu ne estos rekonebla; ĉiuj atlasoj samtempe iĝos senvaloraj. Sed eĉ ĉielatlasoj iĝos plu ne utiligeblaj, ĉar nia Tero iom pelatos ekster siaj kutimaj orbito kaj inkliniĝo. Fakte, se tiu pundraŝado daŭrus iom longe, la tuta tera vivo pereus, escepte eble de mikroboj kaj virusoj. Sed Dio kurtigos la punon al **tri kaj duona tagoj**, kiel estas skribite, kaj Li scipovos mirakle savi sian reston de fideluloj. Tiokoncerne, mistikuloj profetis ekstermon de pliparto el la tera loĝantaro. Nombroj skalas de tri kvarono ĝis kvar kvinono. Ĉar la ter-loĝantaro aktuale atingas 7 miliardon da homoj, tio signifas ke pli ol 5 miliardoj da homoj pereos; kataklismo iel komparebla al la Diluvo, kiu postlasis centon da homoj ĉirkaŭ la familia okopo de Noaĥ, plus ne-takseblajn milojn sur montoĉenoj en Ameriko, Afriko, Orient-Azio.

Oni do pli bone komprenos la bibliajn profetaĵojn pri tiu dia skurĝo, kaj ankaŭ tiujn el aliaj fontoj. Mi citas intermikse:

Cef.1,15 – “Tago de kolero estos tiu tago, tago de malĝojo kaj angoro, tago de teruro kaj de dezertigo, tago de mallumo kaj senlumeco, tago de nuboj kaj de nebulego, tago de [ataksignalaj] kornosonoj kaj trumpetado kontraŭ la fortikigitaj urboj kaj kontraŭ la altaj turoj. Mi tretos la homojn kaj ili irados kiel blinduloj pro tio, ke ili pekis antaŭ Mi; ilia sango disŝprucos kiel polvo kaj ilia karno kiel sterkaĵo. Nek ilia arĝento, nek ilia oro, povos ilin savi en la Tago de Mia Kolero, sed per la fajro de Mia indigno estos forbruligata la tuta lando; ĉar rapidan ekstermon Mi faros al ĉiuj loĝantoj de la lando.”

Mat.14,29 – “Tuj post la aflikto de tiuj tagoj, la suno mallumiĝos kaj la luno ne donos sian lumon kaj la steloj falos el la ĉielo kaj la potencoj de la ĉielo ŝanceliĝos. Tiam aperos sur la ĉielo la signo de la Filo de Homo kaj tiam ploros ĉiuj gentoj de la tero.”

Ap.7,2 – “Mi vidis alian anĝelon suprenirantan de la sunleviĝo, havantan sigelilon de la vivanta Dio, kaj li ekkriis per laŭta voĉo al la kvar anĝeloj, al kiuj estis donita difekti la teron kaj la maron, dirante: <Ne difektu la teron, nek la maron, nek la arbojn, antaŭ ol mi sigelis sur iliaj fruntoj la servistojn de nia Dio.> Kaj mi aŭdis la nombron de la sigelitoj [kiuj travivis kaj postvivis la diktatoran subpremadon fare de la Antikristo]; cent kvardek miloj el ĉiuj triboj de Israel.”

Ap. 8,10 - “La tria anĝelo blovis; <u>granda stelo falis el la ĉielo, brulanta kiel torĉo</u>; ĝi falis sur trionon de la riveroj kaj akvofontoj, kaj la nomo de la stelo estas ‘Apsinto’. Kaj triona parto de la akvo iĝis apsinta, kaj multaj homoj mortis pro la akvo, ĉar ĝi estiĝis venena [sulfuratsida].”

Epidamus, mistika fonto - Asertas ke ekvideblos ĉielobjekto en la komenco kiel ŝajne nova stelo en la *Nordcronom,* kiu konstelacio situas inter *Bowistom, Serpentom* kaj *X-Hercules.* La entrafo de ĝiaj pecegoj eĉ igos Teron ŝanĝi sian inklinitetson, kio antaŭ-supozas ke iuj el la kolizioj penetros ĝis sub la terkrusto.

Lauqiniz (Hispanio 1968) – En aperaĵoj de la TSV estas profetate: “Avan la skurĝado, kiel averto, la tutan ĉielon prilumos flamanta kruco. Kiam tiu kruco disfalos, ĝi produktos tiel helan lumon ke la lumo de Suno plu ne distingeblos tra ĝi. Tio daŭros kvar horojn, post kiuj brula vento damaĝegos la tutan Teron. Multaj homoj mortos jam pro teruro, sed tiuj kiuj fidas je Dio, ne devos suferi.”

Vassula RYDEN, grek-ortodoksa mistikulino, komunikis la jenan mesaĝon je 28 Novembro 2009 - “Je la horizonto videblos stelo. La nokto malaperos kaj cindro falados kiel neĝo en vintro, kiu kovros Vian popolon kiel fantomojn. Kompatu nin, ho Dio, kaj mildigu Vian juĝon pri ni.”

Anna-Maria TAIGI, itala stigmatulino avertis nin pri kulmina fazo de la historio kiu estos decida kontraŭofensivo de la Ĉielo, en kiu la Dipatro ekstermos la malamikojn de sia Difilo dum **<u>tri tagoj de mallumo</u>**. "Ĉiuj malamikoj de la Eklezio, konataj aw nekonataj, pereos en la tuta mondo dum tiu tuttera mallumo, kun escepto por la malmultaj [kun bonvola koro] kiujn Dio baldaŭ konvertos. La aero estos infektita de demonoj, kiuj aperos en ĉiuspecaj abomenaj formoj. Sed kiam ĉio ŝajnos perdita kaj sen espero, tiam, en palpebrumo, la teruro estos finita; Suno denove leviĝos kaj rebrilos kiel en printempo super purigita Tero.”

2 Petr.3,10 – “Sed la Tago de la Sinjoro venos kiel ŝtelisto, kaj tiam la firmamento pereos per tondra perforto, la elementoj forbrulos kaj fandiĝos, kaj kune la Tero kun ĉio sur ĝi farita.”

La profetaĵoj akordas, dirante ke Kristanoj enŝlosu sin en siaj hejmoj (kiom tiuj ankoraŭ staros!), plej zorge ŝtopante ĉiujn truojn kaj fendojn

alekstere, dum tiuj teruraj tri tagoj kaj noktoj. La aero ekstere ja ne estos spirebla sed nepre venena, tiel ke neniu eĉ metu sian nazon eksteren. Niaj informfontoj tial avizas akiri benitajn kandelojn kiuj jes kapablos doni lumon sen konsumi la vakson. Mi aldonus: akiri nutraĵojn kaj trinkaĵojn benitajn, kiujn oni povos konsumi sendanĝere. Lastvice ne lastrange oni zorgu havi benitan akvon por aspergi homojn kaj objektojn, kaj oni daŭre preĝadu, prefere rozoĉenojn. En tiuj noktoj de hororo pereos nepre ĉiuj obstinaj oponantoj de Jesuo, inter kiuj evidente la homdiabla Antikristo.

Mi konjektas, sed estas nur konjekto, ke dum la noktotrio pereos ne nur la ĝisostaj malamikoj de Jesuo, sed same iliaj centroj aŭ falsaj kultobjektoj, inter kiuj ekzemple la Kremlo en Moskvo, la Rokokupolo en Jerusalemo, la Mormona Templo en Sallaga Urbo, Budho-statuoj kaj similaj; bono superas belon. ACE viziis ke "multo de homaj manoj farita estos neniigata" (do ankaŭ kaj bedaŭrindege valoregaj artobjektoj) kaj "plurajn grandajn urbojn oni lasos en sia stato de ruino kaj ne rekonstruos, kiel memoraĵoj". Tiu sola afero jam ŝokpuŝus alireligianojn al agnosko de Kristanismo.

Se la "Tago de Jehovo" estos senkompara teruro konkrete sur Tero, ĝi estos sama en la spirita sfero. Okazos tiam la profetita granda milito [Ap.16,16 ] inter unuflanke la Senmakula Reĝino kaj Ŝia bonorganizita kaj disciplinita armeo de anĝeloj, kun Miĥaelo kiel generalo ĉekape, kaj aliflanke Lucifero kun ties fibandego de Demonoj. La fina malvenko de la Ruĝa Drako estas anoncita jam en Genezo [3,15]: "Mi metos malamikecon inter vi [Satano] kaj la virino ]Miriam] kaj inter via idaro [demonoj kaj damnitoj] kaj ŝia idaro [sanktuloj kaj kredantoj]; vi atencos ŝian kalkanon kaj **(Ŝi)** distretos vian kapon." La hebrea frazostrukturo de tiu antikvega originalo, en kiu mankas la persona pronomo, intence lasas en la ombro, ĉu estos Ŝi mem aŭ Ŝia Infano (Jesuo) kiu venkos la diablaron. Estas dia intenco por ne jam tiel frue malkaŝi la dian dimension de la Virgulino. Ankaŭ multe pli poste en la Evangelioj kaj pro sama motivo la Virgulino apenaŭ menciatas. Por ekkoni Ŝian grandecon, gloron, potencon, kaj ŝian centran rolon en la Savhistorio, intimkune kun Jesuo, oni devas legi la viziojn de A.C. Emmerick, aŭ eĉ pli specife la inspiritajn verkojn de la abatino Maria el Agreda. Kaŭze de tiuj prisilentoj Ŝi estas konata nur kiel "la humila servistino de Dio" kaj do ankaŭ kultata tiel. La Triunuo gardas siajn plej belajn sekretojn ĝislaste, malkaŝante Sin iom post iom, laŭlonge de la evoluo, ĝis nia Fino de la Tempoj.

En tiu "Tago de Jehovo" Lucifero kaj liaj regimentoj do perdos sian povon je homoj, kiel estas skribite en Apokalipso 20,1-3: "Kaj mi [la apostolo Johannes] vidis anĝelon malsuprenveni el la Ĉielo, kun la ŝlosilo de la abismo kaj granda ĉeno en sia mano; li kaptis la drakon, la antikvan serpenton, kiu

estas la diablo kaj satano, kaj li tiun ligis por mil jaroj kaj lin ĵetis en la abismon, ŝlosante kaj sigelante tiun super li, por ke li plu ne povu delogi la popolojn, ĝis finiĝos la mil jaroj. Post tio li reliberigatos dum mallonga tempo ”

Rimarku en tiu citaĵo, ke la enkarcerigo de Satano, post lia absoluta malvenko, ankoraŭ ne estas definitiva ! Kial aŭ kiel do ne poreterne ? Tion mi eksplikos en la lasta ĉapitro.



# XIII. la REGNO DE DIO

Bona kaj justa patro punas siajn infanojn ne tiom por ellasi sian koleron, sed precipe por remeti ilin sur la ĝusta vojo kaj ilin savi de malbono aŭ danĝero. Ne mirige do, ke Dio kurtigos la kosman kataklismon al tri kaj duona tagoj. Se ne, la tuta homaro kun certeco tamen pereus tiam. Ni havas la modelon de la atombomboj faligitaj sur Japanujo sur “nur” du urboj, kaj kies kromefikoj mortigis kaj suferigis plurajn generaciojn da posteuloj. Kompare estis tio nur infanludeto. Tiel postvivos ankoraŭ plurcent milionoj da homoj al la timigega Tago de Jehovo, probable plejmulte fideluloj aŭ konvertiĝintoj. Sed, por ke tiuj homoj ankaŭ povu daŭrigi sian vivon meze de la ĉirkaŭmonda ruinaro, fondi familiojn, kaj komenci rekonstruadon de sia vivmedio, necesos mirakla dia subteno. Se ne, la historio de tiu renaskiĝo sendube postulus jarcenton aŭ eĉ pli da jaroj, kion ne antaŭvidas la kurvo de la tempokurvo, kiun mi prezentis en ĉapitro 3. Krome, la Dia Providenco intencis kaj intencas fondi finfine la gloran Dian Regnon, certe ne ekstermi la homaron kiun Ĝi estigis.



Pro tio kaj por tio, laŭ profetaĵoj de ACE kaj aliaj inspiritoj, Dio en palpebrumo <u>mirakle rekreos la naturon</u> sur la tersurfaco. La homoj kvazaŭ vekiĝos el premsonĝo, kvankam la abundego da ruinaĵoj kaj la totala geologia-geografia remuldo atestos poreterne pri la kosma eventego. Tiun rekreon mi povas interpreti nur per reestablo de la Paradizo, subite denove alkondukita el sia super-himalaja restadejo. Tamen kun esenca diferenco ! Originale, la unua homparo, estante en stato de absoluta anima pureco, bezonis nenion

fari por vivteni sin. Ili ne bezonis sin vesti, sin ŝirmi kontraŭ vetero, malsanoj, malamikaj plantoj aŭ bestoj, do ankaŭ ne bezonis fondi socion aŭ konstrui ion ajn.

Male, laŭ miaj mensbildoj, sur la postvivontoj ankoraŭ ne povos ne pezi la Origina Peko, kaŭzo de pekemo kaj malpliigo de iliaj kapabloj. Ili do ankoraŭ havos ĉiu sian propran koktelon de malvirtoj. Feliĉe, la demonaro restos enŝlosita kaj sen povo ekspluati kaj instigi tiujn malvirtojn kaj tiele malhelpi al ili fondi la Dian Regnon kun la nepra intenco kaj aspiro fari la mondon inda por reveno de Jesuo, la Reĝo de Reĝoj. En vere rekorda tempo, sub dia beno kaj eĉ kun nevidata helpo de la anĝelaro, estos do konstruata nova kaj tute ideala mondo, en kiu neniu, nek individuoj nek entreprenoj ankoraŭ laboros (nur) profitcele, sed ja por prepari la mondon al la Granda Reveno, la Paruzio. Regos absoluta unuanimeco, sindediĉo de ĉiuj senescepte, kun plena interkompreniĝo — al kio forte kontribuos la internacia lingvo Esperanto — kaj ne lastvice kompleta kongruo inter Religio kaj Sciencoj. La predikado de la Du Atestantoj tiam montriĝos ne vane farita. Tiel oni baldaŭ scipovos krei kaj manipuli graviton, kio siavice ebligos fabriki mirigajn teknikaĵojn. Energio, en diversaj formoj, iĝos neelĉerpebla kaj sen fiaj flankproduktoj aŭ –efikoj. Spacegoveturiloj, laŭ la modelo de ovnioj, ebligos laŭplaĉe traesplori spacon kaj tempon.

La religia fervoro estos ardega kaj sincera. Estos plu neniu devia aŭ aliprincipa religio, sed nur la Eklezio de Jesuo. Tiu estos refondita ambaŭ materie kaj spirite — ĉar ja la malnova(j) estos pereinta(j) — fare de la Dekduopo pri kiu profetis ACE kaj en kies mezo estos almenaŭ unu episkopo, tiel ke oni denove kapablos surtronigi (veran) Papon, la *Petrus romanus*, lasta en la listo de Sankta Malaĥio. Tiu latina devizo referencas al transporto de la relikvoj de Sankta Petro el Romo al Jerusalemo. La lasta papo, kiu eksterdube ankaŭ estos de juda deveno, evidente elektos sian sidejon en la Templo de Jerusalemo, belege rekonstruita kaj dediĉita al la Triunuo kaj la Senmakula. Apenaŭ necesas indiki ke ĉefrolos en tiu finepoko lia gento … la Judoj, la Filoj de Israel, finfine oficiale agnoskintaj Jesuon kiel sian Mesion.

Ke ili tion faros, aŭguris Heb.11,15: "Mi ne volas, fratoj [kristanaj], ke vi ne sciu ĉi tiun misteron, por gardi vin kontraŭ fifieron [ke vi agnoskis la Mesion, dum la Judoj mem ne], ke laŭparta obstineco okazis al Izrael nur ĝis la pleneco de la paganoj envenis [la de Dio antaŭvidita nombro]; kaj tiam la tuta Izrael saviĝos."

En tiu rilato ankaŭ sonas profete la paroloj atribuataj al la buŝo de Papo Paulus VI, kiam tiu en 1964 vizitis la Monton de Olivjeroj en Jerusalemo: "Romo ne porĉiame transprenos la rolon de Jerusalemo. Romo estas loko de ekzilo. Sed Petrus ne restos ĉiame ekzilita. La vera hejmo de la Eklezio estas

kaj restas Jerusalemo. La problemo pri ekumena integriĝo solvatos per Dua Koncilio de Jerusalemo, per kunsido en unueco kun Mesianaj Judoj.” Da “mesianaj judoj”, kiuj fervore agnoskas Jesuon, jam aktuale ekzistas sufiĉe multaj, kaj ilia nombro salte kreskas, en Israelio mem kaj en la ekstera mondo. Sed tiuj konvertiĝintoj, bedaŭrinde (ankoraŭ) ne konscias ke laŭdado kaj adorado al la Difilo en si mem ne sufiĉas por levi la Dipatran malbenon je sia elektita popolo, kiu raso daŭre restas abomenata kaj persekutata de aliaj popoloj (precipe de iliaj genevoj islamanaj). Ne, nepre ne, la tuta ilia ŝtato, tiom sur politika kiom sur religia nivelo, unue devos tute oficiale malvalidigi kaj revoki kun profunda pento la maljustegan kaj abomenan kondamnon al morto fare de la iama Sanedrino. Malfacilega elpaŝo, kiu egalas abĵuri la farizean Talmudon, kiu tielege forte ilin kuntenas kaj identigas!

[Zaĥ.12,13]: «En tiu tempo Jehovo defendos la loĝantojn de Jerusalemo kaj tiuj inter ili kiuj ŝanĝiĝos estos en tiu tempo kiel David, kaj la domo de David estos kiel Dio, kiel anĝelo de Jehovo ĉe ilia frunto. Kaj okazos en tiu tempo ke Mi okupos Min per ekstermado de ĉiuj popoloj kiuj atakis Jerusalemon. Sed sur la domoj de David kaj sur la loĝantojn de Jerusalemo Mi verŝos spiriton de graco kaj de petegado; kaj ili turnos siajn rigardojn al Mi. Kiom koncernas tiun kiun ili trapikis, ili funebros pro li, kiel oni funebras pro {mortinta} solfilo, malĝojante pro li kiel oni malĝojas pro {mortinta} unuenaskito. En tiu tago estos granda plorado en Jerusalemo, kiel la plorado de Hadadrimon en la valo de Megido. Ploros la lando, ĉiu familio aparte: la familio de David aparte kaj iliaj edzinoj aparte; la familio de la domo de Natan aparte kaj iliaj edzinoj aparte; la familio de la domo de Levi aparte kaj iliaj edzinoj aparte; la familio de la Ŝimejidoj aparte kaj iliaj edzinoj aparte; ĉiuj familioj kiuj postrestas, ĉiu familio aparte kaj iliaj edzinoj aparte.»




Jam ekzistanta emblemo de la
Mesianaj Judoj

Tiu oficiala revoko kredeble okazos tre solene, eble eĉ en la nova templo, dum la **Dua Koncilio de Jerusalemo**, al kiu lasta multaj Judoj jam nun strebas. Sed tiu repaciĝo kun Jehovo okazos nur en la tute lasta historia periodo, kaj pli ol io alia efikos kiel solena invito al Jesuo por reveni surteren, invito kiu tiam efektive realiĝos kiel apoteozo de la homa historio.

Sendube estos tiu lasta papo, kiu proklamos la dogmon pri Maria (Kun)-Perantino de ĉiuj gracoj kaj kiu dediĉos Ruslandon al la Senmakula Koro de Maria, kiel petate en Fatima 1917.

**Kial reliberigo de Satano ?**

Tiu ideala situacio por la lasta generacio tamen havas malagrablan implicon por ili. Vivi kaj labori tute libera je demonaj tentoj kaj delogoj konsistigas senkomparan privilegion … ne meritan. Kiel antaŭe dirite, tiu generacio sendube ankoraŭ havos siajn naturajn malvirtojn por venki — la rekreita Paradizo ne estas perfekta. Miloj da antaŭaj generacioj ne disponis tian imunecon kaj devis dumvive lukti, ne nur kontraŭ si mem, sed ankaŭ kontraŭ la Infero por meriti al si la Eternan Vivon. Jen faktoro de malkongruo kiun la Dia Justeco, estante absolute perfekta, ne povas toleri !

Tial la lasta generacio, por meriti la eternan feliĉon, devos tamen trapasi dornejon de tentoj kaj delogoj, eĉ se nur dum tre kurta periodo. La demonaro sekve ricevos la rajton ankoraŭfoje, tute lastfoje, ataki la homojn kiel anoncite en Apokalipso 20. Oni povas konjekti ke tio okazos ĉe la fino de la Dia Regno.

Estos ankaŭ granda diferenco kun la antaŭaj tempoj, en kiuj Jesuo estis vere konata kaj adorata nur fare de Kristanoj. Sed la mondo de tiuj tempoj, la nia, ampleksis miliardojn da individuoj kiuj ne konis la Savanton kaj ne povis Lin koni, pro la obskuriga kaj misgvida kulturo kaj religio en kiu ili naskiĝis kaj mortis. Tamen ankaŭ ili estos tre juste prijuĝataj, nome laŭ la Dua Supera Leĝo de Dio. [Rom.2,15] "Kiam la paganoj [ne-Judoj aŭ ne-Kristanoj], kiuj ne posedas la Leĝon [la kristanan kredon], laŭnature tamen obeas la preskribojn de la Leĝo [precipe la duan ordonon pri amo al la kunhomoj], tiamdo ili estos sen la Leĝo si mem kiel [valida] Leĝo." Bonvolu instrui tion speciale al ĝihadistoj kies vivo plenegas je MALamo…

**Ĉu epoko de efektive mil jaroj ?**

La homa vivo estas ege tro mallonga por ke oni povu sperti la veran naturon de Tempo. Ĉiu homo facile pensas kaj kredas ke tiu kuras rektlinie antaŭen. Nur geologoj povas havi la senton kaj konvinkon, ke la tempokuro ne estas lineara sed jes eksponenta, do prezentenda per kurvo anstataŭ per rekta linio, prefere eĉ per spiralo. En mia TpĈ mi klarigas kiel kaj (eĉ teologie) kial tio fariĝis [Vol.1/9+10]. Distanco egala al mil jaroj sur la horizontaleca parto de la kurvo do ŝrumpas kaj ŝrumpas eksponente, fariĝante sur la vertikaleca asimptoto al eble dek jaroj ! Matematike kaj fizike estas neniu malkongruo. Evidente, la homoj antaŭ la veno de la Mesio, kaj tiuj de Lia propra surtera vivo, ja eĉ ĝis la eŭropa Mezepoko, ankoraŭ kredis ke la Tero en sia tuteco estas platebena kaj ke la Suno karuselas ĉirkaŭ ĝi. Iliaj skribaĵoj do ne povas ne esti naivaj kaj fabelecaj; tiel do ankaŭ la "mil" jaroj.

Alidire, sur la asimptota kurvo povas okazi multege pli kaj multege pli rapide, en nuraj dek jaroj, ol dum mil jaroj sur la ebena parto de la tempokuro ! Jen la kaŝita signifo kaj enhavo de la biblia esprimo "mil jaroj".

# X V. la L A S T A J U G H O

En multaj lokoj de la Biblio kaj krome en alireligiaj sanktaj skribaĵoj estas anoncata ke iam la tempo haltos kaj ke tiam okazos granda juĝosesio, en kiu juĝataj estos ĉiuj homoj kiuj iam vivis sur Tero. Malbonuloj poreterne kondamnatos al la Infero, bonuloj eniros la Ĉielon de eterna feliĉo.

[Mat.25,31]: “Kiam la Filo de la Homo venos en sia gloro, akompanata de ĉiuj siaj anĝeloj, Li prenos lokon sur sia glora trono. Ĉiuj gentoj kolektiĝos antaŭ Li. Li apartigos la homojn unuj disde la aliaj, kiel paŝtisto apartigas ŝafojn kaj kaprojn, kaj Li lokigos la ŝafojn je sia dekstro kaj la kaprojn je sia maldekstro. Tiam la reĝo diros al tiuj je sia dekstro: <Venu vi, benitoj de mia Patro, heredu la regnon preparita por vi ekde la kreo de la mondo.> (…) Tiam Li diros al tiuj kiuj troviĝos je lia maldekstro: <Iru tre for de mi, malbenitoj, en la eternan fajron, preparita por la diablo kaj ties demonoj!> (…) Kaj ili disiros, tiuj-ĉi por esti punataj eterne; tiuj aliaj, male, por vivi feliĉaj eterne.” Jen pentrinda alegorio de antikvulo, por esprimi ion por kio necesas nocioj el kvantumfiziko, relativecteorio, kaj mia nova paradigmo.

Por realisme konkretigi tiun profetan alegorion, mi devigatas do, vole nevole, transiri al moderna **kosmologio** — ja al mia novprezento de tiu, la Teorio pri Ĉio. Se al iuj legantoj estos malfacile digesti tiun eksponon, mi bedaŭras, sed ne povas fari alimaniere. Plejeble koncize do ::

Nia Universo (la spacego) ne nur dilatiĝas ĉiam pli rapide, sed — havante la formon de etera sfero purenergia — ĝi ankaŭ turniĝas ĉirkaŭ sia akso ! Jen la spektakla novaĵo de mia paradigmo. Tiuj du moviĝoj = fortoj ne agas sendepende unu de la alia, sed tre intimlige, fakte kiel vektoroj de **fortokuplo**.




**kuplo de fortoj**

Pro tio, atribuante ekspansion al la faktoro **a** kaj rivoluadon al la faktoro **b**, la rezultanto el ambaŭ estas **c**, kiu ĉiam egalas al lumrapideco ! Tiu c-kvadrata rezultanto do estas konstanta faktoro. sama kiel en la fama energiformulo de Einstein. El tiu kuplo oni facile devenigas ke, se dilatiĝado kreskas, la turniĝado devas necese malkreski proporcie. Kiam do **a** atingos lum-rapidecon, **b** egalos al nul kun konsekvenco ke nia Universo subite ekhaltos ! Ĝi do havos finon, male al la fuŝmodeloj kiujn aktualaj fizikistoj instruas pri la Universo.

Plej mirige kaj admirinde, la progreso de la rezultanto okazas laŭ la fama **Leĝo de Pitagoro**:

$$a^2 + b^2 = c^2$$

Tiu limo de streĉiĝado de la Universo plu ne povas esti tre fora. Aktuale astronomoj povas ĝin sufiĉe fidinde mezuri per statistika evaluado de la supernoveoj, kiuj ekflagras en plej malproksimaj galaksioj, tiom distancaj ke oni ne kapablas ĉiujn vidi. La mezurataj rapidecoj kaj ties Doppler-devioj montriĝas esti jam tre “relativismaj”, t.e. proksimaj al lumrapideco.

Tio ebligos determini la finon de la mondo, sed nur proksimume, tial ke la unuoj kiujn oni utiligas por spaco kaj tempo estas enfunde malcertaj, eĉ matematike malcertaj, pro tio ke ili baziĝas sur la nur empirie akirebla **Konstanto de Planck** kiu mem entenas la transcendan nombron Pi ne ekzakte determineblan [Vol.2/18].

Jen pravigo de la paroloj de Jesuo en [Mat.13,28] “Lernu de la figarbo tiun ĉi analogion: kiam ĝia branĉo jam moliĝas kaj jam ekŝprucas folioj, tiam vi scias ke la somero estas proksima. Tiel same, kiam vi vidos ĉion ĉi [la anoncosignojn pri la reveno de Jesuo], sciu ke la fino staras sur la sojlo. Ververe, Mi diras al vi: Tiu ĉi generacio [?] ne forpasos ol ĉio ĉi okazis. Ĉielo kaj Tero forpasos, sed Miaj paroloj ne forpasos [sen realiĝo]. Sed pri tiu tago kaj tiu horo neniu scias, eĉ ne la anĝeloj en la Ĉielo, nek la Filo de Homo, sed nure la Patro.”

En tiu “momento” la Universo transformiĝos komplete kiel anoncite en 1 Kor.15,51: “Vidu, mi malkaŝas al vi sekreton. Ni ne ĉiuj mortos [ĉar en tiu momento estos ankoraŭ vivantoj sur Tero], sed ni jes ĉiuj transformiĝos, subite, en palpebrumo, ĉe la lasta trumpet-blovo. Kiam tiu blovo sonegos, la mortintoj reviviĝos, plu ne putriĝeblaj, sed nia formo ŝanĝiĝos. Ĉar putrebla devas esti vestata per neputreblo, la mortema per nemortemo. Kaj kiam tiu ĉi putrebla estos vestita per neputreblo, kaj la mortema per nemortemo, veriĝos [Jesaja 25,8].”

Tiu subita transformo signifos ankaŭ la revenon de Jesuo kiel absoluta Reĝo kaj Juĝisto, kiel skribis [Mat.24,27] "Ĉar kiel fulmo ekpafiĝas el oriento kaj pafiĝas al okcidento, tiel estos ankaŭ la reveno de la Filo de Homo." La materio en la spacego nome estas nenio alia ol projekcio de la Difilo. Tion prave sentis Teilhard de CHARDIN <*Le Christ universel*>, sed li bedaŭrinde ne sukcesis esprimi siajn ideojn en klara lingvaĵo. Leganto, kiu deziras pluajn eksplikojn konsultu mian *Enkonduko al Scienca Teofanio.*

Laŭ mi, estos du fundamentaj karakterizoj de la Granda Transformiĝo — kiun formon de ekzistado mi baptis **Perpetuo** — el kiuj oni povos dedukti multon, sed kiujn mi tie ĉi povas nur pritrakti tre koncize.

Unue, la tempo plu ne evoluos aŭ progresos, sed fariĝos ĉiama "nun" dum la spaco fariĝos ĉiea "**tie-ĉi**". Sekve estas senplie evidente, ke ĉiuj homoj ĝis eĉ la unua homparo (laŭtakse 12 miliardoj!) reaperos. Fakte ne nur ili, sed samkiale ĉiuj bestoj kaj plantoj kiuj okupis la Teron ! Nombroj kaj kvantoj ja plu nenion signifos en tiu kadro. Sed tio konsistigos neniun problemon pro la "nun" kaj "tie-ĉi". Ĉio estos (re)organizita en perfekta ordo, sen manko aŭ superfluo.

Dua fundamenta karakterizo estos ke ĉiuj baroj malaperos, ajne de kiu naturo. La ĝenerala leĝo de fiziko, ke "nenio povas troviĝi samtempe en la sama loko de io alia" plu ne validos. Specife por homoj, ili vidos sin ĉiujn, same kiel faras la anĝeloj, kaj interpenetros unu la aliajn laŭdezire. Plu ne eblos eĉ ono de sekreto aŭ privateco; ĉiuj scios ĉion pri ĉiuj, same kiel Dio, kaj fakte en Dio kiel spegulo. Intensa amo trapenetros la sanktulojn, dum malamo la damnitojn kaj demonojn. Ĉio sciinda sciatos, ajne la nivelo aŭ temo. Tio dankindas al la tiel nomataj **akaŝaj registroj**, koncepto bonkonata en Hindismo, sed neglektita de kristanaj teologoj, filozofoj, patruloj. Tiuj estas la arĥivejo de la spirita sfero en kio ĉio kio iam estis aŭ faratis estas aŭtomate notita. Penso de la Dipatro, iu ajn, estas plu ne forviŝebla ! En la Perpetuo ĉiuj tiuj registraĵoj reprenos formon kaj vivon kvankam eteran.

Oni ne timu aŭ sentu ĝenon pro tio, ke ĉiuj pekoj fariĝos publike konataj, ĉar por sanktuloj estos ili elementoj de gloro kaj de ĝojo, vide al la multaj gracoj kiuj helpis ilin venki siajn misfarojn aŭ penti pri ili, kaj vide al iliaj propraj triumfaj baraktoj kontraŭ la inferuloj. Male, por damnitoj ili evidente estos fonto de grandega suferado aparta. Familianoj kaj karuloj feliĉe revidos sin, ja interpentros … kondiĉe ke ili estos ĉiuj savitaj !.

Mi scias, estas apenaŭ kredeble kaj imageble, ke Ĉielo kaj Infero okupos la saman "lokon" en Dio, sed enbildigu tion kiel du fluantajn sferojn inter-mergitaj, tiel ke unu (la pozitive bona) rotacias dekstren, akorde kun la Sanktega Triunuo, dum la alia (negative malbona) rotacias maldekstren, opone al la Sanktega Triunuo. Oni povas ankaŭ diri ke Savitoj frontos Dion


vizaĝon-al-vizaĝe, dum Damnitoj frontos Dion dorson-al-vizaĝo. La unua stato estos fonto de absolutaj feliĉo kaj ĝuo, dum la dua stato estos fonto de absolutaj malfeliĉo kaj sufero. “Sidi al dekstro aŭ maldekstro” de la Juĝisto klare estas nur stilfiguro por indiki respektive sanktulojn kaj damnitojn. Ne forgesu: la Sankta Virgulino prezidos same bone kiel Ŝia Dia Filo, kvankam la skribaĵoj preterlasis mencii Ŝin !

Estas ankoraŭ multo por dedukti pri tiu **Perpetuo** de la materio + spaco, ekzemple la staton de beboj mortintaj sen bapto, kies animoj ne povos esti *en ago* sed nur *en potenco* kaj tial ne vidos la Dian Vizaĝon. Por la cetero iliaj perpetuigitaj spirito kaj korpo ĝuos kvazaŭ paradizan staton. Sed pritrakti nepre ĉion postulus libron apartan, kiun mi ne povas aŭ volas verki.

FINO



**Hans Memlinc - La Lasta Juĝo**




La emblemo de Akita, signo de la Triiumfo de Maria